

Hermas

La Paŝtisto

fru-kristana apokrifa apokalipso Greka el Romo

el la Greka (partete el la Latina) tradukita de

Gerrit Isai Berveling

Gerrit Beroving:

Enkonduko

De post la eldono de J. B. Cotelier de 1672 oni atribuas tiun ĉi verkon al la *Apostolaj Patroj*. Sed fakte ĝi ne vere taŭgas tiuloke: temas pri apokrifa revelacio. Origeno kredis, ke la aŭtoro Hermas estas amiko de la apostolo Paŭlo (Rom 16:14), sed pli fidinda estas la aserto, ke la aŭtoro estis la frato de Pio la 1a, la episkopo de Romo (145-155). Kiel ajn, la verko devas datiĝi de la tempo inter 100 kaj 150 p. Kr. En la teksto (1:1) estas legeble, ke certan tempon Hermas estis sklavo de iu s-ino Roda (Ρόδη, Rhode). Poste li estis liberigita, ekloĝis en Romo kaj havas terenon ĉe la vojo al Kumo (Κούμαι, Coumæ).

La libro konsistas el serio da 5 Vizioj, 12 Ordonoj kaj 10 Paraboloj. En la unua Vizio aperas olda virino, simbolo de la Eklezio vivanta en pekoj, en la dua Vizio ŝia vizaĝo pli juniĝas, nun ŝi simbolas la pentofarantan Eklezion. En la tria – juna – ŝi estas la Eklezio, liberigita el la pekoj, sed ankoraŭ vivanta surtere kaj sekve submetita al eblaj malpuriĝoj. La konstruado de la Eklezio estas simboligita per turo, kies ŝtonoj estas bonaj kristanoj; la malbonaj ŝtonoj simbolas la pekulojn, kiuj ankoraŭ devas esti taŭgigitaj por la konstruo. En la kvara Vizio la Eklezio estas floranta juna virino, libera de ĉiu malpuro, tia kia en la Lasta Tago ŝi aperos. En la kvina Vizio aperas anĝelo en aspekto de Paŝtisto – li ordonas al Hermas skribi noti la sekvajn Ordonojn kaj Parabolojn.

Tiujn Ordonojn – sufiĉe konatajn por Kristanismo – iom prikomentas la Paŝtisto, ekzemple pri divorco, pri dua nupto kaj pentofaro. En la Paraboloj la anĝelo traktas plurajn kristanajn nociojn: jen averto kontraŭ troa interesiĝo pri ĉi-teraj aferoj, jen instigo al bonfarado, jen atentigo, ke ĉi-monde la bonuloj kaj la malbonuloj devas kune vivi, sed ĉe la Lasta Tago venos la juĝo; foje li parolas pri fastado, pri pentofarado ktp. Poste revenas la bildo de la Turo-konstruado: pentado faras el pekuloj taŭgajn ŝtonojn por la konstruo. Ĉar ankoraŭ ne pretas la turo; fundita ĝi ja estas sur la profetoj kaj apostoloj, la Filo de Dio estas la angula baza ŝtono. – En la lasta ero Hermas ricevas la instigon purigi sian propran hejmon.

Malgraŭ la apokalipsa formo la enhavo estas sufiĉe klara. Tiu ĉi *Paŝtisto* fariĝis ŝatata legaĵo. Ireneo, Tertuliano kaj Origeno konsideris ĝin parto de la Nova Testamento; ie tie en la frua Eklezio oni legis ĝin kiel tian¹. Poste ĝi tamen forfalis el la atento.

Fonto, el kiu estas tradukita:

PADRES APOSTÓLICOS, edición bilingüe completa, introducciones, notas y versión española por Daniel Ruiz Bueno, segunda edición 1967

Broŝure:

Hermas

La Paŝtisto

El la Greka (partete el la Latina) tradukita de Gerrit Isai Berveling

Voĉoj Kristanaj 32

VoKo, Rijswijk 2020

(planita)

Interrete:

https://el.wikisource.org/wiki/O_Ποιμὴν_του_Ερμά

Lastfoje kontrolita: 2020-04-26

¹ Vidu en Antologio Latina, vol. 4, p. 313-315: Kanono Muratori.

La Paŝtisto de Hermas

Ο Ποιμὴν του Ερμά

PASTOR HERMÆ

La Vizioj

Unua Vizio

Peko de penso

1: 1 Mia edukinto vendis min al iu s-ino Roda en Romo. Post multaj jaroj mi komencis koni kaj ami ŝin kiel fratino. 2 Post iom da tempo mi vidis ŝin lavi sin en la rivero Tiberio, kaj mi etendis al ŝi la manon kaj kondukis ŝin el la rivero. Vidante do ŝian belecon, mi rezonis en mia koro: Feliĉa mi estus, se tian virinon mi havus, pro ŝia beleco same kiel pro ŝia karaktero! Nur tion mi pensis, nenion alian.

3 Kiam post iom da tempo mi vojaĝis al Kumo, laŭdante la kreaĵojn de Dio, kiel grandaj kaj imponaj kaj grandiozaj ili estas, dum marŝado mi ekdormis. Kaj spirito min prenis kaj kondukis min tra senvojejo, tra kiu homo ne kapablas vojaĝi; ĉar la loko estis kruta kaj trafendita de akvoj.

Trairinte la riveron, mi venis sur ebenaĵon, kaj mi surgenuiĝis kaj komencis preĝi al la Sinjoro kaj konfesi miajn pekojn. 4 Dum mi estis en preĝo, malfermiĝis la ĉielo, kaj jen la virinon, kiun mi deziris, mi vidas saluti min el la ĉielo kun la vortoj:

Saluton, Hermas!

5 Rigardante al ŝi, mi diris al ŝi:

Sinjinino, kion vi tie faras?

Kaj ŝi respondis al mi:

Mi suprenpreniĝis, por ke viajn pekojn mi akuzu ĉe la Sinjoro.

6 Mi diris al ŝi:

Ĉu do nun vi akuzas min?

Ne – ŝi diris – sed aŭdu la parolojn, kiujn mi diros al vi. Dio, kiu loĝas en la ĉieloj, kaj kiu faris el la neekzisto ĉion ekzistantan, kaj kiu multigis kaj plinombrigis ĝin pro sia sankta eklezio, koleras al vi, ĉar vi pekis al mi.

7 Responde mi diris al ŝi:

Ĉu mi pekis al vi? Kiamaniere do? Ĉu eble malhonoran parolon mi diris al vi? Ĉu mi ne ĉiam konsideris vin kiel Diinon? Ĉu mi ne ĉiam respektis vin kiel fratinon? Kial, ho virino, vi elpensas tiujn fiaĵojn kaj malpuraĵojn?

8 Ŝi ridis kaj diris al mi:

En vian koron eniris deziro al malbono. Aŭ ĉu vi ne opinias tion io malbona por justulo, se en lian koron eniras malbona deziro? Ja estas peko – ŝi diris – kaj granda! Ĉar justulo pripensas justaĵojn. Se li pripensas justaĵojn, firmiĝas lia gloro en la ĉieloj kaj la Sinjoron li havas bonvolema ĉe ĉiu sia faro; sed kiuj primeditas malbonon en siaj koroj, – morton kaj kaptitecon tiuj altiras al si, precipe tiuj, kiuj ĉi mondon lukras kaj kiuj delicumas en sia riĉo kaj ne strebas al la venontaj bonoj.

9 Konvertiĝos la animoj de tiuj, kiuj ne havas esperon sed malesperas pri si mem kaj pri sia vivo. Sed vi, preĝu al Dio, kaj saniĝos viaj pekoj kaj tiuj de via tuta domo kaj de ĉiuj sanktuloj.

Tristeco de Hermas

2: 1 Post kiam ŝi tiujn parolojn eldiris, la ĉieloj fermiĝis; kaj mi restis tute tremanta kaj trista. Mi diris en mi mem:

Se tiu peko mia do estas notita, kiel mi ankoraŭ povos saviĝi? Aŭ kiel mi favorigos Dion pri miaj pekoj plenumitaj? Aŭ kiaparole mi demandos la Sinjoron, ke li min indulgu?

2 Kiam tion ĉi mi pripensis kaj en la koro prijuĝis, jen mi vidas antaŭ mi blankan seĝon, grandan, faritan el lano neĝoblanka; kaj venis maljunulino en plej brila vestaĵo, kun libro en la manoj. Kaj ŝi sidiĝis, sola, kaj salutis min:

Saluton, Hermas.

Kaj mi – trista kaj ploranta – diris:

Saluton, sinjorino.

3 Kaj ŝi diris al mi:

Kial vi estas malgajema, Hermas, – vi kiu pacienca kaj milda, – vi kiu ĉiam ridema estas, kial vi estas tiom deprimita laŭaspekte kaj ne gajhumora?

Kaj mi diris al ŝi:

Pro virino plej bona, kiu diris, ke mi pekis al ŝi.

4 Kaj ŝi diris al mi:

Io tia ja neniamaniere okazu al sklavo de Dio! Tamen en vian koron eniris ja deziro al ŝi. Kaj por sklavoj de Dio tia deziro signifas pekon; ĉar malbona kaj terura deziro estas, por spirito ĉiurilate majesta kaj jam elprovita, se li malbonon deziras, kaj precipe por Hermas la sinreganta, kiu sindetenas de ĉiu malbona deziro kaj plenas je ĉiu simpleco kaj je granda senkulpo.

3: 1 Sed ne pro tio koleras Dio al vi, sed – por ke vi rebonigu vian domon, kiu sian devon preterlasis al la Sinjoro kaj al vi, iliaj gepatroj. Estante tro infandorlota, vi ne punis vian domon, sed vi lasis ilin terure koruptiĝi: kaj tial koleras al vi la Sinjoro; sed li sanigos ĉiujn malbonojn antaŭe okazintajn en via domo; ĉar pro iliaj pekoj kaj devopreterlasoj vi suferas malbonon en viaj negocoj vivtenaj.

2 Sed la kompatemo de l' Sinjoro kompatis pri vi kaj via domo, kaj li fortikigos vin, kaj li fondos vin firme en sia gloro. Sed vi nur ne estu malzorga, sed estu bonkuraĝa kaj fortikigu vian domon. Ĉar samkiel forĝisto, sian verkon martelante, elfaras la objekton kiun li deziras, samtiel ankaŭ la justa parolo, ĉiutage ripetata, povas venki ĉiun malbonon. Do ne ĉesigu korekti viajn infanojn; ĉar mi scias ke, se ili tutkore konvertiĝos, ili estos enskribitaj en la librojn de la vivo kune kun la sanktuloj.

Alvoko de la Eklezio

3 Post kiam ŝi finis tiujn parolojn, ŝi diris al mi:

Ĉu vi volas aŭdi min legi?

Kaj mi diris:

Jes, sinjorino.

Kaj ŝi diris al mi:

Aŭskultu kaj aŭdu la grandiozaĵojn de Dio.

Kaj mi aŭskultis funde kaj kun miro, sed mi ne povis ĝin memorteni. Ĉar ĉiuj ĉi paroloj estis timigaj, kaj homo ne kapablas elteni ilin. Sed la lastajn parolojn mi memortenis; ĉar tiuj estis utilaj kaj agrablaj:

4 Jen, la Dio de l' Fortoj, kiu per sia nevidebla forto kaj povo kaj per sia granda scio kreis ĉi mondon;

kaj kiu per sia glora volo ornamis je pompo la kreaĵon;

kaj kiu per sia forta parolo la ĉielon fiksis

kaj kiu starigis la teron sur la akvoj;

kaj kiu per siaj propraj saĝo kaj providenco fondis sian sanktan eklezion, kiun li ankaŭ benis,

– jen Tiu formovas la ĉielojn kaj la montojn kaj la montetojn kaj la marojn,

kaj ĉio fariĝos ebena por liaj elektitoj,

por ke la promeson, kiun Li promesis, Li plenumu al ili kun multa gloro

kaj ĝojo,
kiam ili gardos la ordonojn de Dio, kiujn ili ricevis en granda fido.

4: 1 Kiam ŝi finis la legadon kaj leviĝis de la seĝo, venis kvar junuloj kaj tiuj levis la seĝon kaj malaperis orienten.

2 Kaj ŝi vokis min, tuŝis mian bruston kaj diris al mi:

Ĉu plaĉis al vi mia legado?

Kaj mi diris al ŝi:

Sinjorino, la lasta ero plaĉis al mi, sed la antaŭa estis malfacila kaj dura.

Kaj ŝi diris al mi:

La lasta estas por la justuloj, la antaŭa por la popoloj² kaj la apostatoj.

3 Dum ŝi parolis kun mi, du homoj aperis kaj levis ŝin per la brakoj, kaj ili foriris, same kiel la seĝo, orienten. Kaj gaja ŝi foriris kaj dum ŝi estis forportata, ŝi diris al mi:

Agu virece, Hermas!

Dua vizio

Alia mistera libro

1 [5]: 1 Mi estis survoje al Kumo, en la sama periodo kiel lastjare, kaj dumvojaĝe mi rememoris pri la pasintjara vizio. Kaj denove spirito ekkaptis min kaj portis min al la sama loko kiel pasintjare. 2 Alveninte tien mi surgenuiĝis kaj komencis preĝi al la Sinjoro; mi laŭdis lian nomon, ĉar li kredis min inda kaj konigis al mi miajn antaŭajn pekojn.

3 Kiam mi leviĝis el mia preĝo, mi ekvidas antaŭ mi la saman maljunulinon kiel pasintjare; ŝi promenadis tie kaj legis en libreto. Ŝi diris al mi:

² Aŭ: gojoj, paganoj.

Ĉu vi povas sciigi tion al la elektitoj de Dio?

Mi diris al ŝi:

Sinjinoro, mi ne povas memorteni tiel multe; sed donu la libreton al mi, por ke mi ĝin kopiu.

Prenu, ŝi diris, kaj redonu ĝin al mi.

4 Mi ekprenis ĝin, kaj retiriĝis al certa loko de tiu kampo, kaj mi kopiis ĝin literon post litero; ĉar la silabojn mi ne povis kompreni. Kiam mi finkopiis la literojn de l' libreto, subite la libreto estis ŝirita el mia mano; sed mi ne vidis – de kiu.

Malkaŝiĝo de la skribita: pekoj de la infanoj; Alvoko al pento

2 [6]: 1 Post kiam dek kvin tagojn mi fastis kaj serioze preĝis al la Sinjoro, al mi malkaŝiĝis la scio pri la skribaĵo. Kaj tio estis ĝia enhavo:

2 Via semo, Hermas, pekis kontraŭ Dio, blasfemis kontraŭ la Sinjoro, kaj perfidis siajn parencojn en granda krimeco; ili nomiĝas perfiduloj de parencoj, sed ĉe sia perfido ili ne profitis el ĝi; al siaj pekoj ili ankoraŭ aldonis diboĉadon kaj senpripensajn fiaĵojn; kaj tiel la mezuro de ilia malbono pleniĝis.

3 Sciigu tiujn ĉi vortojn al ĉiuj viaj infanoj kaj al via edzino, kiu estos via fratino; ĉar ankaŭ ŝi ne regas la langon, sed pekas per ĝi. Sed aŭdante ĉi vortojn, ŝi regos ĝin kaj ricevos pardonon.

4 Post kiam tiujn vortojn vi estos sciiginta al ili, kiujn al mi ordonis la Sinjoro malkaŝi al vi, tiam al ili estos pardonitaj ĉiuj iliaj pekoj, kiujn antaŭe ili kulpis, kaj same al ĉiuj sanktuloj, kiuj pekis ĝis tiu ĉi tago, almenaŭ se el tuta sia koro ili pentofaris kaj forpelis el la koro ĉiun dubon. 5 Ĉar la Sinjoro ĵuris je sia propra gloro pri siaj elektitoj:

Se post fiksado de tiu ĉi tago ankoraŭ okazos peko, ili ne ricevos savon; ĉar la konvertiĝo por la justuloj havas limon. Pleniĝis la tagoj de konvertiĝo por ĉiuj sanktuloj: sed por la paganoj, estos <ebleco je> konvertiĝo ĝis la lasta tago.

6 Al la gvidantoj de la eklezio vi do diros, ke siajn vojojn ili rektigu en justeco, por ke en pleneco ili ricevu la promesojn kun multa gloro.

7 Restu do persiste farantaj justecon kaj ne dubu, por ke vi rilatadu kun la sanktaj anĝeloj.

Feliĉaj estas vi ĉiuj, kiuj eltenas la grandan elproviĝon, kiu venos, kaj kiuj ne neas sian propran vivon. 8 Ĉar la Sinjoro ĵuris je sia filo, ke kiuj neas sian Sinjoron perdos sian vivon, ankaŭ la homoj, kiuj neos lin en la venontaj tagoj; sed kiuj antaŭe lin neis, al tiuj li montris sian pardonon laŭ sia granda kompatemo.

Konsiloj al Hermas

3 [7]: 1 Vi, Hermas, ne gardu rankoron kontraŭ viaj infanoj, nek forlasu vian fratinton, por ke ili puriĝu de siaj antaŭaj pekoj. Ĉar se vi ne gardas rankoron, ili estos edukitaj per justa eduko. La rankoro estigas la morton. Sed vi, Hermas, eltenis grandajn suferojn en via persono pro la pekoj de via familio, ĉar vi ne zorgis pri ili. Sed vi malzorgis ilin kaj estis okupata pri viaj aĉaj aferoj. 2 Sed savis vin, ke vi ne defalis de la vivanta Dio, via sincero kaj via granda sinregado; tio savis vin, se vi eltenas, kaj savas ĉiujn, kiuj agas same kaj vivas en senmalico kaj simpleco. Tiuj venkos ĉiun malbonon kaj restos en eternan vivon. 3 Feliĉaj ĉiuj, kiuj faras justecon; ili ne pereos por eterne.

4 Sed al Maksimo vi diros:

Jen venos elproviĝo; se plaĉas, denove neu. La Sinjoro estas proksima al kiuj turniĝas al li, kiel estas skribite pri Eldad kaj Medad³, kiuj profetadis al la popolo en la dezerto.

Revelacio de la maljunulino

4 [8]: 1 Mi ricevis revelacion, gefratoj, dum mi dormis, de belaspekta junulo, kiu diris al mi:

La maljunulino, de kiu vi ricevis la libreton, kiu vi kredas, ke ŝi estas?

³ Nombroj 12:26.

Mi diris: La Sibila.

Vi eraras, li diris, ne estas ŝi. Estas la Eklezio, li diris.

Mi diris: Kial ŝi do estas maljuna?

Ĉar – li diris – ŝi estis kreita antaŭ ĉiuj. Tial ŝi estas maljuna, kaj pro ŝi estis kreita la mondo.

Nova vizio de la Eklezio

2 Poste mi ricevis vizion en mia hejmo.

Aperis la maljunulino, kaj ŝi demandis min, ĉu la libreton mi jam donis al la pliaĝuloj. Mi diris, ke ne.

Bone, ŝi diris – tion vi faris bone. Mi devas ankoraŭ ion aldoni. Kiam mi pretigos ĉiujn vortojn, ili diskoniĝos pere de vi al ĉiuj elektitoj. 3 Vi do skribos du libretojn, kaj unu vi sendos al Klemento kaj la alian al Grapta. Klemento sendos do al la urboj ekstere⁴, ĉar al li tio estos komisiita; sed Grapta admonos la vidvinojn kaj la orfojn. Sed vi legos ĝin en ĉi urbo inter la pliaĝuloj, kiuj regas la eklezion.

Tria vizio

Soleca loko sur kampo

1 [9]: 1Kion mi vidis, fratoj, estis la sekva: 2 Ofte fastinte, kaj petinte la Sinjoron, ke li montru al mi la revelacion, kiun li promesis montri al mi per la maljunulino, tiun saman nokton aperis ŝi al mi kaj diris:

Ĉar vi estas tiom avida kaj dezira scii ĉion, venu do al la agro, kie vi semis la grenon, kaj ĉirkaŭ la kvina horo mi aperos kaj montros, kion vi devas vidi.

3 Mi demandis ŝin:

⁴ Tre foren.

Sinjorino, sur kiun parton de la agro?

Kie vi volas, ŝi diris.

Mi elektis lokon belan kaj retiriĝintan; sed antaŭ ol mi parolis al ŝi por nomi la lokon, ŝi diris al mi:

Mi venos, kien vi volas.

4 Mi iris do, fratoj, al tiu agro, kaj kalkulis la horojn, kaj venis al la loko, kien mi indikis al ŝi veni, kaj mi vidas tie eburan benkon, kaj sur la benko kuŝis tola kuseno, kaj sur la kuseno estis tuko el plej fajna tolo.

5 Kiam ĉion ĉi mi vidis tie stari, kaj estis neniu en tiu loko, mi tre miris, kaj kvazaŭ tremo ekkaptis min, kaj miaj haroj ekstaris. Iaspeca timtremado ekkaptis min, ĉar mi estis tute sola. Kiam mi do rekaptis min kaj memoris pri la gloro de Dio, mi ekkuraĝis, mi genuiĝis kaj konfesis denove miajn pekojn al la Sinjoro, kiel jam antaŭe mi faris.

Revelacio de la Eklezio

6 Tiam aperis la maljunulino kun ses junuloj, kiujn ankaŭ antaŭe mi jam vidis, kaj ŝi ekstaris apud mi, kaj aŭskultis, kiel mi preĝas kaj konfesas miajn pekojn al la Sinjoro. Kaj tuŝante min ŝi diris:

Hermas, ĉesu paroli pri viaj pekoj; petu ankaŭ pri justeco, por kunporti parton ankaŭ al via familio.

7 Tiam ŝi levis la manon kaj kondukis min al la benko, kaj diris al la junuloj:

Iru, kaj konstruu.

8 Kaj kiam la junuloj foriris kaj ni fariĝis solaj, ŝi diris al mi:

Eksidu ĉi tie.

Mi diris al ŝi:

Sinjorino, lasu unue la pliaĝulojn eksidi.

Faru kiel mi diras, ŝi diris: sidiĝu.

9 Kiam mi do deziris sidiĝi dekstre, ŝi ne permesis tion, sed permane ŝi gestis, ke maldekstre mi sidiĝu. Kiam do mi pripensis tion, kaj estis ĉagrenita, ke mi ne povas sidi dekstre de ŝi, ŝi diris al mi:

Ĉu vin tio ĉagrenas, Hermas? Tiu loko dekstre de mi apartenas al aliaj, kiuj jam plaĉas al Dio kaj kiuj suferis pro la Nomo⁵. Sed vi delonge ne jam povas sidi inter tiuj; sed se vi restos ĉe via simpleco, restu tia, kaj vi sidos kun ili, kaj vi kaj ĉiuj, kiuj plenumis iliajn agojn, kaj eltenis, kion ankaŭ ili eltenis.

2 [10]: 1 Kion do, mi diris, tiuj eltenis?

Aŭskultu, ŝi diris: skurgojn, kaptitecojn, grandajn elproviĝojn, krucojn, sovaĝajn bestojn – kaj ĉion pro la Nomo. Tial dekstre de mi estas la flanko de la sankteco; por ili kaj por ĉiuj, kiuj suferos pro la Nomo. Por la ceteraj estas la maldekstra flanko. Sed por ambaŭ, kaj por kiuj sidas dekstre kaj por tiuj maldekstre, estos la samaj donoj kaj la samaj promesoj; sed nur tiuj sidas dekstre kaj havas certan gloron.

2 Vi ja deziras sidiĝi dekstre kun ili, sed viaj malperfektaĵoj estas multaj; tamen vi estos purigita de viaj malperfektaĵoj; kaj ĉiuj, kiuj ne estas dumensaj, estos purigitaj el ĉiuj siaj pekoj, ĝis la hodiaŭa tago.

La konstruado de la turo

3 Kiam ĉi tion ŝi diris, ŝi volis foriri; sed falante al ŝi antaŭ la piedojn, mi petis ŝin je la Sinjoro, ke ŝi montru al mi la vizion, kiun ŝi promesis.

4 Tiam denove ŝi prenis min ĉe la mano, levis min kaj sidigis min sur la benko maldekstre de ŝi; mem ŝi eksidis dekstre. Kaj levante certan brilan laton, ŝi diris al mi:

Ĉu vi vidas ion grandan?

Mi diris al ŝi:

⁵ De Dio aŭ Kristo.

SinJORino, nenion mi vidas.

Ŝi diris al mi:

Vi, jen – ĉu vi ne vidas antaŭ vi grandan turo konstruata super akvoj, el brilaj kvadrataj ŝtonoj?

5 En kvadrato estis konstruata tiu turo de la ses junuloj, kiuj envenis kun ŝi; kaj sennombraj aliaj amasoj da viroj alportis ŝtonojn, kelkaj el la marfundo, aliaj de la sek-tero, kaj transdonis tiujn al la junuloj. Kaj tiuj ekprenis kaj konstruis.

6 La ŝtonojn eltiritajn el la marfundo ĉiujn tiajn (kiaj ili estis) oni lokis en la konstruaĵon, ĉar ili estis tiel tajlitaj, ke ili adaptiĝis al kuniĝo kun la ceteraj ŝtonoj; kaj tiel ekzakte ili gluiĝis reciproke inter si, ke la kunigado ne estis videbla. Sed la konstruo de la turo aspektis kvazaŭ farita el unu ŝtono.

7 La ceterajn ŝtonojn, prenitajn de la tero – kelkajn oni forĵetis, aliajn oni metis en la konstruon, ree aliajn oni disrompis kaj forĵetis longe for de la turo. 8 Multaj aliaj ŝtonoj kuŝis en cirklo ĉirkaŭ la turo, kaj tiujn oni ne uzis ĉe la konstruo; kelkaj ja estis forpolviĝintaj, aliaj kun fendetoj, aliaj rompetitaj, aliaj blankaj kaj kurvaj, kiuj ne estis alĝustigeblaj por la konstruo. 9 Kaj mi vidis aliajn ŝtonojn, kiuj ĵetiĝis longe for de la turo, kaj kiuj venis al la vojo kaj ne restis sur la vojo, sed ruliĝis de la vojo tien, kie ne estis vojo; ankaŭ aliajn, kiuj falis en fajron kaj forbrulis, aliajn, kiuj falis apud akvo kaj ne povis ruliĝi en la akvon, kvankam ili deziris ruliĝi por veni al la akvo.

Klarigo pri la vizio

3 [11]: 1 Kiam tion ĉi ŝi montris al mi, ŝi volis foriri. Sed mi diris al ŝi:

SinJORino, kiom utilas al mi, ke tion mi vidis, se mi ne ekscias, kion signifas tiu afero?

Responde ŝi diris al mi:

Ruza vi estas, ho homo, ĉar vi deziras ekscii pri tiu turo.

Jes, mi diris: por ke al miaj fratoj mi sciigu, kaj ke ili fariĝu pli ĝojaj, kaj eksciante ĉion ĉi ili ekkonu la Sinjoron en ties granda gloro.

2 Ŝi diris:

Aŭskultos multaj; sed kelkaj, kiuj aŭskultos, ĝojos; aliaj ploros. Sed ankaŭ tiuj – se ili aŭskultos kaj konvertiĝos – povos mem ĝoji. Aŭdu do la parabolon de la turo: mi ĉion malkaŝos al vi. Kaj ne plu ĝenu min pri revelacioj, ĉar tiuj revelacioj havos finon; ĉar ili estas jam plenumitaj. Sed vi ne ĉesos peti revelaciojn; vi ja estas senhonta.

3 Nu, la turo, kiun vi vidas konstruata, estas mi, la Eklezio, kiu aperis al vi, nun kaj jam antaŭe. Demandu do, kion ajn vi deziras koncerne tiun turon, kaj mi malkaŝos ĝin al vi, por ke vi ĝoju kun la sanktuloj.

4 Mi diris:

SinJORINO, ĉar vi juĝis min inda malkaŝi tion al mi, malkaŝu ĝin do.

Kaj ŝi diris al mi:

Kion ajn estas eble malkaŝi al vi, estos malkaŝita. Estu tamen via koro kun Dio, kaj ne dubu pri kion vi vidas.

5 Mi demandis ŝin:

Kial la turo estas konstruita super akvoj, sinJORINO?

Mi jam antaŭ diris tion, kaj vere detale vi serĉas. Serĉante vi ja trovos la veron. – Aŭskultu do, kial super la akvoj estas konstruita la turo: ĉar de akvo via vivo estas savita kaj saviĝos; sed fundamentita estas la turo per la parolo de la ĉiopova kaj glora Nomo, fortigita de la nevidebla forto de la Sinjoro.

4 [12]: 1 Responde mi diris al ŝi:

SinJORINO, granda kaj mirinda estas tio. Sed la junuloj konstruantaj – kiuj estas, sinJORINO?

Tiuj estas la unue kreitaj sanktaj anĝeloj de Dio, al kiuj la Sinjoro konfidis tutan sian kreaĵon por kreskigi, konstrui kaj regi pri la tuta kreo. Pere de ili estos pretigita la konstruo de la turo.

2 Kaj kiuj estas la ceteraj, kiuj alportas la ŝtonojn?

Ankaŭ tiuj estas sanktaj anĝeloj de Dio; sed la ses estas pli superaj ol ili. La turokonstruo estos do pretigita, kaj ĉiuj kune ili ĝojegos ĉirkaŭ la turo kaj gloros Dion, ĉar estos preta la konstruo de la turo.

Kion simbolas la ŝtonoj

3 Mi demandis ŝin:

SinJORINO, mi dezirus scii pri la fino de la ŝtonoj kaj ilia forto, kia ĝi estas.

Ŝi responde diris al mi:

Ne, ke vi el ĉiuj homoj estus la plej inda, ke tio ĉi al vi riveligus; ĉar estas multaj antaŭ vi kaj pli bonaj ol vi, al kiuj devus reveligi tiu ĉi vizio; sed por ke la nomo de Dio estu glorata, al vi malkaŝigis kaj malkaŝigos – pro ĉiuj dubemuloj, ĉiuj kiuj daŭre hezitas en sia koro – ĉu tio estas aŭ ne estas. Diru al ili, ke ĉio tio estas vera, kaj ke estas nenio ekster tiu vero, sed ke ĉio ĉi estas fidinda kaj bone fundamentita.

5 [13]: 1 Kaj nun aŭdu pri la ŝtonoj, kiuj eniras en la konstruon. Tiuj kvadrataj kaj blankaj ŝtonoj, do, kiuj adaptiĝis al la kuniĝo kun ili – tiuj estas la apostoloj, la episkopoj, la instruistoj, la diakonoj, kiuj promenis laŭ la sankteco de Dio kaj episkopis aŭ diakonis sankte kaj inde por la elektitoj de Dio, kelkaj jam endormiĝintaj, sed aliaj ankoraŭ vivantaj; kaj ĉar ĉiam ili estis konkordaj reciproke, ili tenis pacon inter si kaj aŭskultis unu la alian. Tial iliaj kuniĝoj ĝustas en la konstruo de la turo.

2 Sed tiuj, kiuj estis eltiritaj el la marfundo kaj lokitaj en la konstruon, kaj kiuj adaptiĝis al la kuniĝoj de la ceteraj ŝtonoj, kiuj jam estis konstruitaj – kiuj estas?

Tiuj estas tiuj, kiuj suferis pro la Nomo de la Sinjoro.

3 Sed tiuj aliaj ŝtonoj, kiujn oni alportis de la sek-tero, mi ŝatus scii, sinjorino – kiuj estas?

Ŝi diris:

Tiuj, kiuj iras en la konstruon kaj tamen ne estas ĉarpentitaj – tiujn la Sinjoro aprobis, ĉar ili promenas en la ĝusteco de la Sinjoro kaj prave plenumas liajn ordonojn.

4 Sed tiuj, kiujn oni alportas kaj metas en la konstruon – kiuj estas?

Ili estas novuloj en la fido, kaj fidelaj. La anĝeloj avertis ilin, ke ili agu bone, ĉar estis trovita malbono en ili.

5 Kaj kiujn oni forĵetis kaj elmetis – kiuj estas?

Tiuj estas, kiuj pekis kaj deziras penti; tial oni ne forĵetis ilin for ekster la turo, ĉar se ili pentos, ili ankoraŭ utilos por la konstruo. Kiuj pentos, estos fortaj en la fido, kiam nun ili pentos, almenaŭ se ili nun pentos, dum la turo estas konstruata. Sed kiam pretas la konstruo, ne plu estos loko por ili, sed ili estos forĵetitaj. Nur tion ili havas avantaĝe, ke ili kuŝas apude al la turo.

6 [14]: 1 Sed ĉu vi ŝatus scii, kiuj disrompiĝis kaj estis forĵetitaj longe for de la turo? Tiuj estas la idoj de malvirto. Ili akceptis la fidon hipokrite, kaj neniu malvirto mankis al ili; tial ili ne saviĝos, ĉar ili ne estas uzeblaj por la konstruo, pro ilia malvirto. Tial oni rompis ilin kaj forĵetis ilin longe for sub kolero de la Sinjoro. Ĉar ili kolerigis lin.

2 Sed la ceteraj, kiujn grandnombre vi vidis kuŝi, kiuj ne iris en la konstruon – inter ili la forpolviĝintaj reprezentas tiujn, kiuj ekkonis la veron, sed ne restis en ĝi, nek gluiĝis al la sanktuloj; tial ili estas neuzebaj.

3 Tiuj kun fendetoj – kiuj estas?

Tiuj estas, kiuj inter si malakordas kaj reciproke ne tenas la pacon; aspekte ili ja gardas pacon, sed kiam ili disiras, ilia malvirto restas en ilia koro. De tio devenas la fendetoj, kiujn tiuj ŝtonoj havas.

4 La rompetitaj estas tiuj, kiuj ja ekfidis kaj grande partoprenas en la justeco, sed ili ankaŭ havas eron da maljusto; tial ili estas rompetitaj kaj ne perfektaj.

5 Sed la blandaj rondaj ŝtonoj, sinjorino, kiuj ne adaptiĝas al la konstruo – kiuj estas?

Responde ŝi diris al mi:

Kiel longe stulta vi estos kaj malsaĝa? Kial ĉion vi pridemandas kaj nenion jam komprenas? Tiuj estas homoj, kiuj havas la fidon, sed ankaŭ havas riĉon ĉi-mondan. Kiam venas elproviĝo, pro sia riĉo kaj siaj negocoj ili neas sian Sinjoron.

6 Kaj responde al ŝi mi diris:

Sinjorino, kiam ili do estos uzeblaj por la konstruo?

Kiam – ŝi diris – estos fortranĉita de ili la riĉo, kiu miskondukas ilin, tiam ili estos utilaj por Dio. Ĉar same kiel la ronda ŝtono, se ĝi ne estos prihakita kaj se ne parto defalos el ĝi, ĝi ne povas fariĝi kvadrata; tiel same ankaŭ la riĉuloj de ĉi mondo, se de ili la riĉo ne estos prihakita, ne povos fariĝi utilaj por la Sinjoro.

7 Unue eksciu pri vi mem: kiam riĉa vi estis, vi estis neuzebla, sed nun uzebla vi estas kaj utila por la vivo. – Fariĝu do utilaj por Dio; kaj ankaŭ vi estos uzata kiel unu de tiuj ŝtonoj.

7 [15]: 1 Sed la aliaj ŝtonoj, kiujn vi vidis esti forĵetataj longe for de la turo, fali sur la vojon aŭ ruliĝi de la vojo tien, kie ne estis vojo – tiuj estas, kiuj ja ekfidis, sed pro sia dubemo perdis la veran vojon; kredante, ke ili povos trovi pli bonan vojon, ili vagas kaj ĉirkaŭirante terure elĉerpiĝas en tiuj senvojejoj.

2 Sed kiuj falas en la fajron kaj forbrulas, tiuj estas la homoj, kiuj ribelis fine kontraŭ la vivanta Dio, kaj tamen en ilia koro ne jam ekvenis la penso penti, pro iliaj senbridaj deziroj kaj la perversaĵoj, kiujn ili plenumas.

3 La ceteraj, kiuj falis longe for de la akvoj, kaj ne povas ruliĝi al la akvo – ĉu vi ne volas scii, kiuj estas? Estas tiuj, kiuj aŭskultis la parolon kaj volas igi sin bapti al la nomo de la Sinjoro. Sed tiam, kiam ili ekmemoras pri la pureco de la vero, ili ree ŝanĝas la opinion kaj iras malantaŭen al siaj malbonaj deziroj.

4 Tiel do ŝi kompletigis la klarigon pri la turo.

5 Mi trude plu demandis ŝin: ĉu ĉiuj tiuj ŝtonoj, kiuj estis forigitaj kaj ne estis adapteblaj al la konstruo de la turo, ĉu por ili eblos pentofaro kaj ĉu ili trovos lokon en tiu ĉi turo?

Ili povas pentofari, ŝi diris, sed en tiu ĉi turo ili ne plu trovos lokon.

6 Tamen alian lokon ili trovos, multe malpli grandan, kaj tion nur post kiam ili estos turmentitaj kaj pentofaris pri la tagoj de siaj pekoj. Kaj pro tio ili ŝanĝiĝos, ĉar la parolon de la Justulo ili partoprenis. Kaj tiam okazos al ili, ke ili saviĝos el la turmentoj, se la malbonaj agoj, kiujn ili faris, venis en iliajn korojn. Sed se ili ne venas en iliajn korojn, pro la obstineco de ilia koro ili ne saviĝos.

Vizio pri la virtoj

8 [16]: 1 Kiam mi finis demandadi pri ĉi ĉio, ŝi diris al mi:

Ĉu vi dezirus vidi ion alian?

Kaj ĉar mi ekstreme volonte rigardas, mi estis tre ĝoja vidi tion.

2 Ŝi rigardis al mi, ridetis kaj diris:

Ĉu vi vidas sep virinojn ĉirkaŭ la turo?

Jes, sinjorino, mi diris.

Tiu turo laŭ ordono de la Sinjoro estas apogata de ili. 3 Nun aŭskultu, kion ili ĉiuj faras. La unua, la virino kun tiuj fortaj manoj, nomiĝas Fido; tra ŝi saviĝas la elektitoj de Dio. 4 La dua, tiu kun la zono, kaj kiu iom aspektas virece, nomiĝas Sinregado; ŝi estas filino de Fido. Kiu sekvas ŝin, estos feliĉa en la vivo, ĉar li detenos sin de ĉiuj malbonaj agoj,

kredante, ke se li detenos sin de ĉiuj malbonaj deziroj, li heredos eternan vivon.

5 Kaj la ceteraj, sinjorino, kiuj estas?

Ili estas filinoj unuj de la aliaj: ili nomiĝas jen Simpleco, jen tiu Scio, jen Senmalico, jen Respektindo, kaj jen Amo. Kiam vi faros ĉiujn agojn de ilia patrino, vi povos vivi.

6 Sinjorino, mi diris: mi ŝatus scii, kiu el ili havas kiun kapablon.

Aŭskultu, ŝi diris, kiujn kapablojn ili havas. 7 Iliaj kapabloj estas regataj unuj de la aliaj, kaj ili sekvas unuj la aliajn, kiel ili ankaŭ estiĝis. El Fido naskiĝis Sinregado, el Sinregado Simpleco, el Simpleco Senmalico, el Senmalico Respektindo, el Respektindo Scio, kaj el Scio Amo. Iliaj agoj estas puraj, respektindaj kaj Diaj. 8 Ĉar kiu ajn servos tiujn virinojn kaj havos la forton regi iliajn farojn, tiu loĝos en tiu turo kun la sanktuloj de Dio.

9 Tiam mi demandis pri la tempoj, ĉu la pleniĝo de la tempoj alvenis. Sed ŝi ekkriis kun granda voĉo:

Stulta viro, ĉu vi ne vidas, ke la turo estas ankoraŭ konstruata? Ĉar kiam prete konstruita estos la turo, venos la fino. Sed ĝi rapide estos konstruita. Do pri nenio plu demandu min; sufiĉa por vi estas tiu ĉi memorigo, kaj por la sanktuloj, kaj renovigo de viaj spiritoj.

Alvoko de la Eklezio al siaj infanoj

10 Sed tio ĉi ne estis revelaciita nur al vi mem, sed por ke al ĉiuj vi tion montru. 11 Post tri tagoj – ĉar antaŭ ĉio vi ĝin devas kompreni – unue mi ordonas al vi, Hermas, per ĉi tiuj vortoj, kiujn mi diros al vi: ke vi parolu ĉion ĉi tion al la oreloj de la sanktuloj, por ke aŭdante tion kaj farinte ĝin ili estu purigitaj el sia malbono, kaj vi kune kun ili.

9 [17]: 1 Aŭskultu min, miaj infanoj. Mi edukis vin en multa simpleco, senmalico kaj respektindo, per la kompatemo de la Sinjoro, kiu verŝis sur vin la justecon, por ke vi estu justigita kaj sanktigita el ĉia malbono kaj el ĉia malrekteco. Sed vi ne volas ĉesi pri via malrekteco. 2 Nun do vi

aŭskultu min, gardu reciproke pacon, respektu unu la alian, apogu unu la alian, kaj ne nur vi solaj partoprenu abunde en ĉio, kion kreis Dio, sed ankaŭ pludonu ĝin al tiuj, kiuj ne havas sufiĉe; 3 Ĉar kelkaj malfortigas sian karnon per sia multa manĝado kaj damaĝas sian karnon; sed kiuj ne havas kion manĝi, damaĝas sian karnon, ĉar ili ne havas sufiĉe da nutraĵo, kaj ilia korpo ruiniĝas. 4 Tiu malmodero estas damaĝa por vi, kiuj havas kaj kiuj ne pludonas al tiuj, kiuj ne havas sufiĉe. 5 Rigardu al la Juĝo, kiu venos. Vi, kiuj havas pli ol sufiĉe, serĉu tiujn, kiuj estas malsataj, tiel longe dum la turo ankoraŭ ne estos preta; ĉar post kiam pretiĝis la turo, vi deziros agi bone, sed ne plu estos eble. 6 Rigardu do vi, kiuj gloras pri via riĉo, ke tiuj en mizero ne lamentu, kaj ilia lamentado ne leviĝu al la Sinjoro, kaj ke kune kun viaj bonaĵoj vi ne restu ekskluditaj ekster la pordo de la turo.

7 Nun mi do diras al vi, kiuj estas regantoj en la eklezio kaj kiuj sidas en la unuaj seĝoj: ne estu kiel la sorĉistoj. Ĉar la sorĉistoj portas sian sorĉilon kun si en skatoloj, sed vi portas vian sorĉilon kaj vian venenon en via koro. 8 Vi estas malmoliĝintaj kaj vi ne volas purigi viajn korojn, kaj kunmiksi vian saĝon kun via pura koro, por ke vi ricevu kompaton de la granda Reĝo. 9 Rigardu do, miaj infanoj, ke tiuj viaj malkonkordoj ne rabu de vi la vivon. 10 Kiel vi volas instrui la elektitojn de la Sinjoro, se vi mem ne akceptis instruon? Instruu do unu la alian, kaj havu pacon inter vi, por ke ankaŭ mi staru ĝoja antaŭ la Patro, kaj prezentu al via Sinjoro raporton pri vi ĉiuj.

10 [18]: 1 Kiam ŝi finis paroli kun mi, la ses junuloj, kiuj estis konstruantaj, venis kaj forkondukis ŝin al la turo, kaj kvar aliaj levis la benkon kaj forportis ankaŭ ĝin al la turo. Iliajn vizaĝojn mi ne vidis, ĉar ili tenis ĝin forturnita.

La tri formoj de la Eklezio

2 Kaj kiam ŝi foriris, ŝin mi demandis, ke ŝi rivelacios al mi pri la tri formoj, en kiuj ŝi aperis al mi.

Responde ŝi diris al mi: Pri tiuj vi devas demandi iun alian, por ke ili estu revelaciitaj al vi.

3 Mi vidis ŝin, fratoj, en la unua vizio pasintjara kiel tre maljunan virinon, kiu sidis sur seĝo. 4 En la dua vizio ŝi havis pli junan vizaĝon, sed laŭ karno kaj hararo ŝi estis pli aĝa, kaj parolis al mi starante. Ŝi estis pli gaja ol antaŭe. 5 Sed ĉe la tria vizio ŝi sin montris tutece juna kaj tre bela, sed nur la hararon ŝi havis de maljunulino; ŝi estis ekstreme gaja, kaj sidis sur benko.

Nova vizio pri la Maljunulino

6 Mi estis treege trista, kun deziro ekscii tiun ĉi revelacion, kiam mi vidis la maljunulinon, kiu diris al mi en nokta vizio:

Ĉiu demando bezonas humilon; do fastu, kaj kion vi demandas, vi ricevos de la Sinjoro.

Revelacio pri la tri formoj de la Eklezio

7 Tial do unu tagon mi fastis, kaj en tiu sama nokto aperis al mi junulo, kaj li diris al mi:

Kial vi tuj petas revelacion en via preĝo? Atentu, ke vi ne damaĝu la karnon, demandante tro multe. 8 Por vi sufiĉas tiuj revelacioj. Ĉu vi povos vidi pli fortajn revelaciojn ol kiujn vi jam vidis?

9 Responde mi diris al li:

Sinjoro, nur tion mi demandas koncerne la tri formojn de la maljunulino: ke mi ricevu revelacion kompletan.

Responde li diris al mi:

Kiel longe vi restos senkomprenaj⁶? Ĉar via dubado faras, ke vi ne komprenas, kaj ke vian koron vi ne turnas al la Sinjoro.

10 Responde mi ree diris al li:

Jes, Sinjoro, de vi ni lernos ĉion pli akurate.

⁶ Subite pluralo.

11 [19]: 1 Aŭskultu – li diris – la klarigon, kiun vi petis pri tiuj tri formoj. 2 Ĉe la unua vizio, kial ŝi aperis al vi kiel maljunulino, kiu sidis sur seĝo? Ĉar via spirito estis maljuna kaj jam elĉerpita kaj ne plu havis forton, pro viaj malfortoj kaj duboj. 3 Ĉar kiel la maljunuloj, ja ne plu havante esperon rejuniĝi, nenion plu atendente krom endormiĝi, tiel ankaŭ vi, malfortigitaj de la aferoj ĉi-teraj, transdonis vin al la neglekto, kaj ne metis viajn zorgojn sur la Sinjoron; sed rompiĝis via menso, kaj vi maljuniĝis per via tristeco.

4 Kial ŝi do sidis sur seĝo, vi volis scii, sinjoro.

Ĉar ĉiu malfortiĝinto sidiĝas sur seĝo, pro sia malforto, por ke la malforto de lia korpo estu apogata. Jen la klarigo de la simboleco de la unua vizio.

12 [20]: 1 Sed ĉe la dua vizio vi vidis ŝin stari, kaj laŭaspekte ŝi ŝajnis pli juna kaj pli gaja ol antaŭe, sed laŭ karno kaj hararo ŝi estis maljuna. Aŭskultu – li diris – ankaŭ tiun parabolon. 2 Imagu maljunulon, kiu, pro malforto kaj malriĉo jam estas senespera pri si mem kaj nenion alian plu atendas krom la lasta tago de sia vivo; tiam subite heredaĵon li ricevas, kaj aŭdinte tion li vekiĝas, kaj tre ĝoja li vestas sin per forto, li ne plu restas kuŝanta, sed li stariĝas, kaj lia spirito, kiu estis rompita de la antaŭaj cirkonstancoj, rejuniĝas, kaj li ne plu sidas, sed kuraĝiĝas; tiel ankaŭ vi, kiam vi aŭdis la revelacion, kiun al vi malkaŝis la Sinjoro. 3 Ĉar li kompatis vin, kaj renovigis vian spiriton, kaj vi formetis viajn malsanojn, kaj forto venis al vi, kaj vi plifortiĝis en la Fido, kaj kiam la Sinjoro vidis, ke vi plifortigas vin, li ĝojis; kaj tial li montris al vi la konstruadon de la turo, kaj ankaŭ aliajn aferojn li montros al vi, se tutakore vi havos pacon en via mem.

13 [21]: 1 Sed ĉe la tria vizio vi vidis la saman virinon pli juna, bela kaj gaja, kaj bela estis ŝia formo. 2 Ĉar samkiel, se al homo trista venas mesaĝo ĝojiga, li tuj forgesas siajn antaŭajn ĉagrenojn kaj nenion alian plu akceptas ol tiun mesaĝon, kiun li aŭdis, kaj plifortigas sin per tio al la bono, kaj lia spirito renoviĝas per la ĝojo, kiun li ricevis; tiel ankaŭ vi ricevis renovigon de via spirito, vidante tiujn bonaĵojn. 3 Kaj kiam vi vidis ŝin sidi sur benko, forta estis ŝia pozicio; ĉar kvar piedojn havas la benko kaj staras fortike; ĉar la kosmo ja ripozas sur kvar elementoj.

4 Kiuj tute pentofaris, fariĝis junuloj kaj staros firme, ĉar tutkore ili pentofaris.

Jen vi havas la kompletan revelacion; nenion vi do plu demandu pri la revelacio, sed se ankoraŭ io mankas, tio revelaciigos al vi.

Kvara vizio

La besto kvarkolora

1 [22]: 1 Jen la kvara vizio, fratoj, kiun mi spektis dudek tagojn post la antaŭa vizio, kiu venis al mi, kiel tipo de la elproviĝo, kiu devas veni. 2 Mi iris al mia agro en Kampanio, ĉirkaŭ dek stadiojn for de la publika vojo; la loko estas facile atingebla. 3 Dum sola mi promenis, mi petis la Sinjoron, ke la revelaciojn kaj la viziojn, kiujn li montris al mi, li plenumu per sia sankta Eklezio, por ke li plifortigu min kaj donu pentemon al siaj sklavoj, kiuj stumblis, ke lia granda kaj glora Nomo estu glorata, ĉar li trovis min inda montri al mi siajn mirindaĵojn. 4 Kaj dum mi gloris kaj dankis lin, kvazaŭ eĥo de voĉo respondis al mi:

Ne dubu, Hermas.

Tiam mi komencis interne rezoni en mi mem, kaj diris:

Kial mi dubu, ĉar tiel firme starigis min la Sinjoro, kaj mi vidis aferojn tiel glorajn?

5 Kaj mi iom plu iris, fratoj, kaj jen mi vidas polvonubon kvazaŭ leviĝi al la ĉielo, kaj mi ekdiris en mi mem: Ja ne brutaro alproksimiĝas kaj suprenĵetas tiun polvon? Ĉar estis ĉirkaŭ unu stadio for de mi. 6 Sed kiam tiu polvonubo kreskis kaj kreskis, mi eksupozis, ke estas io Dia; la suno tiam iom ekbrilis, kaj jen mi vidas beston, iaspecan marmonstron, kaj el ĝia buŝo fajraj akridoj ekiras. La besto estis ĉirkaŭ 100 piedojn longa, kaj ĝi havis kapon kvazaŭ el ceramiko. 7 Kaj mi ekploris kaj petis la Sinjoron, ke li liberigu min de ĝi. Kaj mi memoris la parolon, kiun mi aŭdis: Ne dubu, Hermas. 8 Mi do vestis min en fido de la Sinjoro, fratoj, kaj memoris la grandaĵojn, kiujn li instruis, ekkuraĝis kaj prezentis min al la besto. La besto tiel alrapidis, ke ĝi povus ruinigi urbon. 9 Mi do

alproksimiĝas apuden, kaj tiu ega monstro sin elstreĉis surplanke, sed ĝi nur eligis la langon, kaj tute ne moviĝis ĝis mi pasis ĝin. 10 La besto havis sur la kapo kvar kolorojn: jen nigra, poste fajreca kaj sangokolora, poste ora, poste blanka.

La signifo

2 [23]: 1 Post kiam la beston mi pasis, kaj ĉirkaŭ 30 piedojn plu paŝis, jen alvenas min virgulino ornamita kvazaŭ ekironta el la nuptoĉambro, vestita tute en blanko kaj kun blankaj sandaloj, kun velo ĝis la frunto, surkape ŝi havis turbanon; ankaŭ la hararon ŝi havis blanka. 2 Mi komprenis el la antaŭaj vizioj, ke estas la Eklezio, kaj fariĝis pli gaja. Ŝi salutis min kaj diris:

Saluton, homo.

Kaj ankaŭ mi salutis ŝin:

Sinjorino, saluton.

3 Kaj responde al mi ŝi diris:

Ĉu nenio vin renkontis?

Mi diris al ŝi:

Sinjorino, tiel granda besto, ke ĝi povus neniigi popolojn; sed per la povo de la Sinjoro kaj lia kompatemo mi eskapis ĝin.

4 Bele vi eskapis – ŝi diris – ĉar vi metis vian zorgon sur Dion, kaj malfermis vian koron al la Sinjoro, kredante, ke vin povos savi nenio, krom lia granda kaj glora Nomo. Tial la Sinjoro sendis sian anĝelon, kiu staras super la bestoj, kaj kies nomo estas Thegri, kaj tiu sigelis lian buŝon, por ke ĝi ne damaĝu vin. Vi eskapis grandan elproviĝon pere de via fido, kaj ĉar vidante tiel grandan beston vi ne dubis; 5 iru do, kaj klarigu al la elektitoj de la Sinjoro liajn grandaĵojn, kaj diru al ili, ke tiu besto estas antaŭtipo de la granda elproviĝo, kiu venos. Se vi prepariĝos kaj absolute tutkore pentofaros al la Sinjoro, vi povos eskapi ĝin, se via koro fariĝas pura kaj neriproĉebla, kaj se la ceterajn tagojn de via vivo vi

servos al la Sinjoro senerare. Metu do sur la Sinjoron viajn zorgojn kaj li ordigos ilin. 6 Fidu do la Sinjoron, vi dubantoj, ĉar ĉion li povas: forturni sian koleron de vi, kaj sendi al vi siajn skurĝojn, se vi restos dubantoj. Ve al vi, kiuj aŭdas tiujn ĉi parolojn sed ne obeas; estus pli bone por vi, se vi ne estus naskitaj.

La simboleco de la koloroj de la besto

3 [24]: 1 Mi demandis ŝin pri la kvar koloroj, kiujn havis la besto sur la kapo. Responde ŝi diris al mi:

Denove vi estas scivola pri tiaj aferoj.

Jes, sinjorino, mi diris; sciigu al mi, kio estas?

2 Aŭskultu – ŝi diris –: tiu nigro estas ĉi tiu kosmo, en kiu vi vivas; 3 kaj tiu koloro fajreca kaj sanga montras, ke ĉi tiu mondo devas pereii en sango kaj fajro; 4 la ora parto estas vi, kiuj fuĝis el ĉi tiu kosmo. Ĉar kiel la oro estas elprovata per fajro kaj montriĝas utila, tiel ankaŭ vi estas elprovataj, vi kiuj loĝas en ĝi. Vi kiuj eltenas kaj pasas per la fajro estos purigitaj. Ĉar kiel la oro demetas sian skorion, tiel ankaŭ vi demetas ĉiun ĉagrenon kaj ĝemadon kaj fariĝas puraj kaj estos utilaj por la konstruo de la turo.

5 Sed la blanka parto estas la venonta jarcento, en kiu loĝos la elektitoj de Dio, ĉar senmakulaj kaj puraj estos tiuj, kiujn Dio elektis por la eterna vivo.

6 Tial, do, vi ne ĉesu paroli en la orelojn de la sanktuloj. Jen nun vi havas la simbolecon de la venonta granda elproviĝo. Sed se vi deziras, estos nenio. Memoru pri la antaŭe skribita.

7 Tion ĉi dirinte, ŝi foriris, kaj mi ne vidis, en kiun direkton ŝi foriris. Ĉar fariĝis bruoj; kaj mi retro turnis min, timante, ke alvenas la besto.

Kvina vizio (aŭ Revelacio)

Apero de la Paŝtisto

1 [25]: 1 Kiam mi estis preĝanta en mia domo, sur mia lito, envenis iu viro glora laŭ aspekto, kun paŝtista vestaĵo, kaj kun blanka felo volvita ĉirkaŭ si, kun blanka sako ĉe la ŝultro kaj bastono en la mano. Kaj li salutis min, kaj mi resalutis lin. 2 Kaj tuj li eksidis ĉe mia flanko kaj diris al mi:

Mi estas sendita de la plej sankta anĝelo, por loĝi kun vi la ceterajn tagojn de via vivo.

3 Mi supozis, ke li venis elprovi min, kaj mi diris al li:

Vi do kiu estas? Ĉar mi scias – mi diris –, al kiu mi estas konfidita.

Kaj li diris al mi:

Ĉu vi ne rekonas min?

Ne, mi diris.

Mi – li diris –, mi estas la Paŝtisto, al kiu vi estis konfidita.

4 Dum li ankoraŭ parolis, lia aspekto ŝanĝiĝis, kaj mi rekonis lin, ke estas li, al kiu mi estis konfidita, kaj tuj mi konfuziĝis, timo ekkaptis min, kaj mi tuta skuiĝis de ĉagreno, ĉar tiel stulte kaj sensaĝe mi respondis al li.

5 Sed responde li diris al mi:

Ne konfuziĝu, sed plifortigu vin en miaj Ordonoj, kiujn mi taskigos al vi. Ĉar – li diris – por tio mi estis sendita, por ke mi montru denove, kion antaŭe vi vidis, sed nur la ĉefajn punktojn, kiuj estas utilaj al vi.

Tutunue vi skribu miajn Ordonojn kaj la Parabolojn; kaj la ceterajn aferojn vi skribu tiel, kiel mi montros al vi. Tiucele – li diris – mi ordonas al vi unue skribi la Ordonojn kaj la Parabolojn, por ke vi povu legi ilin senprezare kaj ke vi gardu ilin.

6 Mi do skribis la Ordonojn kaj la Parabolojn, kiel estis ordonite al mi.

7 Se vi do, aŭdante ilin, gardas ilin kaj promenas en ili kaj plenumas ilin kun pura koro, vi ricevos de la Sinjoro ĉion, kion li promesis al vi; sed se vi, aŭdante ilin, ne pentofaros, sed aldonas al viaj pekoj, vi ricevos de la Sinjoro la malon.

8 Ĉion ĉi tion skribi ordonis al mi la Paŝtisto, la anĝelo de la pentofaro.

La ordonoj

Unua Ordono

Fido kaj timo antaŭ Dio

1 [26]: 1 Plej-unue vi kredis, ke unu estas la Dio, kiu kreis kaj ordigis ĉion, kaj kiu faris ĉion el la ne-estado en estado, kaj kiu ĉion ampleksas, mem ne estante ampleksata. 2 Due fidu Lin, kaj timu antaŭ Li, kaj en tiu timo estu kontenta. Tenu tion, kaj ĉiun malbonon vi forĵetos de vi, kaj vi vestu vin en la tuta virto de justeco, kaj vi vivos antaŭ Dio, se tiun ĉi ordonon vi gardos.

Dua Ordono

Simpleco kaj senmalico; kontraŭ kalumniado

1 [27]: 1 Li diris al mi:

Gardu simplecon kaj estu senmalica, kaj vi estos kiel etaj infanoj, kiuj ne konas la malbonon, kiu pereigas la vivon de la homoj. 2 Unue vi kalumniu kontraŭ neniu, nek plezure aŭskultu kalumnianton; alie, aŭskultante ankaŭ vi estos kulpa pri la peko de la kalumnianto, se la kalumnion vi fidas, kiun vi aŭskultas. Ĉar fidante ĝin ankaŭ vi havos ian malemon kontraŭ via frato. Tiel vi estos kulpa pri la peko de la kalumnianto. 3 Kalumnio estas malbona; ĝi estas demono senripoza, neniam en paco, sed ĉiam hejme inter malkonkordoj. Do detenu vin de ĝi, kaj ĉie vi vivos harmonie kun ĉiuj.

La almozo

4 Vestu vin, male, en respekto, en kiu nenio kaŭzas skandalon, sed ĉio estas glata kaj gaja. Faru la bonon, kaj el viaj klopodoj, kiujn Dio donis al vi, al ĉiuj malriĉuloj vi simple donu, ne hezitante, al kiu vi donu, aŭ al kiu ne. Ĉar Dio deziras, ke el liaj propraj donacoj oni donu al ĉiuj. 5 Tiuj do, kiuj tion ricevas, devas doni konton al Dio, kial ili ricevis ĝin kaj

tiucele; ĉar kiuj ricevas en premateco, ne estos juĝitaj, sed kiuj ricevas pro falsaj kialoj, estos punitaj. 6 Tiu kiu donas, estas senkulpa; ĉar li ja ricevis de la Sinjoro tiun servon por plenumi, li do simple plenumis ĝin, sen prijuĝado, al kiu doni aŭ al kiu ne. Tiu ĉi servo, se simple plenumita, estas glora ĉe Dio. Do kiu simple plenumas tiun servon, vivos antaŭ Dio.

7 Gardu do tiujn ĉi ordonojn, kiel mi diris al vi, por ke via pentofaro kaj tiu de via domo troviĝu sincera, kaj via koro pura kaj senmakula.

Tria Ordono

Kontraŭ la mensogo

1 [28]: 1 Denove li parolis al mi:

Amu la veron, kaj nenio krom vero eliru el via buŝo, por ke la Spirito, kiun Dio igas loĝi en tiu ĉi karno, montriĝu vera ĉe ĉiuj homoj, kaj ke tiel la Dio, kiu loĝas en vi, estu glorata. Ĉar la Sinjoro estas vera en ĉiu parolo, kaj ĉe li estas nenio mensogo. 2 La mensogantoj do ofendas la Sinjoron kaj prirabas lin, ĉar ili ne redonas al li la deponon, kiun ili akceptis. Ĉar de li ili ricevis senmensogan spiriton. Se tiun ili redonas mensogema, ili malhonoris la ordonon de la Sinjoro kaj fariĝis rabistoj.

3 Kiam tion mi aŭdis, mi ege ekploris. Sed kiam li vidis min plori, li diris:

Kial vi ploras?

Ĉar, ho sinjoro – mi diris –, ĉar mi ne scias, ĉu mi povas saviĝi.

Kial? – li diris.

Ĉar neniam, sinjoro – mi diris: neniam en mia vivo nur veron mi diris, sed ĉiam ruze mi parolis al ĉiuj homoj, kaj vestis miajn trompaĵojn kvazaŭ veron antaŭ ĉiuj homoj; kaj neniam iu ajn kontraŭparolis al mi, sed oni kredis min je mia parolo. Kiel do, sinjoro – mi diris –, se tion mi faris, kiel mi do povas vivi?

4 Ĉe tio – li diris – vi prave kaj ĝuste pensas; ĉar kiel sklavo de Dio vi devus promeni en vero, kaj neniu konscio pri malbono devus kunloĝi kun la spirito de la vero, nek tristigi tiun spiriton sanktan kaj veran.

Mi diris: Neniam, sinjoro, mi aŭdis vortojn tiel klarajn kiel ĉi tiuj.

5 Do nun tiujn vi aŭdas, li diris. Gardu ilin, por ke la antaŭaj falsaĵoj, kiujn vi parolis ĉe viaj negocoj, fariĝu kredindaj, almenaŭ se nun tiuj ĉi montriĝis kredindaj; ĉar ili povos fariĝi fidindaj. Se tiujn ĉi vi gardos, kaj ekde nun nur plenan veron vi parolos, vi povos certigi al vi la vivon. Kaj ĉiu, kiu aŭskultas tiun ĉi ordonon kaj detenas sin de malbona mensogado, tiu vivos antaŭ Dio.

Kvara Ordono

La ĉasto

1 [29]: 1 Mi ordonas vin, li diris, gardi la ĉaston, kaj ne lasu eĉ penson eniri en vian koron pri edzino aliula aŭ pri ajna malĉasto aŭ pri similaj malbonaj agoj. Ĉar se tion vi faras, vi kulpas grandan pekon. Sed memoru ĉiam pri via propra edzino, kaj vi neniam pekos. 2 Ĉar se tiu deziro ekestas en via koro, vi pekos; kaj se <estos> aliaj same malbonaj aferoj, vi plenumos pekon, ĉar tiu deziro en sklavo de Dio estas granda peko; kaj se iu plenumas tian malbonan aferon, li faras la morton por si mem. 3 Rigardu do vi: detenu vin de tiu deziro; ĉar kie loĝas sankteco, tie en koro de justulo ne eniru krimeco.

Konscienciaĵo pri adulta edzino

4 Mi diris al li:

Sinjoro, permesu, ke mi starigu kelkajn demandojn al vi.

Diru do, li petis.

Sinjoro – mi diris – se edzinon iu havas, kiu kredas je la Sinjoro, kaj se ŝin li trafas freŝafare ĉe adulto, ĉu tiam la viro, kiu loĝas kun ŝi, kulpas pekon?

5 Dum li estas senscia pri tio – li diris – li ne pekis. Sed se la edzo scias pri ŝia peko, kaj la virino ne pentofaras, sed restas en sia adulto, kaj vivas plu kun sia edzo, li fariĝas kunkulpa pri ŝia peko, kaj partoprenas en ŝia adulto.

6 Kion do faru la edzo, sinjoro – mi demandis –, se la virino restas ĉe sia pasio?

Li divorcu ŝin – li diris – kaj la edzo restu sola; sed se post la divorco li edziĝas al alia, ankaŭ li adultas.

7 Kaj, sinjoro – mi diris –, se post la divorco tiu virino pentofaras kaj deziras reveni al sia edzo, ĉu tiam ŝi ne estu reakceptita?

8 Certe – li diris –, se la edzo ne reakceptas ŝin, li misfaras kaj grave pekas; ĉar ja necesas reakcepti la pekinton kaj pentofarinton; sed tamen ne multfoje; por la sklavoj de Dio estas nur unufoja pento. Tial do, pro tiu pentofaro la viro devas ne ree edziĝi. Tiu regulo nepras same por virino kaj viro.

9 Ne nur – li diris – estas adulto, se iu malpurigas sian karnon, sed ankaŭ se iu agas simile kiel la paganoj, li adultas⁷. Tiel do, se iu en similaj agoj persistas kaj ne pentofaras, detenu vin de li kaj ne kunvivu kun li; alie ankaŭ vi estas kunkulpa pri lia peko. 10 Tial do ni ordonis al vi, ke vi restu sola, ĉu viro ĉu virino; ĉar en similaj aferoj povas esti pentofaro. 11 Sed – li finis – mi do ne donas senkulpigon, por ke tiu ĉi afero tiel finiĝu; sed por ke la pekinto ne plu peku. Sed koncerne liajn antaŭajn pekojn, ja estas nur unu, kiu povas sanigi: Tiu ja estas tiu, kiu havas potencon pri ĉio.

Duboj pri la pentofaro

2 [30]: 1 Mi denove starigis demandon kaj diris:

Ĉar la Sinjoro opiniis min inda, ke vi ĉiam loĝu kun mi, permesu, ke mi diru ankoraŭ kelkajn vortojn, ĉar nenion mi komprenas, kaj mia koro

⁷ Ĉi-kuntekste do supozeble: se iu prenas novan partneron.

estas stultigita de miaj antaŭaj agoj; igu min do kompreni, ĉar ege stulta mi estas kaj tute nenion mi komprenas.

2 Responde li diris al mi:

Mi estas taskigita pri la pentofaro – li diris – kaj al ĉiuj, kiuj pentofaras, mi donas komprenon. Aŭ ĉu ne ŝajnas al vi – li diris –, ke pentofari estas speco de kompreno? Jes – li diris – pentofaro estas granda kompreno. Ĉar la pekinto komprenas, ke li faris malbonon antaŭ la Sinjoro, kaj en lian koron eniras la ago, kiun li faris, kaj li ekpentas kaj ne plu faras la malbonon, sed bonon li faras abunde, kaj li humiligas sian animon kaj torturas ĝin, ĉar ĝi pekis. Vi do vidas, ke pentofaro estas granda kompreno.

3 Tial do, sinjoro, – mi diris – pri ĉio vin mi detale demandas; unue, ĉar pekulo mi estas, due, por ke mi sciu, kiajn agojn mi faru por vivi, ĉar multaj estas miaj pekoj kaj buntaj.

4 Vi vivos – li diris –, se vi gardos miajn ordonojn kaj promenos en ili; kaj ĉiu, kiu aŭskultas tiujn ordonojn kaj gardas ilin, vivos antaŭ Dio.

3 [31]: 1 Tamen – mi diris –, sinjoro, mi plu starigos demandojn al vi.

Demandu, li diris.

Sinjoro – mi diris –, mi aŭdis de certaj instruistoj, ke alia pentofaro ne estas krom tiu, kiam en la akvon ni descendis kaj ricevis pardonon pri niaj antaŭaj pekoj.⁸

2 Li diris al mi: Prave vi aŭdis; ĉar tiel statas. Ĉar kiu ricevis pardonon pri la pekoj, ne plu peku, sed vivu en sankteco.

3 Sed ĉar vi ja demandis tiel detale, ankaŭ tion mi klarigos al vi, por ne doni kialon por tiuj, kiuj poste kredos aŭ kiuj nun kredas je la Sinjoro. Ĉar kiuj jam kredas aŭ kiuj poste kredos, ne havas pentofaron pri siaj pekoj, sed pardonon ili havas pri siaj antaŭaj pekoj. 4 Por tiuj, kiuj estis

⁸ La bapto purigas de pekoj, estis la instruo. Tial pluraj homoj siatempe prokrastis sian baptiĝon, ĉar la bapto aŭtomate ja forlavas ĉiujn pekojn. Do kial ne ankoraŭ iom peki? Temas pri la eblo pentofari, se post la bapto oni ree pekas.

vokitaj antaŭ tiuj ĉi tagoj, la Sinjoro starigis pentofaron. Ĉar la Sinjoro, kiu ja konas la korojn kaj ĉion antaŭvidas, ekkonis la malforton de la homoj kaj la komplikaĵojn de la diablo, ĉar tiu damaĝos al la sklavoj de Dio kaj traktos ilin fie; 5 estante do kompatema, la Sinjoro kompatis pri sia kreaĵo kaj fiksis tiun pentofaron, kaj al mi li donis regi pri tiu pentofaro. 6 Sed al vi mi nun diras – li diris –, ke post tiu granda kaj sankta vokiĝo, se iu elprovite de la diablo pekas, tiam nur unu <eblan> pentofaron li havas. Sed se iu daŭre pekas kaj ree pentofaras, por tiu homo ne estas senchave; ĉar li vivos malfacile.

7 Mi diris al li:

Mi ree estis vivigita, ĉar tion ĉi tiel precize mi aŭdis de vi: ĉar mi scias, ke, se mi ne plu aldonas al miaj pekoj, mi saviĝos.

Vi saviĝos – li diris – kaj ĉiuj, kiuj faros tiajn aferojn.

Nova konscienciaĵo

4 [32]: 1 Denove mi starigis demandon, dirante:

Sinjoro, ĉar unu fojon vi jam toleris min, bonvolu ankaŭ tion klarigi al mi.

Diru – li diris.

Se virino, sinjoro – mi diris –, aŭ se viro endormiĝas⁹, kaj iu elinter ili ree nuptas, ĉu tiam la nuptanto pekas?

2 Li ne pekas – li diris –, sed se li restas sola, li ricevas pli grandan honoron al si kaj pli grandan gloron ĉe la Sinjoro; sed ankaŭ se li nuptas, li ne pekas.

3 Servu la purecon kaj sanktecon, kaj vi vivos antaŭ Dio. Ĉion tion, kion mi diras aŭ poste diros, gardu tion depost nun, t. e. depost la tago, en kiu vi estis konfidita al mi, kaj mi loĝos en via domo. 4 Por ĉiuj antaŭaj viaj mispaŝoj estos pardono, se miajn ordonojn vi gardos; kaj por ĉiuj estos pardono, se miajn ordonojn ili gardos kaj promenos en tiu pureco.

⁹ Eŭfemismo por morti.

Kvina Ordono

La bono de la pacienco

1 [33]: 1 Estu pacienca – li diris – kaj prudenta, kaj vi havos potencon super ĉiuj malbonaj agoj kaj realigos kompletan justecon. 2 Ĉar se vi estas pacienca, la sankta Spirito, kiu en vi loĝas, estos pura, ne obskurigita de alia spirito malbona, sed loĝante en vasta spaco ĝi ĝojos kaj gajhumuros kun la ujo, en kiu li troviĝas, kaj ĝi servos al Dio kun plezuro, ĉar sian floradon ĝi havas en si mem.

3 Sed se venas kolereksplodo, la sankta Spirito, estante delikata, tuj sin sentas premita, ne plu havante sufiĉe da spaco, kaj serĉas retiriĝi el la loko; ĉar ĝi sentas sin sufokita de la malbona spirito, ne havante plu sufiĉe da spaco por servi al la Sinjoro, kiel ĝi deziras, kaj estas ja makulita de tiu flamiĝemo. Ĉar la Sinjoro loĝas en la pacienco, kaj en la kolereksplodoj <loĝas> la diablo.

4 Estas do malkonvene, ke ambaŭ spiritoj loĝu kune, kaj malbone por la homo, en kiu ili kunloĝus.

5 Se iom da absinto oni verŝas en keramikan poton da mielo, ĉu ne la tuta mielo perdiĝas, kaj tiom da mielo pereas per ekstreme malmulte da absinto? Ĉar ĝi neniigas la dolĉecon de la mielo, kaj por la posedanto ĝi ne plu havas la saman ĉarmon, ĉar ĝi estis amarigita kaj perdis la utilon. Se do en la mielon tiu absinto ne estus enigita, dolĉa montriĝus la mielo, kaj utila por sia posedanto.

6 Vi do vidas, ke la pacienco estas pli dolĉa ol la mielo kaj utila por la Sinjoro, kaj Tiu loĝas en ĝi. Sed koleriĝemo estas amara kaj malutila. Se do koleriĝemo miksiĝas kun pacienco, malpuriĝas la pacienco, kaj ne plu utilas ĉe Dio la homa preĝado.

7 Sinjoro – mi diris – mi dezirus bone kompreni, kiel funkcias la koleriĝemo, por gardi min kontraŭ ĝi.

Ho certe – li diris – se vi ne gardas vin kontraŭ ĝi – vi kaj via domo –, vi perdas ĉiun vian esperon. Sed atentu kontraŭ ĝi; ĉar mi ja estas kun vi.

Kaj ĉiuj homoj detenu sin de ĝi, ĉiuj kiuj tutkore pentofaras; ĉar kun ili mi ja estos kaj mi konservos ilin. Ili ja ĉiuj estis justigitaj de la plej sankta anĝelo.

2 [34]: 1 Nun aŭdu – li diris – la funkciadon de la koleriĝemo, kiel damaĝa ĝi estas, kaj kiel la sklavojn de Dio per sia funkciado ĝi renversas, kaj kiel ĝi igas ilin forvagi de la justeco. Ĝi ne devojigas tiujn, kiuj staras plene en la fido, kaj ĝi ankaŭ ne povas tiel efiki al ili, ĉar la forto de Dio estas kun tiuj; sed ĝi ja povas devojigi tiujn, kiuj estas necertaj kaj dubantaj. 2 Ĉar kiam ĝi vidas tiajn homojn en prospero, ĝi enŝteliĝas en iliajn korojn, kaj pro plej eta afero tiu viro aŭ virino fariĝas amara pro ĉi-mondaj aferoj, ĉu pro manĝaĵoj aŭ alia negravaĵo, pro iu amiko, aŭ pro iu donaco aŭ ricevo de donaco, pro tiaspecaj malsaĝaĵoj. Ĉar ĉio tio estas malsaĝaĵoj vanaj kaj negravaj por la sklavoj de Dio.

3 Sed la pacienco, male, estas granda kaj forta, kaj posedas fortikecon kaj robuston, kaj prosperas en vastaj spacoj, estas gaja, jubila kaj senzorga, glorante la Sinjoron en ĉiu momento, ĉar en si ĝi enhavas nenion amaran, sed restas daŭre dolĉa kaj kvieta. Ĉi tiu pacienco loĝas kun tiuj, kies fido estas perfekta.

4 Aliflanke la malpacienco unue estas malsaĝa, leĝera kaj sensenca. Krome el la sensenco kreskas amaro, el la amaro kolero, el la kolero kolerego, el la kolerego venĝemo; fine, ĉar tiu venĝemo konsistas el tiaj malbonaĵoj, ĝi fariĝas en granda kaj nekuracebla peko. 5 Ĉar kiam tiuj spiritoj kunloĝas en unu ujo, kie ankaŭ la sankta Spirito loĝas, tiu ujo ne povas enhavi ĉion, sed ĝi transbordiĝas. 6 Ĉar la delikata Spirito ne kutimas loĝi kun malbona spirito, nek kun malmoleco, ĝi retiriĝas de tia homo kaj serĉas ekloĝi kun afableco kaj kvieto.

7 Tiam, do, kiam ĝi retiriĝis de tiu homo, en kiu ĝi loĝas, tiu homo fariĝas sena de justa Spirito, kaj estonte, plenigate de malbonaj spiritoj, li fariĝas nestabila en tuta sia agado, kuntrenate tien kaj reen de la malbonaj spiritoj, kaj li iĝas komplete blinda je bona celado. Tiel do okazas al ĉiuj kolerigemuloj.

8 Retenu vin do de koleriĝemo, tiu plej malbona spirito; vestu vin en pacienco kaj rezistu al kolero kaj amaro, kaj vi trovos vin kune kun sankteco, kiun amas la Sinjoro.

Atentu, ke vi neniam neglektu lian ordonon; ĉar se vi regas tiun ordonon, vi gardos ankaŭ la ceterajn ordonojn, kiujn poste mi ordonos al vi. Estu do forta en ili, kaj fortikigu vin, kaj ĉiuj, kiuj deziras promeni en ili, ankaŭ fortikigu sin.

Sesa Ordono

La ebena vojo

1 [35]: 1 Mi ordonis vin – li diris – en mia unua Ordono, ke vi gardu la fidon kaj la timon kaj la sinregadon.

Jes, sinjoro, mi diris.

Sed nun – li diris – mi deziras montri al vi ankaŭ iliajn povojn, por ke vi komprenu, kiu el ili havas kiun povon kaj kiun efikon. Duoblaj ja estas iliaj efikoj: tiuj troviĝas en justo kaj en maljusto. 2 Tial vi do fidu la juston, sed la maljuston vi ne fidu; ĉar rekta estas la vojo de la justo, sed tiu de la maljusto malrekta. Sed vi iru sur la rekta kaj ebena vojo, kaj lasu la malrektan. 3 Ĉar la malrekta vojo ne havas padojn, sed netrairejojn kaj stumbligajn ŝtonojn, kaj estas kruda kaj danĝera por la vojaĝantoj. 4 Sed kiuj iras sur la rekta vojo, promenas ebene kaj sen stumbloj; ĉar ĝi estas nek kruda nek dornoplena. Vi vidas do, ke estas tre konvene promeni tiuvoje.

5 Plaĉas al mi, sinjoro – mi diris – promeni tiuvoje.

Vi promenos tie – li diris –, kaj ĉiu, kiu plenkore strebas al la Sinjoro, promenos laŭ tiu vojo.

La du anĝeloj de la homo

2 [36]: 1 Nun aŭdu – li diris – pri la fido. Du anĝelojn ja havas ĉiu homo, unu de la justeco, unu de la malbono.

2 Kiel, sinjoro – mi diris – iliajn funkciadojn mi do komprenos, se ambaŭ loĝas kun mi?

3 Aŭskultu – li diris – kaj ekkomprenu. La anĝelo de la justeco estas delikata, timida, milda kaj kvieta. Kiam do tiu eniras en vian koron, li tuj ekparolas kun vi pri justeco, pri pureco, pri sankteco, pri sinregado kaj pri ĉiuspeca bona ago kaj pri ĉiu glora virto. Kiam ĉio ĉi do eniras en vian koron, vi sciu, ke la anĝelo de justeco estas kun vi. Ĉar tio estas la agoj de la anĝelo de justeco. Lin vi fidu kaj liajn agojn.

4 Sed nun ankaŭ vidu la agojn de la anĝelo de malbono. Tut-unue li estas koleriĝema, amara kaj sensenca, kaj liaj agoj malbonaj; ili renversas la sklavojn de Dio; kiam li do eniras en vian koron, vi tion sciu el liaj agoj.

5 Sinjoro – mi diris – kiel ilin mi distingu, mi ne komprenas.

Aŭskultu – li diris. Kiam koleriĝemo atakas vin, aŭ amareco, vi sciu, ke li estas en vi. Same ankaŭ havemo pri multaj aferoj, diboĉemo pri multaj manĝaĵoj kaj drinkaĵoj, postebrio, variaj delicaĵoj, deziro pri virinoj, avareco, aroganteco kaj fanfaronado, kaj kio alia simila estas. Se tio ĉi do eniras en vian koron, vi do sciu, ke la anĝelo de la malbono estas en vi.

6 Vi do, konante ja liajn agojn, fortenu vin de li kaj neniel fidu lin, ĉar liaj agoj estas malbonaj kaj ne taŭgas por la sklavoj de Dio.

Do jen vi havas la funkciadon de ambaŭ anĝeloj; ekkonu ilin kaj fidu la anĝelon de la justeco. 7 Sed detenu vin de la anĝelo de la malbono, ĉar liaj instruoj en ĉiu aspekto estas malbonaj; ĉar se oni eĉ estas viro plej plena je la fido, kaj la dezirado de la anĝelo de la malbono eniras en la koron, neeviteble tiu viro aŭ virino faros pekon. 8 Sed se eĉ viro aŭ virino estas plej malbona, kaj se eniras en lian koron la agoj de la anĝelo de la justeco, neeviteble tiu devos plenumi ion bonan. 9 Vidu do – li diris –, kiel bele estas sekvi la anĝelon de la justeco, sed foradiaŭi la anĝelon de la malbono.

10 Tiu ĉi Ordono klarigas do pri la fido, ke la agojn de la anĝelo de la justeco vi fidu, kaj se tion vi faros, vi vivos antaŭ Dio. Sed kredu, ke la agoj de la anĝelo de la malbono estas malfacilaj; se tiujn vi ne faros, vi vivos antaŭ Dio.

Sepa Ordono

La timo antaŭ Dio

1 [37]: 1 Timu antaŭ la Sinjoro – li diris – kaj gardu liajn Ordonojn; gardante do la Ordonojn de Dio vi estos kapabla en ĉiu ago, kaj via agado estos senkompara. Timante antaŭ la Sinjoro vi ja faros ĉion bone; tio estas la timo, en kiu vi devas timi, kaj vi saviĝos.

2 Sed la diablon vi ne timu; ĉar timante antaŭ la Sinjoro vi regos super la diablo, ĉar potenco en li ne estas. Ĉar en kiu ne estas potenco, tiun vi ankaŭ ne timu; sed en kiu estas glora potenco, antaŭ tiu vi timu. Ĉar kiu havas potencon, tiun oni timas; sed kiu ne havas potencon, tiun malŝatas ĉiuj.

3 Timu vi tamen la agojn de la diablo, ĉar ili estas malbonaj. Do timante antaŭ la Sinjoro, vi timu la agojn de la diablo, kaj ne faru ilin, sed detenu vin de ili.

4 Timoj do estas duspecaj: se vi volas fari la malbonon, vi timu la Sinjoron kaj ne faru ilin; sed se vi volas fari la bonon, timu antaŭ la Sinjoro kaj faru tion. La timo antaŭ la Sinjoro do estas forta, granda kaj glora. Timu do antaŭ la Sinjoro kaj vi vivos antaŭ Li. Kaj ĉiuj, kiuj timas antaŭ li kaj gardas liajn ordonojn, vivos antaŭ Dio.

5 Sinjoro – mi diris –, kial vi diris koncerne tiujn, kiuj gardas liajn ordonojn: Ili vivos antaŭ Dio?

Ĉar – li diris – la tuta kreaĵo timas la Sinjoron, sed ne ĉiuj gardas liajn Ordonojn. Kiuj do timas antaŭ li kaj gardas liajn Ordonojn – de tiuj estas la vivo kun Dio; sed kiuj ne gardas liajn Ordonojn – en ili ankaŭ ne estas vivo.

Oka Ordono

Pri kio necesas ekzerci la sinregadon

1 [38]: 1 Mi diris al vi – li diris – ke la kreitaĵoj de Dio estas duoblaj, ĉar ankaŭ la sinregado estas duobla. Pri kelkaj aferoj necesas sinregi, pri kelkaj ne.

2 Sciigu do al mi, sinjoro – mi diris –, pri kiuj aferoj necesas sinregi, kaj pri kiuj ne.

Aŭskultu, li diris. Sinregu pri la malbono, kaj ne faru ĝin. Sed pri la bono ne sinregu, sed faru ĝin, ĉar se vi sinregas ne fari la bonon, vi faras grandan pekon. Sed se vi sinregas ne fari la malbonon, grandan justecon vi faras. Sinregu do kontraŭ ĉiu malbono, farante la bonon.

3 Sed kiaj, sinjoro – mi diris – estas la malbonoj, kontraŭ kiuj mi devas sinregi?

Aŭskultu, li diris. <Sinregu vin kontraŭ> adulto, la senleĝeco de ebrio, malbona luksemo, senbrida manĝado, multekosta riĉo, parada fiereco, orgojlo, disdegnado, mensogado, kalumnio, hipokriteco, rankoro kaj ĉia blasfemado. 4 Tio estas la plej malbonaj agoj en la vivo de la homoj. Kontraŭ tiuj agoj do la sklavo de Dio devas sinregi. Ĉar kiu ne sinregas kontraŭ tiuj, ne povas vivi por Dio.

Aŭskultu do ankaŭ kio sekvas.

5 Sed, sinjoro – mi interrompis – ĉu ne estas ja ankaŭ aliaj malbonoj?

Certe – li diris – tre multaj, kontraŭ kiuj la sklavo de Dio devas sinregi: ŝtelado, malvero, fraŭdo, falsa atesto, avareco, malbona deziro, trompo, aroganteco, fanfaronado, kaj kio ajn similas je tio. 6 Ĉu vi ne kredas, ke tio estas malbonaj, ja ege malbonaj por la sklavoj de Dio? En ĉio necesas, ke sinregu la sklavo de Dio. Do vi sinregu pri tiuj aferoj, por ke vi vivu por Dio, kaj ke vi enskribiĝu inter la sinregantoj pri tio. Tio do estas la aferoj, pri kiuj necesas, ke vi sinregu.

7 Nun aŭdu – li diris – pri kio vi ne devas sinregi, sed fari ilin. Ne sinregu pri la bono, sed faru ĝin.

8 Montru al mi do, sinjoro – mi diris – la varian riĉon de la bono, por ke mi promenu en ili kaj servu al ili, kaj por ke, plenumante ilin, mi saviĝu.

Aŭskultu – li diris – ankaŭ la agojn de la bono, kiujn vi devas fari kaj pri kiuj vi ne sinregu. 9 Tutunue, la fido, la timo antaŭ la Sinjoro, amo, unuanimeco, vortoj de justeco, vero, pacienco; estas nenio pli bona en la vivo de la homoj. Se iu tion gardas, kaj ne sinregas pri tio, li fariĝas feliĉa en sia vivo.

10 Aŭskultu do ankaŭ kio sekvas: servi al la vidvinoj, subteni orfojn kaj povrulojn, liberigi la sklavojn de Dio el prematecoj, esti gastema (ĉar en gastemeco foje la bonfarado trovas lokon), rezisti al neniu, esti trankvila, fariĝi la plej malriĉa el ĉiuj homoj, respekti maljunulojn, praktiki justecon, observi fratecon, elteni impertinenton, ne esti rankora, sed pardonema, konsoli tiujn, kiuj spirite malsanas, ne forĵeti tiujn, kiuj stumblis for de la fido, sed konverti kaj kuraĝigi ilin, admoni pekintojn, ne premi ŝuldantojn kaj senhavulojn, kaj la cetero kio similas al tio. 11 Ĉu vi ne kredas – li diris al mi – ke ĉiuj tiuj aferoj estas bonaj?

Ja kio, sinjoro – mi respondis –, kio povus esti pli bona ol tio?

Promenu do – li diris – laŭ tiu vojo, kaj ne sinregu tiurilate, kaj vi vivos antaŭ Dio.

12 Gardu do ĉi tiun Ordonon; ĉar se bonon vi faras kaj tiurilate ne sinregas, vi vivos antaŭ Dio. Ĉiuj vivos antaŭ Dio, kiuj tion faras. Kaj se aliflanke la malbonon vi ne faras kaj sinregas pri ĝi, vi vivos antaŭ Dio, kaj ĉiuj vivos antaŭ Dio, kiuj gardas tiujn ĉi Ordonojn kaj promenas laŭ ili.

Naŭa Ordono

Kontraŭ la dubo

1 [39]: 1 Li diris al mi:

Forŝiru de vi la dubon, kaj neniel dubu peti ion de Dio, dirante en vi mem: Kiel mi povas tion peti de la Sinjoro kaj ricevi, ĉar mi tiom pekis kontraŭ Li? 2 Ne tiel rezonu, sed tutkore turnu vin al la Sinjoro, kaj petu de Li senŝancele, kaj vi konos lian kompatemon, ke neniel Li forlasos vin, sed la peton de via animo Li plenumos. 3 Ĉar Dio ne estas kiel la homoj, kiuj estas rankoraj, sed Li ne memoras la malbonon kaj estas kompatema pri sia kreaĵo. 4 Vi do purigu vian koron de ĉiuj vantaĵoj de ĉi mondo kaj de ĉiuj pekoj, kiujn antaŭe vi diris aŭ faris, kaj petu de la Sinjoro kaj vi ricevos de Li, kaj vi ne sentos mankon pri ĉiuj viaj petoj, se senŝancele tion vi petos de la Sinjoro. 5 Sed se vi ŝancelas en via koro, vi nenion ricevos el viaj petitaĵoj. Ĉar kiuj ŝancelas rilate Dion, tiuj estas la dubantoj, kaj nenion el siaj petitaĵoj ili ricevas. 6 Sed kiuj estas kompletaj en la fido, tiuj petu ĉion plenkonfide pri la Sinjoro, kaj ili ricevos ĝin, ĉar senŝancele ili petas, neniom dubante. Ĉar ĉiu dubanta viro, se li ne konvertiĝas, malfacile saviĝos.

7 Purigu do vian koron de dubo, vestu vin en la fido, ĉar forta ĝi estas, kaj fidu je Dio, ke ĉion, kion vi petas de Li, vi ricevos. Kaj se post via petado de la Sinjoro iom malrapide vi ricevas, ne dubu, ĉar ne tuj vi ricevis la petitaĵon de via animo; ĉar nepre estas por elprovado aŭ pro iu peko, kiun vi ne konscias, ke vian petitaĵon vi ricevas malpli rapide.

8 Tial do vi ne ĉesu fari la peton de via animo, kaj vi ricevos ĝin. Sed se vi laciĝas kaj dubas petante, vi kulpigu vin mem kaj ne Lin, kiu ne donas al vi.

9 Atentu pri la dubado! Ĉar ĝi estas malbona kaj sensenca, kaj multajn ĝi elŝiras el la fido, kaj eĉ tre fidelajn kaj fortajn homojn. Tiu dubado estas filino de la diablo, kaj faras multe da malbono kontraŭ la sklavo de Dio.

10 Malŝatu do la dubon kaj venku pri ĝi en ĉiu afero, vestinte vin per la fido, kiu estas forta kaj fortika. Ĉar la fido ĉion promesas, ĉion plenumas,

sed la dubo ne fidante sin mem, maltrafas en ĉiuj aferoj, kiujn ĝi entreprenas.

11 Vi do vidas – li diris –, ke la fido venas desupre, de la Sinjoro, kaj havas grandan povon; sed la dubo estas surtera spirito el la diablo, kaj ne havas forton. 12 Do servu vi tiun fidon, kiu havas povon, kaj tenu vin for de la dubo, kiu ne havas povon; kaj vi vivos antaŭ Dio, kaj ĉiuj vivos antaŭ Dio, kiuj same pensas.

Deka Ordono

Kontraŭ la tristeco

1 [40]: 1Forigu do de vi – li diris – la tristecon; ĉar ĝi estas fratino de la dubo kaj de la koleriĝemo.

2 Kiel, sinjoro – mi diris –, ĝi estas ilia fratino? Al mi koleriĝemo ŝajnas esti io tute alia, io alia la dubo kaj io tute alia la tristo.

Vi ne komprenas, homo. Vi ja ne komprenas, ke la tristo estas la plej malbona el ĉiuj spiritoj, kaj la plej terura por la sklavo de Dio, kaj ke neniu el ĉiuj spiritoj tiom neniigas la homon kiel ĝi, kaj ke ĝi elpelas la Sanktan Spiriton, kaj tamen ree ĝi savas lin.

3 Jes, sinjoro – mi diris – mi ne komprenas kaj ne kaptas la sencon de tiuj paraboloj. Ĉar kiel efektive ĝi povas elpeli kaj same ree savi, mi ne komprenas.

4 Auŝkultu – li diris –: Kiuj neniam faris studon pri la vero, nek serĉadon pri la Dieco, nur fidante, sed ja implikiĝas en komercaj aferoj, riĉeco kaj amikecoj kun paganoj, kaj multege da aliaj aferoj ĉi-mondaj: kiuj do sin dediĉas al tiuj aferoj, tiuj ne komprenas la parabolojn de la Dieco; ĉar ili obskuriĝis pro tiuj aferoj kaj fariĝis kvazaŭ elsekiĝintaj. 5 Kiel la bonaj vitoj, kiam ili estas neglektataj, fariĝas senfruktaj pro la dornoj kaj la buntaj trudherboj, tiel same la homoj, kiuj estis fiduloj kaj trafis en ĉi multegajn aferojn, kiujn antaŭe ni menciis, fordrivas en sia konscio kaj absolute nenion komprenas pri la Dieco; kaj kiam ili aŭdas paroli pri la Dieco, ilia menso al iliaj aferoj forvagas kaj absolute nenion komprenas.

6 Sed kiuj timas antaŭ Dio, kaj serĉadas pri la Diaĵo kaj la vero kaj direktis sian koron al Dio, komprenas kaj perceptas ĉion diritan al ili pli rapide, ĉar la timon antaŭ la Sinjoro ili havas en si; ĉar kie ja loĝas la Sinjoro, tie ankaŭ estas multa kompreno. Adheru do al la Sinjoro, kaj ĉion vi perceptos kaj komprenos.

2 [41]: 1 Aŭskultu do, malsaĝulo – li diris –, kiel la tristeco elpelas la Sanktan Spiriton, kaj ree ĝin savas. 2 Kiam la dubanto sin ĵetas sur iun agon, kaj pro sia dubanteco li ne sukcesas, tristeco pro ĝi eniras en tiun homon, kaj ĉagrenas la Sanktan Spiriton kaj elpelas ĝin. 3 Siaflanke, se koleriĝemo gluiĝas al viro koncerne ian aferon, kaj se li ege amariĝas, ree la tristo eniĝas en la koron de tiu koleriĝema viro, kaj li ĉagreniĝas pro la ago, kiun li faris, kaj li pentas, ĉar malbone li agis. 4 Tiu lia tristo do ŝajne kondukas al saviĝo, ĉar farinte malbonon li pentas. Ambaŭ agoj ĉagrenas la Spiriton: la dubemo, ĉar li ne atingas, kion li celis, kaj la koleriĝemo ĉagrenas la Spiriton, ĉar li agis malbone. Ambaŭ do ĉagrenas la Sanktan Spiriton, la dubemo kaj la koleriĝemo.

5 Forigu do el vi mem la triston kaj ne ĉagrenu la Sanktan Spiriton, kiu loĝas en vi, por ke ĝi ne pledu kontraŭ vi ĉe Dio, kaj ke ĝi ne forcedu de vi. 6 Ĉar la Spirito de Dio, kiun vi ricevis en ĉi karno nek toleras triston nek prematecon.

3 [42]: 1 Vestu vin do per ĝojo, kiu ĉiam trovas gracon antaŭ Dio kaj plaĉas al Li. Li ĝuas ĝin. Ĉar ĉiu ĝoja viro plenumas bonajn farojn kaj pensas bonon, kaj malŝatas la triston. 2 Sed la trista viro ĉie kondutas malbone; unue li agas malbone, ĉar li ĉagrenas la Sanktan Spiriton, kiu estis ĝoja donita al la homo; due li krome agas senleĝe, ĉar li nek regule preĝas al Dio nek konfesas antaŭ Li. Ĉar la preĝo de viro trista nenie havis la forton ascendi ĝis antaŭ la altaro de Dio.

3 Kial – mi diris – la preĝo de tristulo ne povas ascendi ĝis la altaro de Dio?

Ĉar – li diris – en lian koron eksidis la tristeco; la tristeco, miksitita kun la preĝo, ne toleras ke la preĝo pura ascendu ĝis la altaro de Dio. Ĉar same kiel miksaĵo de vinagro kaj vino kune ne donas bonan guston, same tiel miksaĵo de tristo kun Sankta Spirito ne donas fortan preĝon.

4 Tial do purigu vin de tiu noca tristeco, kaj vi vivos antaŭ Dio. Ĉiuj vivos antaŭ Dio, kiuj forĵetas de si la tristecon kaj vestas sin en tuta ĝojo.

Dekunua Ordon

Falsa aŭ pseŭdo-profeto

1 [43]: 1 Li montris al mi kelkajn homojn, kiuj sidis sur benko, kaj iun alian, kiu sidis sur seĝo. Kaj li diris al mi:

Ĉu vi vidas tiujn, kiuj sidas sur la benko?

Jes, sinjoro – mi diris.

Tiuj estas fiduloj – li diris –, sed kiu sidas sur la seĝo, tiu estas pseŭdoprofeto, kiu neniigas la menson de la sklavo de Dio: tiun de la dubemaj, mi volas diri, ne de la fiduloj. 2 Ĉar tiuj dubemaj, se ili venas ĉe divenisto, ili konsultas lin, kiel estos al ili. Kaj tiu pseŭdoprofeto, nehavante eĉ iom de la forto de la Dia Spirito, rakontas al ili laŭ iliaj demandoj kaj laŭ la deziroj de ilia malboneco, kaj li plenigas iliajn animojn laŭ iliaj deziroj. 3 Ĉar mem estante malplena, li malplene respondas al malplenaj homoj; ĉar kion ajn oni konsultas, li respondas laŭ la malpleno de tiu homo. Sed ankaŭ kelkajn verajn aferojn li diras, ĉar la diablo plenigis lin per sia spirito <por vidi>, ĉu tiel li rompos kelkajn el la justuloj. 4 Ĉiuj do, kiuj estas fortaj en la fido de la Sinjoro, vestitaj en la vero, al ĉi tiaj spiritoj ne gluiĝas, sed detenas sin de ili. Sed ĉiuj, kiuj estas dubemaj kaj ofte ŝanĝas siajn opiniojn, okupiĝas pri la sortdivenado, same kiel la paganoj, kaj surprenas pli grandan pekon sur si mem per la idoladorado. Ĉar kiu konsultas pseŭdoprofeton pri iu afero, estas idoladoranto kaj malplena je la vero, kaj malsaĝa. 5 Ĉar neniu spirito eliranta de Dio devas esti konsultata, sed ĉar ĝi posedas la forton de la Dieco, el si mem ĝi ĉion diras, ĉar desupre ĝi venas – el la forto de la Dia Spirito. 6 Sed la spirito konsultata, kiu parolas laŭ la deziroj de la homoj, estas tereca kaj frivola, nehavante forton; kaj ĝi nur parolas, krom se konsultata.

Distingi la spiritojn

7 Kiel do, sinjoro – mi diris –, la homo scios, kiu el ili estas profeto kaj kiu pseŭdoprofeto¹⁰?

Aŭskultu – li diris – pri ambaŭ <specoj de> profetoj. Kiel mi rakontos al vi, tiel vi prijuĝu la profeton kaj la pseudoprofeton. Laŭ lia vivo vi prijuĝu la homon, kiu havas la spiriton de Dio. 8 Unue tiu, kiu havas la Dian spiriton, kiu venas desupre, estas ĝentila, kvieta, humila kaj detenas sin de ĉiu malbono kaj de vantaj deziroj ĉi-mondaj, kaj konsideras sin mem malpli grava ol ĉiuj homoj, kaj al neniu li donas respondojn laŭpete, kaj li ne solece parolas (ĉar ne kiam la homo deziras, la Sankta Spirito parolas), sed la homo parolas nur, kiam Dio mem tion deziras. 9 Kiam do la homo, kiu havas la Spriton de Dio, envenas en kunvenon de justaj homoj, kiuj havas fidon je la Spirito de Dio, kaj okazas preĝo al Dio el tiu kunveno de tiuj homoj, tiam la anĝelo de la profeta spirito, kiu ripozas sur li, plenigas tiun homon, kaj la homo, plena de la Sankta Spirito, parolos al la amaso, laŭ tio, kion la Sinjoro deziras. 10 Tiel do manifestiĝas la Spirito de la Dieco. Jen kiel granda estas la potenco de la Sinjoro, koncerne la spiriton de la Dieco.

11 Aŭskultu do – li diris – pri la spirito, kiu estas ĉi-tera, malplena kaj ne havas forton, sed estas malsaĝa. 12 Unue tiu homo, kiu ŝajnas havi spiriton, altigas sin mem kaj deziras ricevi la unuan sidlokon, kaj li estas rekte senhonta kaj senpudora kaj babilema kaj li vivas meze de ĉiaj delicoj kaj de multaj aliaj logaĵoj, kaj li akceptas pagon por sia profetado; kaj se li ne ricevas <pagon>, li ne profetadas. Ĉu do Dia Spirito povas akcepti pagon kaj profetadi? Ne eblas, ke profeto de Dio tion faras, sed la spirito de tiaj profetoj estas ĉi-tera. 13 Due li neniam alproksimiĝus al kunveno de justuloj, sed tiujn li evitas. Li adheras al homoj dubemaj kaj malplenaj, kaj profetadas al ili ĉe statanguloj, kaj trompas ilin parolante ĉion malplene laŭ iliaj deziroj; li ja respondas al malplenuloj. La malplena poto kunmetite kun malplenaj ne frakasiĝas, sed ili bone akordiĝas. 14 Sed se li venas en kunvenon plenan je justuloj, kiuj havas spiriton de Dieco, kaj se ili tie preĝas, tiu homo fariĝas malplena, kaj la

¹⁰ En frua kristanismo ŝajne estis grava temo; vidu ankaŭ en la Didaĥeo.

ĉi-tera spirito fuĝas de li pro timo, kaj la homo fariĝas surda kaj komplete frakasiĝas, ne kapabla diri eĉ vorton. 15 Ĉar se vi stokigas vinon kaj olivoleon en magazenon kaj kun ili enmetas malplenan poton, se poste la magazenon vi volas malplenigi, la malplenan poton kiun vi enmetis, vi retrovas same malplena; tiel same la malplenaj profetoj, kiam ili trafas spiritojn de justuloj, same malplenaj montriĝas ĉe la eliro, kiel ili alvenis.

16 Jen do vi havas la vivon de ambaŭ specoj de profetoj. Juĝu do laŭ iliaj agoj kaj ilia vivo la homon, kiu nomas sin spiritoportanto. 17 Sed viaflanke vi fidu je la Spirito, kiu venas de Dio kaj havas forton; je la ĉi-tera kaj malplena spirito neniel vi fidu, ĉar en li ne estas forto – li ja venas de la diablo.

Parabolo

18 Aŭskultu do parabolon, kiun mi rakontos al vi. Prenu ŝtonon kaj ĵetu ĝin kontraŭ la ĉielon, kaj vidu ĉu vi povos atingi ĝin; aŭ prenu vinsakon kaj ŝprucigu el ĝi kontraŭ la ĉielon, kaj vidu, ĉu vi povos trabreĉi la ĉielon.

19 Kiel tio, sinjoro – mi diris –, povus realiĝi? Ĉar ambaŭ estas ja ne-eblaj, kiujn vi diras.

Tiel same do – li diris – ambaŭ estas ne-eblaj, same kiel la ĉi-teraj spiritoj estas senpovaj kaj senefikaj. 20 Sed nun vi prenu la povon, kiu venas desupre. La hajlo estas ege malgranda grajno, sed se ĝi falas sur kapon de homo, ho kiel ĝi povas dolorigi; aŭ ree, prenu guton, kiu falas el la tegolo planken, kaj truigas la ŝtonon. 21 Vi vidas, ke la plej eta kiu falas desupre surteren havas grandan povon; tiel same la Dia Spirito, kiu venas desupre, estas potenca: je tiu Spirito vi do fidu, sed de la alia vi detenu vin.

Dekdua Ordono

Kontraŭ la malbona deziro

1 [44]: 1 Li diris al mi:

Forigu de vi ĉiun malbona deziron, kaj vestu vin per bona kaj sankta deziro, ĉar se tiel vi vestas vin, vi malamos la malbonan deziron kaj vi bridos ĝin laŭdezire. 2 Ĉar sovaĝa estas la malbona deziro kaj nur pene ĝi estas dresebla: timinda ĝi estas kaj en sia sovaĝeco ĝi estas ege kosta al la homoj. Precipe, se sklavo de Dio kaptiĝas en ĝi kaj ne estas saĝa, tio kostos al li terure. Sed ĝi kostas al tiuj, kiuj ne vestas sin per la bona deziro, sed kiuj miksiĝas je tiu ĉi mondo. Tiujn ĝi ja fordonas al la morto.

3 Sinjoro – mi diris al li –: kiaj estas la agoj de la malbona deziro, kiuj transdonas la homojn al la morto? Sciigu al mi, kaj mi detenos min de tiuj.

Aŭskultu <– li diris al mi –>, per kiuj agoj la malbona deziro mortigas la sklavojn de Dio.

2 [45]: 1 Unuavice la deziro je aliula virino aŭ viro, kaj ekstravanco en riĉo, multaj superflujaj kaj stultaj frandaĵoj, drinkaĵoj kaj aliaj ĝuaĵoj; ĉar ĉiu luksemo estas stulta kaj malplena por la sklavoj de Dio. 2 Tiu deziroj do estas malbonaj, kaj mortigas la sklavojn de Dio. Ĉar la malbona deziro estas filino de la diablo. Vi do devas deteni vin de la malbonaj deziroj, por ke – detenante vin – vi vivu por Dio. 3 Ĉiuj, kiuj sin lasas regi de ili, kaj ne kapablas rezisti ilin, estas profunde mortaj; ĉar tiuj deziroj estas mortigaj. 4 Sed vi vestu vin per la deziro je justeco, kaj arminte vin per timo antaŭ la Sinjoro, vi rezistu ilin. Ĉar la timo antaŭ la Sinjoro loĝas en la bona deziro. Sed kiam la malbona deziro vin vidas armita per la timo antaŭ Dio kaj ke vi rezistas ĝin, ĝi fuĝos longe for de vi, kaj ne plu aperos al vi, ĉar ĝi timas viajn armilojn. 5 Vi do, kronita kiel venkinto super ĝi, iru al la deziro je justeco, kaj transdonu al ĝi la premion de l' venko kiun vi ricevis, kaj servu al ĝi laŭ ŝia deziro. Se vi servas al la bona deziro kaj submetas vin al ĝi, vi havas la forton venki la malbonan deziron kaj submeti ĝin al vi, laŭ via deziro.

3 [46]: 1 Mi ŝatus scii, sinjoro – mi diris –, en kiuj manieroj mi devas servi al la bona deziro.

Aŭskultu – li diris: – agu en justeco kaj virto, en vero kaj timo antaŭ la Sinjoro, en fido kaj mildeco, kaj en ĉiuj bonaj agoj, kiuj similas al tio. Plenumante tion, vi estos sklavo de Dio, kiu plaĉas al Li, kaj vi vivos antaŭ Li. Ĉar ĉiu, kiu servas al la bona deziro, vivos antaŭ Dio.

Epilogo al la Ordonoj

Ebleco sekvi la Ordonojn

2 Tiel li do finis la dek du Ordonojn, kaj diris al mi:

Jen vi do havas la Ordonojn; promenu laŭ ili kaj instigu la aŭskultantojn, ke ilia pento estu pura ĉiujn tagojn de la vivo. 3 Tiun servadon, kiun mi donas al vi, plenumu ĝin diligente kaj multe vi atingos; ĉar vi trovos gracon ĉe tiuj, kiuj pentos, kaj ili obeos al viaj Diroj; ĉar mi estos kun vi kaj mi devigos ilin obei vin.

4 Kaj mi diris al li:

Sinjoro, tiuj Ordonoj estas grandaj, grandaj kaj gloraj, kaj ili povas feliĉigi la koron de la homo, kiu kapablas plenumi ilin. Sed mi ne scias, ĉu tiuj Ordonoj povas esti observitaj de homo, ĉar ili estas ege duraj.

5 Li respondis al mi:

Se vi prezentas al vi mem, ke eblas observi ilin, vi gardos ilin facile, kaj ili ne estos duraj; sed se en via koro eniĝis la konvinko, ke neniu homo povas observi ilin, vi ne gardos ilin. 6 Tial mi do diras al vi: se ilin vi ne gardos, sed neglektos, vi ne saviĝos, nek viaj infanoj nek via domo, ĉar vi jam verdiktis kontraŭ vi mem, ke tiujn Ordonojn neniu homo povas gardi.

4 [47]: 1 Kaj tion li diris al mi ege kolere, tiel ke mi konfuziĝis kaj mi lin ege timis; ĉar lia formo tiom ŝanĝiĝis, ke neniu homo povis elteni lian koleron. 2 Sed kiam li vidis, ke mi tute skuiĝis kaj konfuziĝis, li komencis paroli pli afable al mi, kaj diris: Malsaĝulo, stultulo kaj dubanto, ĉu vi ne

scias la gloron de Dio, kiel granda ĝi estas kaj mirinda, ke Li kreis la mondon pro la homo kaj la tutan kreon submetis al la homo, kaj ĉiun potencon Li donis al li por regi super ĉio sub la ĉielo? 3 Se do – li diris – la homo estas sinjoro super ĉiuj kreaĵoj de Dio, kaj regas ĉion, ĉu li do ne kapablas regi ĉiujn tiujn Ordonojn? Jes, povas – li diris – regi super ĉiuj tiuj Ordonoj la homo, kiu havas la Sinjoron en sia koro. 4 Sed kiuj havas la Sinjoron sur siaj lipoj, sed kies koro estas dura, kaj kiuj estas longe for de la Sinjoro – por tiuj ĉi tiuj Ordonoj estas duraj kaj nealireblaj. 5 Do vi, kiuj estas malplenaj kaj leĝeraj en la fido, metu vian Sinjoron en via koron, kaj vi konstatos, ke nenio estas pli facila ol tiuj Ordonoj nek pli dolĉa aŭ pli agrabla. 6 Konvertiĝu do, vi kiuj iradas laŭ la ordonoj de la diablo, kiuj estas malfacilaj kaj amaraj kaj sovaĝaj kaj senbridaj; kaj ne timu la diablon, ĉar en li ne estas potenco super vi; 7 ĉar mi estos kun vi, mi la anĝelo de la pento, kiu havas forton super li. La diablo nur havas timon, sed lia timo ne havas forton; do ne timu lin, kaj li forfuĝos de vi.

La tento

5 [48]: 1 Mi diris al li:

Sinjoro, aŭskultu kelkajn vortojn de mi.

Diru – li respondis – kion vi volas.

Sinjoro, – mi diris – la homo estas ema gardi la Ordonojn de Dio, kaj neniuj ekzistas, kiu ne petus de la Sinjoro, ke Li lin fortigu en Liaj Ordonoj kaj ke li obeu al ili; sed la diablo estas dura kaj submetas lin.

2 Li ne povas submeti – li diris – la sklavojn de Dio, kiuj fidas je Li el la tuta koro. La diablo ja povas lukti kontraŭ ili, sed venki li ne povas. Se vi do rezistas kontraŭ li, li estos venkita kaj senhonora forfuĝos de vi. Sed – li diris –, kiuj estas malplenaj <je la fido>, tiuj ĉiuj timos la diablon, kvazaŭ li havus potencon. 3 Kiam la homo plenigis kelkajn bonegajn amforojn¹¹ per bela vino kaj inter tiuj amforoj restas kelkaj malplenaj, li iras al la amforoj kaj ne ekzamenas la plenajn. Li ja scias, ke ili estas plenaj; sed la malplenajn li ekzamenas, timante, ke ili acidiĝis. Ĉar

¹¹ Aŭ: argilajn potojn.

malplenaj amforoj facile acidiĝas, kaj tiam la gusto de la vino pereas.

4 Tiel same la diablo iras al ĉiuj sklavoĵ de Dio por tenti ilin. Ĉiuj do, kiuj plenas je la fido, kuraĝe rezistas lin, kaj li foriras de ili sen trovi, kie li eniru. Sed poste li iras al la malplenaj, kaj li trovas, kie eniri en ilin, kaj poste li faras en ili, kion li volas, kaj ili fariĝas liaj obeemaj sklavoĵ.

6 [49]: 1 Sed mi, la anĝelo de la pento, mi diras al ili: Ne timu la diablon. Ĉar mi estis sendita – li diras –, por esti kun vi, kiuj pentas el la tuta koro, kaj fortikigi vin en la fido. 2 Fidu do je Dio, vi ĉiuj, kiuj pro viaj pekoj malesperis pri via vivo kaj kiuj aldonis pekojn kaj faris vian vivon pli peza; ĉar se vi turnas vin el la tuta koro al la Sinjoro kaj faras la justecon ĉiujn ceterajn tagojn de via vivo kaj ĝuste servas al Li, laŭ Lia volo, Li donos sanigon al viaj antaŭaj pekoj, kaj vi havos la povon venki super la agoj de la diablo. Sed la minacadon de la diablo absolute vi ne timu; ĉar li estas same senforta kiel la tendenoj de kadavro. 3 Aŭskultu do min, sed havu timon antaŭ Tiu, kiu ĉion povas, savi kaj pereigi, kaj plenumu Liajn ordonojn, kaj vi vivos antaŭ Dio.

4 Mi diris al li:

Sinjoro, nun mi estas fortikigita en ĉiuj justaj decidoj de la Sinjoro, ĉar vi estas kun mi; kaj mi scias, ke vi frakosas la tutan povon de la diablo, kaj ni venkos lin kaj bridos ĉiujn liajn agojn. Kaj mi esperas, sinjoro, ke mi kapablos gardi tiujn Ordonojn, kiujn vi donis al mi, ĉar la Sinjoro kapabligos min.

5 Vi gardos ilin – li diris –, se via koro montriĝas pura antaŭ la Sinjoro. Kaj same gardos ĝin ĉiuj, kiuj purigos sian koron de la vantaj deziroj de ĉi tiu mondo, kaj ili vivos antaŭ Dio.

La paraboloj, kiujn li priparolis kun mi

Unua Parabolo

La vera Civito de la kristano

1 [50]: 1 Li diris al mi:

Vi scias – li diris –, ke vi sklavoj de Dio loĝas en fremda lando, ĉar via civito¹² estas longe for de ĉi tiu civito. Se vi do scias la urbon – li diris –, en kiu vi loĝos, kial do ĉi tie vi preparas kampojn kaj multekostajn aranĝojn kaj konstruaĵojn kaj loĝejojn, kiuj ja estas superflujaj? 2 Kiu tiajn aferojn preparas en ĉi tiu urbo, ne estas prepariĝanta por reiri al la propra urbo. 3 Ho stulta kaj dumensa kaj mizera homo, ĉu vi ne konscias, ke ĉio ĉi estas aliulaj kaj sub estrado aliula? Ĉar diros la Sinjoro de tiu ĉi urbo: Mi ne volas, ke vi loĝas en mia urbo, do vi foriru el ĉi urbo, ĉar miajn leĝojn vi ne sekvas. 4 Vi do, kiu havas kampojn kaj loĝejojn kaj multe da aliaj aferoj, se li elĵetas vin, kion vi faros pri via kampo kaj via domo kaj ĉio cetera, kion vi preparis por vi mem? Prave ja diros la Sinjoro de tiu ĉi lando: Aŭ vi sekvu miajn leĝojn, aŭ vi foriru el mia lando. 5 Kion vi faros, vi kiu havas leĝon en via propra urbo? Pro viaj kampoj kaj la cetera posedaĵo, ĉu entute vi neos vian propran leĝon kaj promenos laŭ la leĝo de tiu ĉi urbo? Atentu, ke ne estas utile nei vian propran leĝon, ĉar se vi deziras retiri al via urbo, vi ne estos akceptita, se la leĝon de via urbo vi neis, kaj tiam vi estos ekskludita de ĝi. 6 Do atentu vi; ĉar loĝante en fremda lando, vi nenion preparas por vi mem, krom kiom provizore sufiĉas por vi, kaj vi estu preta, kiam la mastro de tiu lando deziras elĵeti vin el tiu urbo, ĉar lian leĝon vi kontraŭas, ke vi foriru el lia urbo kaj reiru al via propra urbo, kaj ĝoje uzu vian propran leĝon, sen ajna perforto.

7 Atentu vi do, ke vi estas sklavoj de Dio kaj havu Lin en via koro! Faru la agojn de Dio, memorante Liajn ordonojn kaj la promesojn, kiujn Li

¹² *Civito* kaj *urbo* estas la sama vorto en la originalo. Por memorigi pri la verko *Civito de Dio* de Aŭgustino ĉi tie mi uzas foje la vorton *civito*.

donis, kaj fidu je Li, ke Li plenumos ilin, kiam Liajn regulojn vi sekvas. 8 Anstataŭ kampojn aĉetu vi do animojn prematajn, laŭ ĉies ebleco, kaj vizitu vidvinojn kaj orfojn kaj tiujn ne neglektu, kaj viajn riĉaĵojn kaj ĉiujn viajn preparojn elspezu pri tiaspecaj kampoj kaj domoj, kiujn vi ricevas de Dio¹³. 9 Kun tiu celo ja riĉigis vin la Mastro, ke tiujn servadojn vi faru por Li; estas ja multe pli bone akiri tiajn kampojn kaj posedaĵojn kaj domojn, kiujn vi <re>trovos en via urbo, kiam tiun vi vizitos. 10 Tiu riĉeco estas bela kaj sankta, ne donas triston aŭ timon, sed ja ĝojon. Sed la riĉecon de la paganoj vi ne praktiku; ĝi ja ne konvenas al la sklavoj de Dio. 11 Sed praktiku la propran riĉecon, pri kiu vi povas ĝoji; kaj ne falsigu ĝin, nek ekkaptu aŭ deziru aliulan posedaĵon; ĉar estas malbone deziri ion aliulan. Faru vian propran laboron, kaj vi saviĝos.

Dua Parabolo

La ulmo kaj la vito

1 [51]: 1 Mi promenadis en la kampo kaj tie rimarkis ulmon kaj viton, kaj dum mi primiris ilin kaj rigardis pri iliaj fruktoj, aperis al mi la Paŝtisto, kaj li diris al mi:

Kion vi pripensas pri la ulmo kaj la vito?

Mi pripensas, <sinjoro> – mi diris –, ke ili estas mirinde adaptitaj unu al la alia.

2 Tiuj du arbospecoj – li diris – estas parabolo pri la sklavoj de Dio.

Tiun parabolon – mi diris – volonte mi eksciis pri tiuj arboj, kiujn vi menciis.

Ĉu vi vidas – li diris – la ulmon kaj la viton?

Mi vidas, sinjoro.

¹³ Legu tiel, ke «kiujn vi ricevis de Dio» rilatu al «riĉaĵoj». La frazo estas iom nelerte vortumita.

3 La vito – li diris – portas fruktojn, sed la ulmo estas arbo sen fruktoj; sed se tiu vito ne suprengrimpus sur la ulmon, ĝi ne povus porti multajn fruktojn, <estante> etendita sur la grundo; sed la fruktoj, kiujn ĝi portas, estus putrintaj, ĉar ili ne pendus je la ulmo. Sed kiam la vito estas fiksita sur la ulmon, ĝi portas fruktojn por si mem kaj por la ulmo. 4 Vi vidas do, ke ankaŭ la ulmo portas multajn fruktojn, ne malpli ol la vito, sed eĉ pli.

Kiel, sinjoro – mi diris – eĉ pli?

Ĉar – li diris – la vito pendanta je la ulmo donas bonajn kaj belajn fruktojn, sed etendita surgrunde ĝi donas putrajn kaj malmultajn. Tiu ĉi Parabolo do temas pri la sklavoj de Dio, same pri la malriĉa kiel la riĉa.

5 Kiel do, sinjoro? – mi diris –; instruu min.

Aŭskultu – li diris –: La riĉulo havas multajn posedaĵojn, sed koncerne la Sinjoron li estas malriĉa, ĉar lia riĉeco distras lin, kaj ege malmulte li preĝas aŭ laŭdas la Sinjoron, kaj kion li preĝas aŭ laŭdas, estas ege eta, sen signifa kaj sen forto tie supre. Kiam do la riĉulo iras al la malriĉulo kaj havigas al li la necesajojn, fidante, ke pro kion li faras al la malriĉulo, antaŭ Dio li havos sian rekompencan, ĉar la malriĉulo estas riĉa en preĝado kaj laŭdado, kaj havas multan forton lia preĝado antaŭ Dio; la riĉulo do havigas al la malriĉulo ĉion senhezite. 6 Kaj la malriĉulo, subtenate de la riĉulo, porpetas por li, dankante al Dio pro tiu, kiu donis tion al li. Kaj la alia des pli strebas por <helpi> la malriĉulon, por ke neniam li havu mankon en la vivo; ĉar li scias, ke la preĝo de la malriĉulo estas bonvena kaj riĉa antaŭ Dio. 7 Ambaŭ faras sian laboron: la malriĉulo faras la preĝon, en kio li estas riĉa [kion li ricevis de la Sinjoro]; kaj la riĉulo, same, la riĉon, kiun li ricevis de la Sinjoro, senhezite havigas al la malriĉulo. Kaj tio estas granda laboro kaj bonvena ĉe Dio, ĉar li konsciiĝis pri sia riĉo kaj agis por la malriĉulo el la bonfaroj de la Sinjoro, kaj ĝuste plenumis la servadon de la Sinjoro.

8 Laŭ la homoj do la ulmo ŝajnas ne doni fruktojn, kaj ili ne scias nek perceptas, ke kiam sekeco estiĝas, la ulmo, kiu havas akvon, nutras la viton, kaj ĉar la vito seninterrompe havas akvon, ĝi povas doni duoblajn fruktojn, same por si mem kaj por la ulmo. Tiel same la malriĉuloj,

preĝante al la Sinjoro pro la riĉuloj, plenigas ilian riĉon, kaj aliflanke la riĉuloj, havigante al la malriĉuloj kion ili bezonas, plenigas iliajn animojn. 9 Ambaŭ tiel partoprenas en justa laboro. Kiu tion faras, tiu ne estos forlasita de Dio, sed li estos skribita en la libron de la vivantoj.

10 Feliĉaj la riĉuloj, kiuj komprenas, ke sian riĉon ili ricevis de la Sinjoro; kiu tion komprenas, tiu per ĝi ankaŭ povos servadi ion.

Tria Parabolo

La nuna mondo, vintro por la justuloj

1 [52]: 1 Li montris al mi multajn arbojn sen folioj, sed ili aperis al mi, se tiel diri, velkintaj; ĉar ili ĉiuj estis similaj. Li diris al mi:

Ĉu vi vidas tiujn arbojn?

Mi vidas, sinjoro – mi diris al li –, kaj ke ili ĉiuj estas similaj kaj sekaj.

Li respondis al mi:

La arboj, kiujn vi vidas, reprezentas la loĝantojn de ĉi mondo.

2 Kial, sinjoro – mi diris –, ili do estas tiel similaj kaj velkintaj?

Ĉar – li diris –, nek la justuloj nek la pekuloj klare vidiĝas en ĉi mondo, sed estas similaj; ĉar tiu ĉi mondo por la justuloj estas vintro, kaj ili ne estas videblaj, ĉar ili loĝas inter la pekuloj. 3 Ĉar same kiel vintre la arboj, kiuj perdis siajn foliojn, estas similaj, kaj same kiel ne estas videble, kiuj estas velkintaj aŭ kiuj ankoraŭ vivas, tiel same en ĉi mondo ne estas videble, kiuj estas justuloj aŭ pekuloj, sed ĉiuj estas similaj.

Kvara parabolo

La mondo burĝonanta, somero

1 [53]: 1 Li montris al mi multajn aliajn arbojn, kelkaj burĝonis, aliaj elsekiĝis, kaj li diris al mi:

Ĉu vi vidas – li diris – tiujn arbojn?

Tiujn, sinjoro – mi diris – mi vidas, kaj kelkaj estas verdaj, aliaj sekaj.

2 Tiuj verdaj arboj – li diris – reprezentas la homojn, kiuj loĝos en la venonta mondo; ĉar la venonta mondo estas la somero¹⁴ por la justuloj, sed por la pekuloj vintro. Kiam do ekbrilos la kompato de la Sinjoro, tiam klare aperos tiuj, kiuj estas sklavoj de Dio, ja ĉiuj klare videblos.

3 Ĉar kiel en la somero videbliĝas la fruktoj de ĉiu unuopa arbo, kaj estas konstatite, kiaj ili estas, tiel same la fruktoj de la justuloj estos klare videblaj, kaj koniĝos ĉiuj, kiuj bone fruktas en tiu mondo.

4 Sed la paganoj kaj la pekuloj, kiujn vi vidis kiel sekajn arbojn, montriĝos sekaj kaj senfruktaj en tiu mondo, kaj kiel lignaĵo ili estos forbruligitaj kaj ili estos klaraj, ĉar ilia agado montriĝis malbona en ilia vivo. Kaj la pekuloj estos bruligitaj, ĉar ili pekis kaj ne pentis; la paganoj estos bruligitaj, ĉar sian Kreinton ili ne rekonis.

5 Viaflanke do vi estu fruktodona, por ke en la somero koniĝu la frukto. Retenu vin tamen de la multa agado, kaj atentu ke neniam vi peku. Ĉar kiuj multe agadas, ankaŭ multe pekas kaj distritaj per sia agado, ili neniel estas plu sklavoj de Dio. 6 Kiel ja – li diris al mi – tia homo povas peti ion de la Sinjoro kaj ricevi ĝin, se li ne estas sklavoj de Dio? Ĉar kiuj estas sklavoj al Li, tiuj ricevos kion ili petis. Sed kiuj ne estas sklavoj al la Sinjoro, tiuj ne ricevos. 7 Sed se iu faras nur unu agon, li ankaŭ povas esti sklavoj al la Sinjoro. Ĉar lia menso ne koruptiĝas for de la Sinjoro, sed li estos sklavoj al Li, ĉar menson puran li havas. 8 Se tion vi do faros, vi povos esti fruktodona por la venonta mondo; kaj kiu tion faras, tiu estos fruktodona.

¹⁴La sama vorto ankaŭ signifas *rikolto*.

Kvina Parabolo

La fasto, plaĉa al Dio

1 [54]: 1 Dum fastotago mi sidas sur monto, kaj dankas la Sinjoron pro ĉio, kion Li faris por mi, kaj tiam mi vidas la Paŝtiston eksidi apud mi; li diris:

Kial frumatene vi venis ĉi tien?

Ĉar, sinjoro, – mi diris – mi faras *stacion*¹⁵.

2 Kio – li diris – estas *stacio*?

Mi fastas, sinjoro – mi diris.

Fastado – li diris – kio estas?

Kiel mi kutimas, sinjoro – mi diris – tiel mi fastas.

3 Vi – li diris – vi ne scias fasti por la Sinjoro, kaj ne estas tio fastado, tiu senutila <fastado>, kiun vi fastas por Li.

Kial – mi diris –, sinjoro, tion vi diras?

Mi diras tion al vi – li diris – ĉar tio ne estas fastado, en kiu vi pensas fasti por la Sinjoro; sed mi instruos al vi, kio estas kompleta fastado kaj plaĉa al la Sinjoro. Aŭskultu – li diris al mi. 4 Dio ne deziras tian vanan fastadon; ĉar tiel fastante por Dio nenion vi faras por justeco. Sed fastado por Dio jenan fastadon: 5 ne faru malbonon en via vivo, estu sklavo de Dio kun pura koro; gardu Liajn ordonojn kaj promenu laŭ Liaj reguloj, kaj neniu malbona deziro leviĝu en via koro; fidu je Dio; kaj kiam tion vi faras kaj havas timon antaŭ Li kaj detenas vin de ĉiu malbona ago, tiam vi vivos antaŭ Dio. Kaj se tion vi faras, vi faras grandan fastadon, kiu estas plaĉa al Dio.

¹⁵Tiu nekutima Helena vorto στατίων [statíon] estas en la originalo.

Parabolo pri la sklavo kaj la vitejo

2 [55]: 1 Aŭskultu la Parabolon, kiun mi rakontos al vi koncerne la fastadon. 2 Iu havis kampon kaj multajn sklavojn, kaj parton de sia kampo li priplantis kiel vitejon. Li elektis certan sklavon, kiu estis fidinda, plaĉa kaj honorata, kaj diris al li:

Prenu tiun vitejon, kiun mi plantis, kaj metu palisaron ĉirkaŭ ĝi, ĝis mi venos, sed nenion alian vi faru pri la vitejo. Tiun mian ordonon vi gardu, kaj vi estos libera en mia domo. Kaj la mastro de la sklavo foriris eksterlanden.

3 Kiam li foriris, la sklavo prenis la vitejon kaj metis la palisaron. Kaj fininte la palisaron de la vitejo, li vidis, ke la vitejo plenas je trudherboj. 4 Li do pensis en si mem: Tiun ordonon de mia mastro mi plenumis; mi do cetere prifosos tiun vitejon, kaj ĝi fariĝos tute ordigita, kaj sen la trudherboj ĝi donos pli da fruktoj, ĉar la trudherboj ne sufokos ĝin. Li prenis kaj prifosos la vitejon, kaj ĉiujn trudherbojn, kiuj estis en la vitejo, li elŝiris. Kaj tiu vitejo fariĝis plej bonstata kaj floranta, ĉar trudherboj ne sufokis ĝin.

5 Post iom da tempo venis la mastro de la sklavo kaj de la kampo, kaj li eniris la vitejon. Kaj vidante la vitejon bone palisarumita, kaj krome prifosita kaj senigita de ĉiuj trudherboj, dum ĉiuj vitoj floris, li ege ĝojis pri la agoj de la sklavo. 6 Alvokinte do sian amatan filon, kiu estis lia heredonto, kaj la amikojn, kiuj estis liaj konsilantoj, li diris al ili, kion li ordonis al la sklavo, kaj kiel multe li konstatis lin esti farinta. Kaj ili kunĝojis kun la sklavo, pro la atesto, kiun donis pri li la mastro. 7 Kaj li diris al ili:

Al tiu ĉi sklavo mi promesis la liberecon, se la ordonon, kiun mi donis al li, li povas gardi; kaj li gardis mian ordonon kaj krome faris bonan laboron pri mia vitejo kaj li ege plaĉis al mi. Komence pro tio, kion li faris, mi volas fari lin kun-heredonto de mia filo, ĉar kiam bonan ideon li ekhavis, li ne forpuŝis ĝin, sed plenumis ĝin. 8 Pri tiu opinio la filo de la mastro konsentis kun li, ke kun-heredonto kun la filo fariĝu la sklavo.

9 Post kelkaj tagoj lia mastro preparis festenon, kaj li sendis multajn manĝaĵojn. La sklavo prenis ĉion, kion sendis al li la mastro, kaj prenis kio sufiĉis por li, sed la ceteron li disdonis inter la kunsklavoj. 10 Liaj kunsklavoj prenis la frandaĵojn, ĝojis kaj komencis preĝi pri li, ke li havu pli da favoro ĉe la mastro, ĉar tiel bele li traktis ilin.

11 Ĉiujn ĉi okazaĵojn aŭdis lia mastro, kaj denove li ege ĝojis pri la agado. Denove kunvokis siajn amikojn la mastro kaj la filon, kaj rakontis al ili, kion faris la sklavo pri la manĝaĵoj, kiujn li ricevis; kaj ili des pli aprobis tion, ke la sklavo fariĝu kun-heredanto kun la filo.

Unua klarigo pri la Parabolo

3 [56]: 1 Mi diris:

Sinjoro, tiun Parabolon mi ne komprenas, kaj mi ne povas kapti ĝin, se vi ne klarigas al mi.

2 Ĉion mi klarigos al vi – li diris – kaj ĉion, kion mi diros, mi eksplikos al vi. La Ordonojn de la Sinjoro vi gardu, kaj vi estos plaĉa al Dio, kaj enskribiĝos en la nombron de tiuj, kiuj gardas Liajn Ordonojn. 3 Sed se ion bonan vi faras ekster la Ordonoj de Dio, vi akiros pli grandan gloron por vi mem, kaj vi estos pli glora antaŭ Dio ol alimaniere vi estus. Sed se vi gardas ĉiujn Ordonojn de Dio kaj krome aldonas tiujn ĉi servojn, vi ĝojos, se vi gardos ilin laŭ mia Ordonon.

4 Mi diris al li:

Sinjoro, se vi ordonas ion al mi, tion mi gardos; ĉar mi ja scias, ke vi estos kun mi.

Jes – li diris – mi estos kun vi, ĉar tiel grandan entuziasmon vi havas por fari bonon, kaj mi estos kun ĉiuj – li diris –, kiuj havas tian saman entuziasmon.

5 Tiu fasto – li diris al mi –, se la Ordonojn de la Sinjoro vi tenas, estas tre bona. Tiel vi gardos tiun faston, kiun vi volas fasti: 6 plej unue detenu vin de ĉiu malbona diro kaj de ĉiu malbona deziro, kaj purigu vian koron de la vantaĵoj de tiu ĉi mondo. Se tion vi gardos, via fasto estos perfekta.

7 Kaj tiel vi agu: plenumu tion, kio estas skribita, kaj en tiu tago, kiam vi fastas, nenion manĝu, se ne estas pano aŭ akvo; kaj el la manĝaĵoj, kiujn vi estus manĝonta, kalkulu la kvanton de la elspezoj, kiujn tiutage vi elspezus por manĝi, kaj donu tion al malriĉulo aŭ orfo aŭ bezonulo, kaj tiel vi humiliĝos vian menson, por ke tiu, kiu el via humiliĝo ricevis, satigu sian animon kaj preĝu por vi al la Sinjoro.

8 Se tiel vi agas en via fasto, kiel mi ordonas al vi, via ofero estos akceptita de Dio, kaj tiu via fasto estos notita, kaj la servo plenumita estos bona kaj ĝoja kaj plaĉa al la Sinjoro.

9 Tion vi gardu kun viaj infanoj kaj kun via tuta domo. Se ĝin vi faras, vi estos feliĉa; kaj ĉiuj, kiuj aŭdas kaj gardas ĝin, estos feliĉaj, kaj ĉion, kion ili petos de la Sinjoro, tion ili ricevos.

Nova klarigo pri la Parabolo

4 [57]: 1 Mi demandis lin multe, por ke li klarigu la Parabolon de la kampo kaj la vitejo kaj la sklavo, kiu metis palisaron ĉirkaŭ la vitejo, [kaj la palisaro,] kaj la trudherboj, kiuj estis elŝiritaj el la vitejo, kaj la filo kaj la amikoj, la konsilantoj. Ĉar mi komprenis, ke ĉio ĉi estas Parabolo.

2 Li responde diris al mi:

Estreme aroganta vi estas en via demandado. Vi devus – li diris – entute nenion demandi; ĉar se necesas, ke por vi klariĝos, ja klariĝos.

Sed mi diris al li:

Sinjoro, se al mi ion vi montras kaj ne klarigas, vane tion mi estos vidinta, kaj ne komprenos, kio estas. Same, se Parabolojn vi parolas al mi kaj ne eksplikas ilin al mi, vane mi estos aŭdinta ion de vi.

3 Li responde diris al mi:

Ĉiu, kiu estas sklavo de Dio kaj tenas la Sinjoron en sia koro, tiu petas komprenon de Li kaj tion ricevas, kaj ĉiu Parabolo klariĝas, kaj la paroloj, kiujn diris la Sinjoro en Paraboloj, fariĝos klaraj al li; sed ĉiuj, kiuj estas softaj kaj vanaj en la preĝado, tiuj hezitas peti la Sinjoron. 4 Sed la Sinjoro

estas mult-kompatema, kaj al ĉiuj, kiuj petas de Li, senintermite Li donas. Sed vi, kiuj estas fortikigitaj de la sankta anĝelo kaj ricevis <forton por> preĝi, kaj kiuj ne estas vanaj – kial vi ne petas de la Sinjoro komprenon, kaj vi ricevos de Li?

5 Mi diris al li:

Sinjoro, mi havas vin ĉe mi, kaj ne bezonas peti de vi kaj pridemandi; ĉar vi montras al mi ĉion kaj parolas kun mi; sed se sen vi mi vidus aŭ aŭdus tion, mi demandus la Sinjoron, ke Li klarigu al mi.

5 [58]: 1 Mi ĵus diris al vi – li diris –, ke senskrupula vi estas kaj aroganta, petante pri interpretadoj de la Paraboloj. Sed ĉar vi estas tiel fia, mi klarigos al vi la Parabolon de la kampo kaj ĉio cetera, por ke al ĉiuj tion vi sciigu. Aŭskultu do – li diris – kaj provu kompreni.

2 La kampo estas ĉi mondo; la sinjoro de la kampo estas Tiu, kiu ĉion kreis kaj ordigis kaj kapabligis. [La filo estas la Sankta Spirito]; la sklavo estas la Filo de Dio, kaj la vitoj estas la popolo, kiun Li mem plantis; 3 la palisoj estas la sanktaj anĝeloj de la Sinjoro, kiuj protektas Lian popolon; kaj la trudherboj, kiuj estas elŝiritaj, estas la kulpoj de la sklavoj de Dio; la manĝaĵoj, kiujn <la mastro> sendis el la festeno, estas la ordonoj, kiujn Li donis al Sia popolo pere de Sia Filo; la amikoj kaj konsilantoj – la sanktaj anĝeloj, kiuj antaŭe estis kreitaj; kaj la foriro eksterlanden de la mastro estas la tempo restanta ĝis Lia veno.

4 Tiam mi diris al li:

Sinjoro, ĉiuj tiuj aferoj estas grandaj kaj mirindaj, kaj ĉiuj gloraj. Tion mi ja ne povis kompreni. <Nek mi> nek iu alia el la homoj, kiel ajn saĝa li estu, povas tion kompreni. Tamen – mi diris –, sinjoro, klarigu al mi ĉion, kion mi estas demandonta.

5 Diru do – li diris –, se ion vi deziras.

Kial, sinjoro, – mi diris – la Filo de Dio en la Parabolo havas la funkcion de sklavo?

6 [59]: 1 Aŭskultu – li diris –: la Filo de Dio ne havas la funkcion de sklavo, sed li havas grandan povon kaj sinjorecon.

Kiel – mi diris – kiel, sinjoro? Mi ne komprenas.

2 Ĉar – li diris – Dio plantis la vitejon, t. e. kreis la popolon, kaj donis ĝin al Sia Filo; kaj la Filo metis siajn anĝelojn super ili por gardi ilin; kaj mem li purigis iliajn pekojn, suferante multe kaj eltenante multajn dolorojn; ĉar neniu vito povas esti ĉirkaŭfosita sen penado aŭ sufero. 3 Post kiam mem li purigis la pekojn de sia popolo, li montris al ili la padojn de la vivo, donante al ili la leĝon, kiun li ricevis de sia Patro. 4 Vi do vidas – li diris –, ke li mem estas la Sinjoro de la popolo, ĉar li ricevis ĉiun gloron de sia Patro. Sed kiel la Sinjoro prenis Sian Filon kaj la glorajn anĝelojn kiel konsilantojn pri la heredaĵo de la sklavo, aŭdu do: 5 la Sankta Preekzistanta Spirito, kiu kreis la tutan kreon, Dio, ekloĝis en karnon, laŭ Sia deziro. Tiu ĉi karno do, en kiu loĝis la Sankta Spirito, estis sklavo al la Spirito, honore promenante en sankteco kaj pureco, sen ia ajn malpurigo al la Spirito. 6 Kiam ĝi (la karno = «tiu homo», Jesuo) do honore estis vivinta bele kaj pure, kaj kunpenadis kun la Spirito kaj kunlaboris kun ĝi en ĉio, kuraĝe kaj brave kondukante, Li prenis ĝin kiel partneron kun la Sankta Spirito; ĉar la vivado de tiu karno plaĉas al Dio, ĉar havante surtere la Sanktan Spiriton, li ne malpurigis sin. 7 Tial Li prenis la Filon kaj la glorajn anĝelojn kiel konsilantojn, por ke tiu karno, kiu senriproĉe estis sklavo al la Spirito, ankaŭ ricevu certan lokon por loĝi, kaj ne ŝajne perdis la rekompencan pro tiu sklava servado¹⁶; ĉar ricevos sian rekompencan ĉiu karno, kiu montriĝas nemalpurigita kaj senmakula, en kiu loĝas la Sankta Spirito.

8 Tio do vi havas la klarigon de tiu ĉi parabolo.

7 [60]: 1 Kun ĝojo – mi diris –, sinjoro, mi aŭdis tiun klarigon.

Aŭskultu nun do – li diris: Tenu pura tiun vian karnon kaj senmakula, por ke la Spirito, kiu loĝas en ĝi, atestu pri ĝi, kaj via karno estu justigita. 2 Atentu, ke neniam eniru en vian koron <la ideo>, ke tiu via karno estas pereema kaj vi misuzu ĝin en iu malpurigo. Ĉar se vian karnon vi malpurigas, ankaŭ la Sanktan Spiriton vi malpurigas; kaj se vi malpurigas la Spiriton, vi ne vivos.

¹⁶ En la teologio tiu dogma tezo, ke Jesuo, homo plena je Sankta Spirito, poste de Dio Patro estis adoptita kiel Filo, estas konata kiel *adoptismo*.

3 Sed, sinjoro, – mi diris –, se ekzistas sencio antaŭe, antaŭ ol aŭdiĝis tiuj vortoj, kiel do saviĝos la homo, kiu malpurigis sian karnon?

Pri la antaŭaj sencioj – li diris – nur al Dio mem estas eble doni sanigon; ĉar Lia estas ĉiu potenco. 4 Sed nun gardu vin mem, kaj la Sinjoro la Ĉioreganta estas plej kompatema, kaj pri la antaŭaj sencioj Li donos sanigon, se vi almenaŭ ne malpurigas vian karnon nek la Spiriton; ambaŭ ja estas komunaj kaj ne povas esti malpurigitaj unu sen la alia. Ambaŭ vi do gardu puraj, kaj vi vivos antaŭ Dio.

Sesa Parabolo

Gardado de la Ordonoj

1 [61]: 1 Sidante en mia domo kaj glorante la Sinjoron pro ĉio, kion mi vidis, mi pripensis pri la Ordonoj, kiel belaj kaj potencaj kaj ĝojaj kaj gloraj ili estas, kapablaj savi la animon de la homoj, kaj mi diris en mi mem: Feliĉa mi estos, se mi promenos laŭ tiuj Ordonoj, kaj ĉiu, kiu tiel promenos, estos feliĉa.

2 Dum ĉi tion mi diris en mi mem, subite mi vidas, ke li mem sidas apud mi kaj diras al mi:

Kial vi tiom dubas pri la Ordonoj, kiun mi ordonis al vi? Ili estas belaj; absolute ne dubu, sed vestu vin per la fido de la Sinjoro, kaj vi promenos en ili; mi ja fortikigos vin en ili. 3 Tiuj Ordonoj estas taŭgaj por tiuj, kiuj volas penti; ĉar se ili ne promenas laŭ tiuj, ilia pento estas vana.

4 Vi ĉiuj do, kiuj pentas, forĵetu de vi la malbonon de ĉi tiu mondo, kiu eluzas vin; kaj se vi vestas vin per ĉiu virto de justeco, vi povas gardi tiujn Ordonojn kaj ne plu aldonos al viaj pekoj. Se vi nenion al ili plu aldonas, vi forpaŝos de viaj antaŭaj pekoj. Promenu do laŭ miaj Ordonoj, kaj vi vivos antaŭ Dio. Ĉio ĉi estas, kion mi devis diri al vi.

La du paŝtistoj

5 Kaj post kiam ĉion ĉi li diris al mi, li diris al mi:

Ni iru sur la kampon, kaj tie mi montros al vi la paŝtistojn de la ŝafoj.

Bone, ni iru, sinjoro – mi diris.

Kaj ni iris al iu ebenaĵo, kaj li montris al mi junan paŝtiston, vestitan en leĝera mantelo, kun safrana koloro. 6 Li paŝtis ege multe da ŝafoj, kaj tiuj ŝafoj por tiel diri ĝuis en delicoj kaj estis tre gajaj, kaj plezure ili saltetadis tien kaj reen; kaj la paŝtisto mem estis tre gaja ĉe sia ŝafaro; lia aspekto estas tre ĝoja, kaj inter la ŝafoj li ĉirkaŭiris. Ankaŭ aliajn ŝafojn mi vidis, kiuj fartis bone kaj ĝuis en certa loko, sed tiuj ne saltetis.

2 [62]: 1 Kaj li diris al mi:

Ĉu vi vidas tiun paŝtiston?

Mi lin vidas, sinjoro – mi diris.

Tiu ĉi – li diris al mi – estas la anĝelo de sinplaĉo kaj trompo. Tiu pereigas la animojn de la sklavoj de Dio kaj forpelas ilin de la vero, trompante ilin per la malbonaj deziroj, en kiuj ili pereos. 2 Ĉar ili forgesos la Ordonojn de la Vivanta Dio, kaj promenos laŭ vanaj trompoj kaj agoj de sinplaĉo, kaj ili estos neniigitaj de tiu anĝelo, kelkaj al la morto, aliaj al pereco.

3 Mi diris al li:

Sinjoro, mi ne komprenas, kio estas «al morto» kaj kio estas «al pereco».

Aŭskultu – li diris –: La ŝafoj, kiujn vi vidas gajaj kaj saltetantaj, tiuj estas tiuj, kiuj komplete estas disigitaj de Dio kaj transdonis sin al la deziroj de ĉi tiu mondo. En tiuj, do, tute ne estas pentado al la vivo; per siaj pekoj ili tion kaŭzis. Kaj kontraŭ la nomo de Dio ili blasfemis. Ilia vivo do estas la morto. 4 Sed la ŝafoj, kiujn vi vidis ne saltetantaj, sed certaloke paŝtiĝantaj, tiuj estas tiuj, kiuj transdonis sin ja al sinplaĉo kaj trompo, sed kontraŭ la Sinjoro ili ne blasfemis. Tiuj do estas neniigitaj disde la vero; sed en ili ankoraŭ restas espero je pentado, en kiu ili povas vivi. Tiu neniigo enhavas do esperon je certa resurekto, sed la morto enhavas eternan perecon.

5 Ni iris iom plu, kaj li montris al mi altan paŝtiston, aspekte iom sovaĝan, kiu portis blankan kaprinan felon ĉirkaŭ la ŝultroj; <li havis> bastonon tre fortan kun nodoj, kaj grandan vipon. Lia rigardo estis tre severa, tiel ke mi ektimis lin. 6 Tiu paŝtisto, do, transprenis la ŝafojn de la juna paŝtisto, tiujn tre gajajn kaj bone ĝuantajn, sed ili ne saltetadis, kaj li metis ilin en certan lokon, kiu estis kruta kaj plena je dornoj kaj kardoj, tiel ke la ŝafoj ne povis malimpliki sin de la dornoj kaj kardoj, sed implikiĝis inter la dornoj kaj kardoj. 7 Kaj enplektitaj do en tiuj dornoj kaj kardoj, ili estis paŝtataj, kaj estis en granda mizero, ĉar li vipis ilin; kaj li peladis ilin tien ĉi tien, kaj ne donis ripozon al ili, kaj entute tiuj ŝafoj ne havis agrablan tempon.

3 [63]: 1 Kiam mi vidis, ke ili tiom estas vipataj kaj mizeraj, mi suferis pro ili, ĉar ili estis tiom torturataj kaj absolute ne havis kvieton. 2 Mi do diris al la paŝtisto, kiu parolis kun mi:

Sinjoro, kiu estas la paŝtisto, kiu estas tiel senkompata kaj severa kaj tute ne kompatas pri tiuj ŝafoj?

Tio – li diris – estas la anĝelo de la puno. Li estas unu el la justaj anĝeloj, kaj lia tasko estas la punado. 3 Tial li do ricevas tujn, kiuj forvadis de Dio kaj promenas laŭ deziroj kaj trompoj de ĉi mondo, kaj li punas ilin, kiel ili meritas, per teruraj kaj buntaj punoj.

4 Volonte, sinjoro, – mi diris – mi ŝatus ekscii, kiaj estas tiuj buntaj punoj.

Aŭskultu, sinjoro, – li diris – pri la buntaj torturoj kaj punoj. Tiuj torturoj estas ĉi-mondaj; kelkaj ja estas punataj per perdoj, aliaj per malriĉecoj, ree aliaj per plej diversaj malsanoj, aliaj per ĉiuspecaj perturboj, aliaj per mistraktado fare de malinduloj kaj suferante pro multaj aliaj katastrofoj. 5 Ĉar multaj estas nestabilaj en siaj planoj, entreprenas multege, sed nenio al ili sukcesas. Kaj tiam ili diras, ke al ili ne prosperas en iliaj agoj, kaj ne venas al ili en la kapon, ke ili faris malbonajn aferojn, sed ili kulpigas la Sinjoron. 6 Kiam ili do afliktiĝas per ĉia aflikto, tiam ili estas transdonataj al mi¹⁷ por bona edukado kaj ili estas fortikigitaj en la fido de la Sinjoro, kaj la ceterajn tagojn de sia vivo ili estos sklavoj de la

¹⁷ Atentu, ke subite eniĝas «mi».

Sinjoro en pura koro; sed se ili pentas, leviĝas en ilia koro la malbonaj agoj, kiujn ili faris, kaj tiam ili laŭdos Dion, dirante, ke justa juĝanto Li estas kaj prave suferis ĉiu, laŭ siaj faroj; post tio ili estos sklavoj de la Sinjoro en pura koro] kaj ili prosperos en ĉiuj siaj faroj, ricevante de la Sinjoro ĉion, kion ili petas; kaj tiam ili laŭdos la Sinjoron, ke al mi ili estis transdonitaj, kaj ili ne plu suferos malbonon.

4 [64]: 1 Mi diris al li:

Sinjoro klarigu ankaŭ tion ĉi ankoraŭ al mi.

Kion do – li diris – vi ŝatus demandi?

Sinjoro, – mi diris – ĉu tiuj, kiuj vivas en sinplaĉo kaj trompo, estas torturataj same longe, kiel ili vivas en sinplaĉo kaj trompo?

Li diris al mi:

Same longe ili estas torturataj.

2 Tre mallonge do, sinjoro – mi diris –, ili estas torturataj; ĉar tiuj, kiuj tiom vivas en sinplaĉo kaj trompo, devus sepoble esti torturataj.

3 Li diris al mi:

Sensaĝa vi estas kaj vi ne komprenas la forton de tiu torturo.

Prave – mi diris – ĉar se mi komprenus, sinjoro, mi ja ne petus, ke vi klarigu al mi.

Aŭskultu – li diris – la forton de ambaŭ. 4 Nu do, la tempo de sinplaĉo kaj trompo estas unu horo; sed tiu horo de la tortura puno havas la forton de 30 tagoj. Se do iu vivas en sinplaĉo kaj trompo unu tagon, kaj estas unu tagon torturata, tiu unu tago da tormento egalas al tuta jaro¹⁸. Do kiom da tagoj iu vivas en sinplaĉo, tiom da jaroj li estas torturata. Vi do vidas – li diris – ke la tempo de sinplaĉo kaj trompo estas plej malgranda, sed tiu de puno kaj torturo granda.

¹⁸ 1 tago = 12 horoj x 30 tagoj = 360 tagoj = unu jaro.

5 [65]: 1 Sinjoro, – mi diris – mi ankoraŭ ne tute komprenas pri la tempo de la trompo, la sinplaĉo kaj la puno; vi bonvolu pliklarigi al mi.

2 Li respondis, dirante:

Via malsaĝeco estas obstina, kaj vi ne purigos vian koron aŭ fariĝos sklavo de Dio. Atentu – li diris –, ke la tempo ne plenumiĝu kaj vi troviĝos sensenca. Aŭskultu do – li diris –, same kiel vi deziras, ke vi komprenu tion. 3 Kiu vivas en sinplaĉo kaj trompo unu tagon, farante, kion li volas, vestas sin en multa malsaĝeco kaj ne komprenas la agon, kiun li faras; ĉar matene li jam forgesas, kion la antaŭan tagon li faris. Sinplaĉo kaj trompo ja ne havas memoron, pro la malsaĝeco, en kiu li vestas sin. Sed kiam la puno aŭ la torturo fiksiĝas unu tagon al la homo, li estas punata kaj torturata ĝis plenan jaron, ĉar puno kaj torturo havas longan memoron. 4 Do tutan jaron punate kaj torturate, la homo memoras foje pri sia sinplaĉo kaj la trompo, kaj ekkomprenas, kion pro tio li suferas. Do ĉiu homo, kiu vivas en sinplaĉo kaj en trompo, tiel estas punata, ĉar kvankam ili havas la vivon, ili transdonis sin al la morto.

5 Kiu speco de sinplaĉo, sinjoro, – mi diris – estas malutila?

Ĉiu agado – li diris – estas tia por la homo, se li grandplezure ĝin faras; ĉar la koleriĝema homo estas sinplaĉa, kiam li cedas al sia pasio; kaj la adultulo kaj la ebriulo kaj la kalumnianto kaj la mensogulo kaj la havemulo kaj la trompisto kaj tiu, kiu faras similajn aferojn – ĉiu cedas al sia propra pasio; li do vivas en sinplaĉo. 6 Ĉiuj ĉi specoj de sinplaĉo estas malutilaj por la sklavoj de Dio. Pro tiuj trompaĵoj do suferas tiuj, kiuj estas punataj kaj torturataj.

7 Sed ankaŭ ekzistas specoj de sinplaĉo, kiuj savas la homojn; ĉar multaj sinplaĉe faras bonon, ĝuante pro la plezuro, kiun tio liveras. Tiu speco de sinplaĉo do estas utila por la sklavoj de Dio kaj donas vivon al tia homo; sed la malutilaj formoj de sinplaĉo supre menciitaj alportas torturojn kaj punojn al ili; kaj se ili daŭras ĉe tio kaj ne pentas, ili alportas al si la morton.

Sepa Parabolo

La anĝelo de la puno hejme ĉe Hermas

1 [66]: 1 Post kelkaj tagoj mi vidis lin sur la sama ebenaĵo, kie mi ankaŭ vidis la <du> paŝtistojn. Kaj li diris al mi:

Kion vi serĉas?

Mi estas ĉi tie, – mi diris – sinjoro, por ke vi petu la punantan anĝelon eliri el mia domo, ĉar li ja ege suferigas min.

Necesas, – li diris – ke vi suferu. Ĉar jene ordonis pri vi la glora anĝelo, ĉar li volas ke vi estu elprovata.

Kial, – mi diris – kion mi do faris tiel malbonan, ke al tiu anĝelo mi estu transdonata?

2 Aŭskultu – li diris –: viaj pekoj estas multaj, sed ne tiaj, ke vi estu transdonata al tiu anĝelo. Sed via domo¹⁹ faris grandajn maljustaĵojn kaj grandajn pekojn, kaj la glora anĝelo amariĝis pri iliaj agoj, kaj tial li petis vin afliktiĝi iom da tempo, por ke ankaŭ ili pentu kaj purigu sin de ĉiu deziro de ĉi tiu mondo. Kiam ili do pentos kaj purigos sin, tiam la anĝelo de la puno foriros de vi.

3 Mi diris al li:

Sinjoro, se ili faris similajn aferojn, ke amariĝu la glora anĝelo – kion do faris mi?

Alie – li diris – ili ne povas afliktiĝi, se ne vi, la kapo de la domo, afliktiĝas. Ĉar se vi afliktiĝas, neeviteble ankaŭ ili afliktiĝas, sed se vi bonfartas, ili neniel povas afliktiĝi.

4 Sed – mi diris – jen, sinjoro, ili jam pentis tutkore.

Mi scias – li diris –, ke ili pentis el sia tuta koro; sed se ili pentis, ĉu vi kredas, ke tuj la pekoj estas pardonitaj? Absolute ne. Ĉar necesas, ke la

¹⁹ Inkluzive de liaj infanoj. Vidu en Hermas 3 [7]:1.

homo, kiu pentas, turmentu sian propran animon kaj ke li estu plene humila en ĉiu sia agado, kaj afliktiĝu en la plej buntaj afliktiĝoj. Kaj se li suferis la afliktiĝojn, kiuj trafis lin, certege ekkompatos Tiu, kiu kreis kaj fortikigis ĉion, kaj Li donos al li certan sanigon; 5 kaj tion <Dio faros> absolute, kiam Li vidas la koron de tiu, kiu pentas, senigita de malbonaĵo. Al vi estas plej bone, ke nun vi kunsuferu kun via domo. Kial ankoraŭ multe mi diru? Afliktiĝi vi devas, kiel preskribis tiu anĝelo de la Sinjoro, kiu transdonis vin al mi. Kaj pro tio vi danku la Sinjoron, ĉar Li opiniis vin inda, ke anticipu estu al vi klarigita la afliktiĝo, por ke anticipu sciante pri ĝi vi eltenu ĝin kuraĝe.

6 Mi diris al li:

Sinjoro, vi estu kun mi, kaj ĉiun afliktiĝon mi povos elteni.

Mi estos kun vi – li diris –; kaj mi petos la anĝelon, kiu punas, ke pli leĝere li afliktu vin; sed mallongan tempon vi afliktiĝos, kaj poste ree vi estos restarigita en via domo. Nur eltenu en humilo kaj servado al la Sinjoro kun via tuta koro, vi kaj via infanoj kaj via domo, kaj promenu laŭ la Ordonoj, kiujn mi donas al vi, kaj via pento povas esti forta kaj pura.

7 Kaj se vi gardos miajn Ordonojn kun via tuta domo, ĉiu afliktiĝo cedos de vi; kaj la afliktiĝo cedos de ĉiuj – li diris –, kiuj promenos laŭ ĉi tiuj Ordonoj.

Oka Parabolo

La saliko kiu kovras la teron

1 [67]: 1 Li montris al mi grandan salikon, kiu kovris ebenaĵojn kaj montojn, kaj sub ĝia ŝirmo kunvenis ĉiuj, kiuj estis nomataj je la nomo de la Sinjoro. 2 Staris anĝelo de la Sinjoro, tre glora kaj altega, apud la saliko, kaj li havis grandan falĉilon, kaj tranĉis branĉojn de la saliko, kaj donis tiujn al la popolo, kiu ŝirmis sin sub la saliko; etajn bastonojn li donis al ili, ĉirkaŭ kubuton longajn. 3 Post kiam ĉiuj ricevis la bastonojn, la anĝelo formetis la falĉilon, kaj la arbo aspektis same sana kiel antaŭe mi ĝin vidis.

4 Mi miris ĉe mi mem, dirante:

Kiel, post kiam tiom da branĉoj estis fortranĉitaj, tiu arbo restas sana?

Tiam al mi diris la Paŝtisto:

Ne miru pri tio, ke la arbo restis sana, post kiam tiom da branĉoj estis fortranĉitaj. Sed atendu ĝis vi estos vidinta ĉion, kaj klariĝos al vi, kio estas.

Redonado de la bastonoj

5 La sama anĝelo, kiu donis la bastonojn al la homoj, repostulis ilin de ili; laŭvice kiel ili ricevis ilin, tiuvice li ankaŭ vokis ilin ĉe sin, kaj ĉiu el ili redonis la bastonon. La anĝelo de la Sinjoro ricevis ilin kaj atente ekzamenis. 6 De kelkaj la bastonojn li rericevis elsekiĝintaj kaj rongĉitaj kvazaŭ de tineo²⁰; ordonis la anĝelo, ke tiuj, kiuj redonis tiajn bastonojn, staru flanke. 7 Aliaj redonis ilin elsekiĝintaj, sed ili ne estis rongĉitaj de tineo; ankaŭ tiujn li ordonis stari flanke. 8 Aliaj redonis ilin duonsekiĝintaj; ankaŭ tiuj ekstaris flanke. 9 Aliaj redonis la bastonojn duonsekiĝintaj sed kun fendetoj; ankaŭ tiuj ekstaris flanke. 10 Aliaj redonis siajn bastonojn verdaj sed kun fendetoj; ankaŭ tiuj ekstaris flanke. 11 Aliaj redonis siajn bastonojn duon-sekiĝintaj kaj duon-verdaj; ankaŭ tiuj ekstaris flanke. 12 Aliaj prezentis la bastonojn, du-trione verdaj, kaj trione sekiĝintaj²¹; ankaŭ tiuj ekstaris flanke. 13 Aliaj redonis du-trione sekiĝintaj kaj trione verdaj; ankaŭ tiuj ekstaris flanke. 14 Aliaj redonis siajn bastonojn preskaŭ tute verdaj, sed eta ekstremaĵo estis sekiĝinta, ĉe la pinto; fendetojn ili havis; kaj ankaŭ tiuj ekstaris flanke. 15 El la ceteraj eta parto estis verda, la resto de la bastonoj estis sekiĝinta; kaj ankaŭ tiuj ekstaris flanke. 16 La ceteraj alvenis kun bastonoj verdaj, kiaj ili ricevis ilin de la anĝelo; la plimulto de la amaso redonis tiajn bastonojn. Pri ili la anĝelo tre ĝojis; ankaŭ ili ekstaris flanke. 17 Aliaj redonis siajn bastonojn verdaj kaj kun freŝaj ŝosoj; kaj tiuj ekstaris flanke; kaj ankaŭ pri ili la anĝelo tre ĝojis. 18 Aliaj redonis siajn bastonojn verdaj

²⁰ Aŭ de alia besteto.

²¹ Variaĵo: grandparte verdaj, etparte sekiĝintaj.

kaj kun freŝaj ŝosoj; sed tiuj ŝosoj havis iaspecan frukton. Kaj ege gajaj estis tiuj homoj, kies bastonoj montriĝis esti tiaj. Kaj la anĝelo pri ili jubilis, kaj la paŝtisto estis tre ĝoja pri ili.

2 [68]: 1 La anĝelo de la Sinjoro tiam ordonis, ke kronojn oni alportu; kaj estis alportitaj kronoj, faritaj el palmbranĉoj. Kaj li kronis la virojn, kiuj redonis la bastonojn kun la ŝosoj kaj la fruktoj, kaj li forsendis ilin en la turon. 2 Ankaŭ la ceterajn li sendis en la turon, tiujn kiuj redonis la verdajn bastonojn kaj kun ŝosoj, sed ŝosoj sen fruktoj; kaj li metis al ili sigelon. 3 Vestaĵon tute saman ili ĉiuj portis, blankan kiel neĝo – ĉiuj, kiuj iris en la turon. 4 Ankaŭ tiujn, kiuj redonis la bastonojn verdaj kiel ili ricevis ilin, li forsendis, doninte al ili <blankan> vestaĵon kaj sigelon.

5 Post kiam tion finis la anĝelo, li diris al la Paŝtisto:

Mi foriras, sed vi forsendu ilin al <iliaj lokoj interne de> la muroj, laŭ tio, kiel indas loĝi ĉiu unuope. Sed iliajn bastonojn vi kontrolu zorgeme, kaj tiel forsendu ilin; sed zorgeme vi kontrolu ilin. Atentu, ke neniu eskapas vin – li diris. Sed se iu eskapas vin, mi prijuĝos lin ĉe la altaro.

Tion dirinte al la Paŝtisto, li foriris.

La replantado de la bastonoj

6 Post kiam foriris la anĝelo, la Paŝtisto diris al mi:

Ni prenu ĉies bastonojn kaj ni plantu ilin <por vidi>, ĉu eble kelkaj el ili ankoraŭ povas vivi.

Kaj mi diris al li:

Sinjoro, tiuj sekiĝintaj <bastonoj>, kiel ili povas ankoraŭ vivi?

7 Sed li respondis al mi:

Tiu arbo estas saliko, kaj tiu speco estas tre vivi-vola; se ili do estos plantitaj kaj nur ete da akvo ricevos la bastonoj, multaj el ili vivos; poste ni provu elverŝi akvon sur ilin. Se iu el ili povos vivi, mi ĝojos kun ili; sed se ĝi ne vivos, mi almenaŭ ne montriĝos neglektema.

8 La Paŝtisto petis min, alvoki ilin, laŭ tio kie ili troviĝis. Ili venis do grupo post grupo, kaj ili redonis la bastonojn al la Paŝtisto. Akceptis la Paŝtisto la bastonojn. Kaj li plantis ilin laŭgrupe, kaj poste multan akvon li verŝis super ilin, tiel ke la bastonoj ne plu estis videblaj pro la akvo.

9 Kaj post kiam li akvumis la bastonojn, li diris al mi:

Nun ni iru kaj post kelkaj tagoj ni revenu kaj esploru ĉiujn bastonojn; ĉar Kiu kreis tiun arbon, deziras, ke vivas ĉiuj, kiuj ricevis branĉojn el tiu arbo. Mi do atendas, ke tiuj bastonetoj, ricevinte iom da humideco kaj bone akvumite, – ke la plimulto el ili vivos.

Kion simbolas tiu saliko kaj tiuj bastonoj

3 [69]: 1 Mi diris al li:

Sinjoro, klarigu al mi, kion signifas tiu arbo. Ĉar mi estas konfuzita pri ĝi, ĉar tiom da branĉoj estis fortranĉitaj kaj la arbo restis sana kaj nenio ŝajne estas detranĉita de ĝi; pri tio mi estas mirigita.

2 Aŭskultu – li diris –: Tiu granda arbo, kiu kovris ebenaĵojn kaj montojn kaj la tutan teron, estas la leĝo de Dio, kiu estis donita al la tuta mondo; kaj tiu leĝo estas la Filo de Dio, mesaĝita ĝis la finoj de la tero; kaj la popoloj, kiuj estas sub ĝia ŝirmo estas tiuj, kiuj aŭskultis la mesaĝon kaj ekfidis je li. 3 La granda kaj glora anĝelo estas Miĥaelo, kiu havas la potencon super ĉi tiu popolo kaj regas ilin. Ĉar tiu metis la leĝon al la fiduloj en la koron; li do kontrolas ilin, al kiuj li ĝin donis <por vidi>, ĉu ili bone ĝin gardas.

4 Vi vidas la bastonojn de ĉiu unuopa; la bastonoj estas la leĝo. Vi vidas, ke multaj bastonoj fariĝis neutilaj, kaj vi komprenas, ke multaj ne gardis la leĝon, kaj vi vidas ĉies loĝejon.

5 Mi diris al li:

Sinjoro, kial kelkajn li forsendis en la turon, sed aliajn li lasis al vi?

Ĉiujn – li diris –, kiuj transpaŝis la leĝon, kiun ili ricevis de li, li postlasis en mia potenco por ekpenti; kaj ĉiujn, kiuj plenumis kaj gardis la leĝon, li tenis sub sia propra potenco.

6 Kiuj do, sinjoro, – mi diris – estas tiuj, kiuj estis kronitaj kaj iris en la turon?

Ĉiuj – li diris –, kiuj batalis kontraŭ la diablo kaj venkis lin en la luktado, estas kronitaj; estas tiuj, kiuj suferis pro la leĝo. 7 La ceteraj, kiuj redonis la bastonojn verdaj kaj kun ŝosoj, sed sen fruktoj, estas tiuj, kiuj afliktiĝis pro la leĝo, sed ne mortis pro ĝi sed ankaŭ ne negis ĝin. 8 Sed kiu redonis la bastonojn verdaj, kiel ili ricevis ilin, estas sanktaj kaj justaj homoj, kiuj tre fidele promenas kun pura koro kaj gardas la Ordonojn de la Sinjoro. La ceteron vi scios, kiam vi estos ekzameninta la bastonojn, kiuj estis replantitaj kaj akvumitaj.

Ekzamenado de la bastonoj

4 [70]: 1 Kaj post malmulte da tagoj ni venis al la loko, kaj la Paŝtisto eksidis sur la loko de la anĝelo, kaj mi staris apud li. Kaj li diris al mi:

Ĉirkaŭmetu al vi krudlinan tukon kaj priservu min.

Mi do ĉirkaŭmetis krudlinan tukon puran, faritan el sako. 2 Kaj kiam li vidis min tiel vestita, preta por priservi lin, li diris:

Voku la virojn, kies bastonoj estis plantitaj, laŭ la sinsekvo, kiel ili donis la bastonojn.

Mi foriris al la ebenaĵo, kaj vokis ĉiujn; tie staris ĉiuj, grupo post grupo.

3 Mi diris al ili:

Ĉiu elprenu la propran bastonon kaj donu ĝin al mi.

4 Unue venis tiuj, kiuj havis ilin sekiĝintaj kaj difektitaj, kaj tiuj montriĝis same sekaj kaj difektitaj; li ordonis ilin stari flanke. 5 Tiam venis tiuj, kiuj havis ilin sekiĝintaj sed ne difektitaj; kelkaj el ili prezentis siajn bastonojn verdaj, aliaj sekiĝintaj kaj difektitaj, kvazaŭ de tineo. Tiujn, kiuj prezentis ilin verdaj, li ordonis stari flanke, sed tiujn, kiuj donis ilin sekiĝintaj kaj

difektitaj, li ordonis stariĝi ĉe la unuaj. 6 Tiam venis tiuj, kiuj havis ilin duon-sekaj kaj fenditaj; kaj multaj el ili prezentis ilin verdaj, sed sen fendoj; aliaj havis ilin verdaj kaj kun ŝosoj, kaj kun fruktoj en la ŝosoj, same kiel havis tiuj, kiuj iris en la turon kaj estis kronitaj; aliaj prezentis ilin sekaj kaj rongĝitaj, aliaj – sekaj kaj nemanĝeblaj, aliaj, kiel antaŭe: sekiĝintaj kaj kun fendoj. Li ordonis al ĉiuj ekstari flanke ĉiu unuope, al kelkaj ĉe la propra grupo, la aliaj flanke.

5 [71]: 1 Tiam tiuj redonis siajn bastonojn, kiuj havis ilin verdaj, sed kun fendoj; ili ĉiuj prezentis ilin verdaj, kaj ekstaris en la propra grupo. La Paŝtisto ĝojis pri ili, ĉar ili ĉiuj ŝanĝiĝis kaj demetis siajn fendojn.

2 Ankaŭ tiuj redonis ilin, kiuj havis la duone verdajn kaj duone sekajn; la bastonoj de kelkaj montriĝis tute verdaj, de aliaj duone sekiĝintaj, de aliaj verdaj kaj kun ŝosoj. Ĉiuj ĉi estis senditaj ĉiu al sia grupo. 3 Tiam tiuj redonis, kiuj havis ili du-trione verdaj, sed cetera sekiĝintaj; multaj el tiuj redonis ilin verdaj, aliaj duonsekiĝintaj, sed la ceteraj – sekaj kaj rongĝitaj; ili ĉiuj ekstaris en sia propra grupo. 4 Poste redonis tiuj, kiuj havis ilin du-trione sekaj kaj cetera verdaj. Multaj el ili redonis ilin duon-sekaj, aliaj – sekaj kaj rongĝitaj, ree aliaj – duon-sekaj kaj kun fendoj, malmultaj – verdaj. Tiuj ĉiuj ekstaris ĉe la propra grupo. 5 Poste tiuj redonis, kiuj antaŭe havis ilin verdaj, nur etparte sekaj, kaj kun fendoj. El tiuj kelkaj redonis ilin verdaj, aliaj verdaj kaj kun ŝosoj. Ankaŭ tiuj ekiris al la propra grupo. 6 Poste redonis tiuj, kiuj havis ilin nur tre etparte verdaj kaj la ceteron sekiĝinta. Iliaj bastonoj montriĝis plejparte verdaj kaj kun ŝosoj, kaj kun fruktoj en la ŝosoj, kaj aliaj – komplete verdaj. Pri tiuj bastonoj tre ĝojis la Paŝtisto, ke tiaj ili troviĝis. Ili foriris ĉiu al la propra grupo.

6 [72]: 1 Post kiam la Paŝtisto kontrolis ĉiujn bastonojn, li diris al mi:

Mi diris al vi, ke ĉi tiu arbo estas tre vivi-vola. Ĉu vi vidas – li diris –, kiom pentis kaj saviĝis?

Mi vidas, sinjoro – mi diris.

<Tio estas>, por ke vi vidu – li diris – la kompatemon de la Sinjoro, ke granda ĝi estas kaj glora, kaj Sian Spiriton Li donis al tiuj, kiuj indas je pentado.

2 Kial do, sinjoro – mi diris –, ne ĉiuj pentis?

Al tiuj, kies koron Li vidis fariĝonta pura kaj preta esti sklavo al Li el la tuta koro, al tiuj Li donis penti; sed kies perfidecon kaj fiecon Li vidis, ke nur hipokrite ili pentos, al tiuj Li ne donis penti, por ke ili ne profanu Lian nomon.

Kion simbolas la diversaj specoj de bastonoj

3 Mi diris al li:

Sinjoro, nun vi do montru al mi koncerne tiujn, kiuj la bastonojn redonis, kiaspeca homo estas ĉiu el ili, kaj koncerne iliajn loĝejojn, por ke tiuj inter la aŭskultantoj, kiuj estis en la fido kaj ricevis la sigelon²² sed rompintis ĝin kaj ne gardis ĝin sendamaĝa, rekonante siajn farojn ekpentu, kaj ricevu sigelon de vi kaj gloru la Sinjoron, ĉar li kompatis pri ili kaj sendis vin por renovigi ilian Spiriton.

4 Aŭskultu – li diris –: Tiuj, kies bastonoj montriĝis sekiĝintaj kaj rongiĝitaj de tineo, estas la apostatoj kaj perfidintoj de la eklezio, kiuj en siaj pekoj blasfemis la Sinjoron, kaj krome eĉ ekhontis pri la nomo de la Sinjoro, kiu estis alvokita super ili. Tiuj do estas komplete perditaj por Dio. Vi ja vidas, ke eĉ ne unu el ili ekpentis, kvankam ili aŭdis la vortojn, kiujn vi parolis al ili, kiel mi ordonis al vi; el tiaj homoj la vivo malaperis. 5 Sed tiuj, kiuj redonis la bastonojn sekiĝintaj sed ne putrantaj, estas ankaŭ proksimaj al ili; ĉar ili estis hipokritoj, kaj enkondukis fremdajn doktrinojn kaj misgvidis la sklavojn de Dio, precipe tiujn, kiuj pekis, kaj al kiuj ili ne permesis pentofari, sed per siaj stultaj doktrinoj ili persvadis ilin. Sed ili povas esperi je pento. 6 Kaj vi vidas, ke efektive multaj el ili pentis de post kiam vi parolis al ili pri miaj Ordonoj; ja ankaŭ aliaj pentofaros. Sed ĉiuj, kiuj ne pentos, perdos sian vivon. Ĉiuj, kiuj el ili ja pentos, montroĝos bonaj, kaj ilia loĝejo estos inter la unua remparo. Kelkaj eĉ ascendas al la turo. Vi do vidas – li diris – ke pento pri la pekoj donas la vivon, sed ne penti la morton.

²² Kutima simbolo por la bapto.

7 [73]: 1 Sed ĉiuj, kiuj prezentis la bastonojn duon-sekaj kaj kun fendoj, aŭskultu ankaŭ pri ili. Tiuj, kies bastonoj estis tute duon-sekaj, estas la dubmensaj²³; ĉar ili ja nek vivas nek mortis. 2 Sed kiuj havas ilin duon-sekaj kaj kun fendoj en ili, tiuj estas kaj dubmensaj kaj kalumniantoj, kaj neniam ili havas pacon inter si, sed daŭre ili ĉie estigas kverelojn. Sed – li diris – eĉ por tiuj pretas pentofaro. Vi ja vidis – li diris –, ke inter ili kelkaj ekpentis. Kaj – li diris – restas al ili espero pri pento. 3 Kaj ĉiuj – li diris –, kiuj el inter ili ekpentas, havas la loĝejon en la turo; sed ĉiuj el inter ili, kiuj malfrue pentas, loĝas inter la remparoj; sed ĉiuj, kiuj ne pentas, sed restas ĉe sia agado, mortos la morton.

4 Sed kiuj verdaj kaj kun fendoj redonis siajn bastonojn, tiuj ĉiel montriĝis fidelaj kaj bonaj, sed reciproke havis ĵaluzon pri unuaeco aŭ pri gloro; sed ili ĉiuj estis stultaj, ke pri unuaeco ili ĵaluzis. 5 Sed, estante bonaj, kiam ili aŭdis miajn Ordonojn, ili sin purigis kaj rapide pentofaris. Do ilia loĝejo estiĝis en la turo. Sed se denove iu reiras al dumenseco, li elpeliĝos el la turo, kaj pereos lia vivo.

6 La vivo ja estas por ĉiuj, kiuj gardas la Ordonojn de la Sinjoro. Sed en la Ordonoj estas nenio pri unuaeco aŭ kia ajn gloro, sed pri pacienco kaj pri humileco de la homo. En tiaj homoj do estas la vivo de la Sinjoro, sed en kverelemuloj kaj senleĝuloj estas la morto.

8 [74]: 1 Sed tiuj, kiuj transdonis la bastonojn duone verdaj, duone sekiĝintaj, tiuj estas, kiuj enplektiĝas en aferoj kaj ne ligiĝas kun la sanktuloj. Tial duono de ili vivas, duono estas mortinto. 2 Multaj ekpentis, kiam miajn Ordonojn ili aŭdis. Ĉiuj, kiuj pentis – ilia loĝejo estas en la turo. Sed kelkaj el ili ĝisfine restis distance. Tiuj ne havas pentemon; ĉar pro siaj aferoj ili blasfemis la Sinjoron kaj negis Lin. Tial ili perdis sian vivon per la malbono, kiun ili faris. 3 Sed multaj el ili estis dumensaj. Ili havas ankoraŭ eblon por pentofari. Se ili baldaŭ pentos, ili ankaŭ havos loĝejon en la turo; se malpli rapide ili pentos, ili povos ekloĝi interne de la remparoj. Sed se ili ne pentas, ankaŭ ili perdos sian vivon.

²³ Aŭ: dubantoj, hezitantaj.

4 Sed tiuj, kiuj prezentis du partojn verdaj kaj la trian seka, estas tiuj, kiuj negis la fidon en plej diversaj manieroj. 5 Multaj el ili pentis, kaj ilia loĝejo fariĝis en la turo; multaj ĝisfine forlasis Dion; tiuj do komplete perdis sian vivon. Kelkaj el ili estis dumensaj kaj faris malkonkordon. Por ili do restos eblo je pento, se baldaŭ ili ekpentos kaj ne restos en siaj plezuroj; sed se ili restas en siaj faroj, ankaŭ ili realigas al si la morton.

9 [75]: 1 Sed tiuj, kiuj prezentis siajn bastonojn du-trione sekiĝintaj kaj unu-trione verdaj, estis fiduloj, sed fariĝis riĉaj kaj famaj inter la paganoj; per granda fiero ili sin vestis kaj sin alte estimis, forlasis la verecon kaj ne plu ligiĝis al la justuloj, sed ekvivis kune kun la paganoj, kaj al ili tiu vojo ŝajnis pli agrabla; sed de Dio ili ja ne disiĝis, sed restis en la fido, kvankam ili ne plu faris la agojn de la fido. 2 Multaj el ili do ekpentis, kaj ilia loĝejo fariĝis en la turo. 3 Sed aliaj ĝisfine vivadis kun la paganoj kaj estis konvinkitaj de la malplenaj doktrinoj de la paganoj, foriris de Dio, kaj fariĝis sklavoj de la agoj kaj faroj de la paganoj. Tiuj do estis kalkulitaj kun la paganoj. 4 Sed aliaj el ili estis dubantoj kaj ne esperis saviĝi pere de agoj, kiujn ili faris; kaj aliaj estis dumensaj kaj estigis kverelojn inter si. Por tiuj do, kiuj estis dumensaj pri sia agado, ankoraŭ estas eblo je pentofaro; sed ilia pento devas esti rapida, por ke ili ankoraŭ havu loĝejon en la turo; sed por tiuj, kiuj ne pentas, sed restas ĉe siaj plezuroj, la morto estas proksima.

10 [76]: 1 Sed tiuj, kiuj prezentis siajn bastonojn verdaj, sed kun pintoj sekaj kaj kun fendoj, tiuj estas ĉiel bonaj kaj fidelaj kaj gloraj antaŭ Dio, sed iomete ili pekis per malgrandaj deziroj kaj iom da reciproka ĵaluzo; sed aŭdante miajn parolojn, plimulte ili ekpentis, kaj ilia loĝejo estas en la turo. 2 Sed kelkaj el ili estis dumensaj, kelkaj dubante kaŭzis grandan malkonkordon. Pri ili do ankoraŭ estas espero pri pento, ĉar ĝenerale ili estis bonaj; malfacile iu el ili povus morti.

3 Sed tiuj, kiuj prezentis la bastonojn sekiĝintaj, sed ja kun eta parto verda, estas tiuj, kiuj ja fariĝis fiduloj, sed ili praktikis la agojn de maljusteco, sed tamen ili ne forlasis Dion, kaj Lian nomon volonte portis, kaj volonte ili akceptis en siajn domojn la sklavojn de Dio. Kiam ili do aŭdis pri tiu ĉi pento, ili ekpentis senhezite, kaj plenumas ĉian virton kaj

justecon. 4 Kelkaj el ili eĉ plenvole suferas persekuton, rekonante la agojn, kiujn ili faris. Ĉiuj tiuj havos sian loĝejon en la turo.

11 [77]: 1 Post kiam la klarigon li kompletigis pri ĉiuj ĉi bastonoj, li diris al mi:

Ek, rakontu do al ĉiuj, ke ili pentu, kaj ili vivos por Dio. Ĉar en sia kompatemo la Sinjoro sendis min por doni la <eblon je> pento al ĉiuj, kvankam kelkaj pro siaj agoj ne estas indaj je tio. Sed ĉar la Sinjoro estas kompatema, Li deziras, ke ĉiuj, kiujn vokis Lia Filo, estu savitaj.

2 Mi diris al li:

Sinjoro, mi esperas, ke ĉiuj, kiuj aŭdos tion ĉi, ekpentos. Mi estas ja konvinkita, ke ĉiu, kiu konscias siajn agojn kaj timas antaŭ Dio, pentos.

3 Li respondis al mi:

Ĉiuj – li diris –, kiuj tutkore pentos kaj purigos sin mem de ĉiuj malbonaj agoj menciitaj kaj ne plu aldonos al siaj pekoj, ricevos sanigon de la Sinjoro el ĉiuj antaŭaj pekoj, se ili ne dubos pri tiuj ordonoj, kaj ili vivos antaŭ Dio. Sed ĉiuj – li diris –, kiuj aldonos al siaj pekoj kaj promenos laŭ la deziroj de ĉi tiu mondo, tiuj kondamnos sin mem je morto. 4 Sed vi, promenu laŭ miaj Ordonoj, kaj vi vivos por Dio; sed ĉiuj, kiuj promenos laŭ ili kaj juste agos, vivos antaŭ Dio.

5 Kiam ĉion ĉi li montris kaj diris al mi, li diris al mi:

La ceteron mi montros al vi post kelkaj tagoj.

Naŭa Parabolo

Enkonduko al nova Vizio

1 [78]: 1 Post kiam mi skribis ĉi tiujn Ordonojn kaj Parabolojn de la Paŝtisto, la anĝelo de la pento, li venis al mi kaj diris:

Mi volas <denove> montri al vi ĉion, kion montris la Sankta Spirito, kiu parolis kun vi en la aspekto de la Eklezio; ĉar tiu Spirito estas la Filo de Dio. 2 Ĉar kiam en la karno vi ankoraŭ estis malpli forta, al vi ne estis

klarigate de anĝelo. Sed kiam vi fortikiĝis per la Spirito kaj via forto kreskis tiel, ke vi eĉ povis vidi anĝelon, tiam do estis montrata al vi pere de la Eklezio la konstruo de la turo; bele kaj inde ĉion vi vidis, <instruate> de virgulino. Sed nun <instruate> de anĝelo vi vidas, kvankam efektive de la sama Spirito; 3 tamen ĉion vi devos lerni ankoraŭ pli ekzakte de mi. Ĉar ja tiucele mi estis indikita de la glora anĝelo por ekloĝi en via domo, por ke ĉion glore vi vidu, en nenio plu timigite, kiel antaŭe.

La vizio de la dek du montoj de Arkadio

4 Kaj li forkondukis min al Arkadio, al iu monto mamoforma, kaj sidigis min sur ĝian pinton, kaj montris al mi grandan ebenaĵon, kaj ĉirkaŭ la ebenaĵo dek du montojn, kaj ĉiuj ili aspektis malsame. 5 La unua estis nigra kiel fulgo; la dua nuda, sen iu kreskaĵo; la tria estis plena je dornoj kaj kardoj; 6 la kvara havis vegetaĵaron duon-sekiĝinta, sed la supra parto de la herbo estis verda, la parto ĉe la radikoj komplete sekis; kaj kiam la suno brulis, parto de la herbo ankaŭ sekiĝis; 7 la kvina monto havis verdan herbon, sed maldelikatan; la sesa monto estis plena je fendoj, foje malgrandaj, foje grandaj; la fendoj havis vegetaĵaron, sed tiu ne estis tre bonfarta, pli ĝuste ili aspektis kiel sekiĝintaj; 8 la sepa monto havis gajan vegetaĵaron, kaj la tuta monto bonfartis, kaj ĉiu speco de brutoj aŭ birdoj nutris sin de tiu monto; kaj ju pli paŝtiĝis la brutoj kaj la birdoj, des pli kaj pli floris la vegetaĵaro de tiu monto. La oka monto estis plena je fontoj, kaj ĉiu speco de la kreaĵaro de la Sinjoro sensoifigis sin ĉe la fontoj de tiu monto. 9 La naŭa monto tute ne havis akvon kaj estis komplete dezerta, kaj en ĝi estis mortigaj reptilioj, kiuj pereigas la homojn. La deka monto havis grandegajn arbojn, kaj estis komplete ombroza, kaj sub la ŝirmo de la arboj kuŝis ŝafoj ripozante kaj remaĉante. 10 La dekunua monto estis tre dense arbokovrita, kaj tiuj arboj estis tre fruktoplenaj, ornamitaj per diversaj fruktoj, tiel ke ĉiu, kiu vidus ilin, ekdezirus manĝi el iliaj fruktoj. La dekdua monto estis blanka, kaj ĝia aspekto estis gaja; kaj la monto estis en si mem plej bela.

Vizio de la roko, la pordo kaj la virgulinoj

2 [79]: 1 Kaj meze de la ebenaĵo li montris al mi grandan blankan rokon, kiu leviĝis el la ebenaĵo. La roko estis pli alta ol la montoj, kvadrata, tiel ke la tutan mondon ĝi povis enhavi. 2 Tiu roko estas malnova, kaj pordo estis el ĝi elhakita; sed freŝa ŝajnis al mi tiu pordofarado. La pordo tiom brilis pli ol la suno, ke mi miregis pri la brilado de tiu pordo. 3 Kaj ĉirkaŭ tiu pordo staris dek du virgulinoj. La kvar, kiuj staris ĉe la anguloj, ŝajnis al mi la plej belaj; sed ankaŭ la aliaj estis gloraj. Ili staris ĉe la kvar flankoj de la pordo, kaj meze inter ili staris po du virgulinoj. 4 Ili estis vestitaj en linaj ĥitonoj, kaj zonitaj plej bele, dum la dekstrajn ŝultrojn ili havis liberaj, kvazaŭ intencante porti iun ŝarĝon. Tiel ili staris pretaj; ĉar ege gajaj ili estis kaj bonvolaj.

5 Post kiam tion mi vidis, mi miris ĉe mi mem, kiel grandaj kaj gloraj estas la aferoj, kiujn mi vidas. Kaj mi ree estis konfuzita pri tiuj virgulinoj, ke tiel delikataj ili estas, sed kiel fiere tie ili staras, kvazaŭ portonte la tutan ĉielon. 6 Kaj al mi diris la Paŝtisto:

Kial en vi mem vi diskutas kaj ĉagrenas vin mem? Ĉar kion vi ne kapablas kompreni, tion vi ne klopodu fari, se saĝa vi estas, sed petu la Sinjoron, ke vi ricevu komprenon pri ĉio. 7 Kio estas malantaŭ vi, tion vi ne povas vidi, sed kio estas antaŭ vi, tion vi vidas. Kion do vi ne povas vidi, tion lasu, kaj ne zorgu pri tio; kion vi ja vidas, pri tio vi okupiĝu, kaj pri la cetero ne estu scivola; ĉion mi klarigos al vi, kion mi indikos al vi. Do rigardu, kio sekvos.

Novkonstruo de la turo

3 [80]: 1 Mi vidis ses virojn alveni, altajn kaj glorajn, kaj laŭaspekte similajn. Kaj ili alvokis homamason. Kaj ankaŭ la viroj, kiuj venis, estis altaj kaj belaj kaj fortikaj; kaj la ses viroj ordonis al ili, konstrui sur la roko kaj super la pordo iun turon. Estis granda bruego de tiuj viroj, kiuj venis konstrui la turon, ĉar ili ĉirkaŭkuregis tien-reen ĉirkaŭ la pordo. 2 Ĉar la virgulinoj, kiuj staris ĉirkaŭ la pordo, diris al la viroj, ke ili rapidu por konstrui la turon. Elstreĉis la manojn la virgulinoj, kvazaŭ transprenonte ion de la viroj. 3 Kaj la ses viroj ordonis ŝtonojn supreniĝi

el certa profundo kaj ekiri al la konstruo de la turo. Kaj supreniĝis dek ŝtonoj, kvadrataj kaj brilaj, kiuj [ne] venis el ŝtonminejo. 4 Kaj la ses viroj kriis al la virgulinoj, kaj ordonis ilin porti ĉiujn ŝtonojn, kiuj devas servi al la konstruo de la turo, kaj transporti ilin tra la pordo kaj pludoni al la viroj, kiuj konstruos la turon. 5 Kaj la virgulinoj metis la dek unuajn ŝtonojn, kiuj supreniĝis el la profundo unu sur la aliajn, kaj ili kunportis ilin, ŝtonon post ŝtono.

4 [81]: 1 Same kiel ili staris ĉirkaŭ la pordo, tiuvice portis <ilin la virgulinoj>, kiuj ŝajnis sufiĉe fortaj kaj kiuj kurbiĝis sub la anguloj de la ŝtono; la aliaj kurbiĝis sub la flankoj de la ŝtono, kaj tiel ili portis ĉiujn ŝtonojn; tra la pordon ili portis ilin, laŭordone, kaj transdonis ilin al la viroj por la turo; kaj tiuj prenis ilin kaj konstruis per la ŝtonoj. 2 La konstruo do de la turo okazis super la granda roko kaj supre de la pordo. Tiuj dek ŝtonoj estis kunigitaj, kaj ili kovris la tutan rokon. Kaj fariĝis ili la fundamento de la konstruo de la turo. Kaj la roko kaj la pordo portis la tutan turon. 3 Kaj post la dek ŝtonoj, supreniĝis el la profundo dudek kvin aliaj ŝtonoj; kaj ili estis enigitaj en la konstruon de la turo, portataj de la virgulinoj same kiel la antaŭaj. Post ili supreniĝis tridek kvin; kaj tiuj same estis enigitaj en la turon. Kaj post tiuj supreniĝis denove kvardek ŝtonoj; kaj ĉiuj ĉi estis metitaj en la konstruon de la turo; fariĝis do kvar vicoj en la fundamentado de la turo 4 kaj <ŝtonoj> ĉesis supreniĝi el la profundo; ĉesis ankaŭ la konstruantoj mallongan tempon. Kaj la ses viroj ree ordonis al la amaso, ke el la montoj ili alportu ŝtonojn por la konstruo de la turo. 5 Ili do estis alportitaj el ĉiuj montoj, en plej diversaj koloroj, prihakitaj de la viroj, kaj oni transdonis ilin al la virgulinoj; kaj la virgulinoj portis ilin tra la pordon kaj pludonis ilin por la konstruo de la turo. Kaj kiam por la konstruo estis metitaj la diversaj ŝtonoj, similaj ili fariĝis kaj blankaj, kaj ili perdis la variajn kolorojn. 6 Sed kelkaj ŝtonoj por la konstruo estis pludonataj de la viroj, kaj tiuj ne fariĝis brile blankaj, sed same kiaj ili estis enigitaj, tiaj ili ankaŭ montriĝis esti; ĉar ili ne estis enigitaj de la virgulinoj, kaj ili ne estis alportataj tra la pordo. Tiuj ŝtonoj do estis ne konvenaj por la konstruo de la turo. 7 La ses viroj, kiuj vidis, ke tiuj ŝtonoj ne konvenas por la konstruo, ordonis forpreni ilin kaj reporti ilin suben al la propra loko, de kie ili estis alportitaj. 8 Kaj al la viroj, kiuj estis enportantaj la ŝtonojn, ili diris:

Vi tute ne plu pludonu ŝtonojn por la konstruo; metu ilin apud la turon, por ke la virgulinoj transportu ilin tra la pordo kaj pludonu al la konstruo. Ĉar – ili diris – se ne pere de la manoj de la virgulinoj ili estas alportataj tra la pordo, siajn kolorojn ili ne povas ŝanĝi; tial – ili diris –: vi do ne laboru vane.

5 [82]: 1 Kaj finiĝis tiutage la konstruo, sed la turo ne estis tute preta; ĉar devis ankoraŭ esti superkonstruite; kaj okazis ĉesigo de la konstruo. La ses viroj ordonis al ĉiuj konstruantoj mallonge retiriĝi kaj paŭzi. Kaj al la virgulinoj ili ordonis ne retiriĝi de la turo; ŝajnas al mi, ke la virgulinoj estis lasitaj tie por gardi la turon. 2 Kiam ĉiuj retiriĝis de la turo kaj paŭzis, mi diris al la Paŝtisto:

Kial, sinjoro – mi diris –, ne estis kompletigita la konstruo de la turo?

Ja ne – li diris – povas finiĝi la turo, se ne antaŭe ĝia Sinjoro venas inspekti ĝian konstruon, por ke, se kelkaj ŝtonoj montriĝas putraj, li ŝanĝu ilin. La turo ja estas konstruata laŭ lia deziro.

3 Sinjoro – mi diris – mi volonte scius pri tiu turo, kia estas tia konstruo, kaj pri tiu roko kaj la pordo kaj la montoj kaj la virgulinoj, kaj pri la ŝtonoj, kiuj supeniĝis el la profundo, ne prihakitaj, sed kiuj simple venis tiaj por la konstruo. 4 Kaj kial unue dek ŝtonoj estis metitaj sur la fundamenton, poste dudek kvin, poste tridek kvin, poste kvardek, kaj pri la ŝtonoj, kiuj estis enirintaj en la konstruon, sed poste tamen forigitaj kaj remetitaj en sian propran lokon; pri ĉio ĉi kvietigu mian animon, sinjoro, kaj instruu al mi.

5 Se – li diris – vi ne montriĝas sencele scivola, ĉion ĉi vi ekscios. Ĉar post kelkaj tagoj ni vojaĝos tien, kaj la ceteron vi vidos, kio okazos al tiu turo, kaj ĉiujn Parabolojn ekzakte vi komprenos. 6 Kaj post kelkaj tagoj ni venis al la loko, kie antaŭe ni sidis, kaj li diris al mi:

Ni iru al la turo; ĉar la mastro de la turo venas inspekti ĝin.

Kaj ni atingis la turon, kaj estis ĉe ĝi absolute neniu, krom nur la virgulinoj. 7 Kaj la Paŝtisto demandis la virgulinojn, ĉu la posedanto de la turo alvenis. Sed ili respondis, ke li devos veni inspekti la konstruon.

Venas la Sinjoro de la turo kaj inspektas la laboron

6 [83]: 1 Kaj jen post mallonge mi vidas eskadron de multaj viroj, kiuj alvenas; kaj meze inter ili estas iu viro tre alta laŭ staturon, tiel ke la turon li superas. 2 Kaj la ses viroj, kiuj la konstruon estris, iris dekstre kaj maldekstre kun li, kaj ĉiuj, kiuj la konstruon realigis, estis kun li, kaj multaj aliaj gloraj <staris> ĉirkaŭ li. La virgulinoj, kiuj gardis la turon, alkuris kaj kisis lin, kaj komencis promeni kun li ĉirkaŭ la turo. 3 Kaj tiu viro inspektis la konstruon ege detale, tiel ke ĉiun unuopan ŝtonon li palpis. Tenante iun bastonon enmane, li tuŝis unuope ĉiujn ŝtonojn, kiuj estis enkonstruitaj. 4 Kaj kiam li frapis, kelkaj el la ŝtonoj fariĝis nigraj kiel fulgo, aliaj skabiaj, aliaj ekhavis fendojn, aliaj rompiĝis, aliaj fariĝis nek blankaj nek nigraj, aliaj raspaj kaj ne harmoniaj al la ceteraj ŝtonoj, ree aliaj havis plurajn makulojn; tio estis la bunteco de la ŝtonoj, kiuj montriĝis maltaŭgaj por la konstruo. 5 Li do lasis forigi ilin ĉiujn el la turo kaj meti apud la turon, kaj lasis alporti aliajn ŝtonojn kaj enigi tiujn en ilian lokon. 6 Kaj la konstruantoj demandis lin, el kiu monto li volas alporti ŝtonojn por <anstataŭe> enigi en ilian lokon. Sed li ne lasis alporti ilin el la montoj, sed venigis ilin de certa ebenaĵo apuda. 7 Kaj oni fosis en tiu ebenaĵo, kaj oni trovis tre belajn ŝtonojn, brilajn kaj kvadratajn, sed ankaŭ estis kelkaj rondaj. Ĉiuj ŝtonoj, kiuj ie estis en tiu ebenaĵo, estis kunigitaj, kaj estis enportitaj de la virgulinoj tra la pordo. 8 La kvadrataj ŝtonoj estis prihakitaj kaj estis metitaj en la lokon de la forigitaj; sed la rondaj ne estis metitaj en la konstruon, ĉar ili estis tro duraj por prihaki ilin, kaj tio daŭris tro longe. Tiel do ili estis metitaj apud la turo, por estonte esti prihakitaj kaj metitaj en la konstruon, ĉar ili estis tre brilaj.

7 [84]: 1 Kiam la glora viro, la sinjoro de la tuta turo, tion finis, li alvokis al si la Ppaŝtiston, kaj transdonis al li ĉiujn ŝtonojn, kiuj kuŝis apud la turo, kaj kiuj estis forigitaj el la konstruo, kaj li diris al li:

2 Purigu ĉiujn tiujn ŝtonojn zorgeme kaj metu ilin en la konstruon de la turo, almenaŭ tiujn, kiuj povas harmonii kun la ceteraj; sed tiujn, kiuj ne harmonias, tiujn vi forĵetu longe for de la turo. 3 Post tiuj ĉi ordonoj al la Paŝtisto, li foriris de la turo kun ĉiuj, kiuj venis kun li. La virgulinoj staris ĉirkaŭ la turo kaj gardis ĝin.

Nova prilaborado de la rifuzitaj ŝtonoj

4 Mi diris al la Paŝtisto:

Kiel povas tiuj ŝtonoj denove eniri en la konstruon de la turo, ĉar ili ja estis malaprobataj?

Responde li diris al mi:

Ĉu vi vidas – li diris – tiujn ŝtonojn?

Jes, sinjoro – mi diris –, mi ilin vidas.

La plimulton – li diris – el tiuj ŝtonoj mi prihakos kaj metos ilin en la konstruon, kaj ili harmonios al la ceteraj ŝtonoj.

5 Sinjoro – mi diris –, kiel povos tiuj, kiuj estis prihakitaj, plenigi la saman spacon?

Responde li diris al mi:

Ĉiuj, kiuj montriĝos etaj, estos metitaj en la mezon de la konstruo, sed la pli grandaj estos metitaj pli ĉe la ekstera flanko kaj ili kuntenos la tuton.

6 Tion dirinte li diris al mi:

Nun ni do iru, kaj post du tagoj ni revenu kaj purigu tiujn ŝtonojn, kaj enmetu ilin en la konstruon; ĉar ĉio ĉirkaŭ la turo devas esti purigita, por ke la mastro ne venu senaverte kaj trovu la ĉirkaŭon de la turo malpura, kaj li ekkoleru, kaj tiuj ŝtonoj ne eniros en la konstruon de la turo, kaj antaŭ mia mastro mi aperos senvalora. 7 Kaj post du tagoj ni iris al la turo, kaj li diris al mi:

Ni kontrolu ĉiujn ĉi ŝtonojn, kaj ni rigardu, ĉu ili povos eniĝi en la konstruon.

Kaj mi diris al li:

Sinjoro, ni inspektu ilin.

8 [85]: 1 Kaj tiel komencante, unue ni inspektis la nigrajn ŝtonojn, kaj samaj, kiel ili estis forigitaj el la konstruo, tute samaj ili montriĝis esti. La Paŝtisto do ordonis, ke ili estu forigitaj disde la turo kaj metitaj flanken. 2 Poste li inspektis tiujn, kiuj estis skabiaj, kaj multajn el tiuj li prenis kaj prihakis, kaj la virgulinojn li ordonis porti ilin kaj meti en la konstruon. Kaj prenis ilin la virgulinoj kaj metis mezen en la konstruo de la turo. Sed la ceterajn li igis meti ĉe la nigrajn; ĉar ankaŭ tiuj montriĝis nigraj. 3 Tiam li komencis inspekti tiujn kun fendoj; kaj multajn el ili li prihakis, kaj ordonis la virgulinojn aldoni ilin en la konstruon. Ili metis tiujn en pli ekstera parto, ĉar ili montriĝis pli sanaj. La ceteraj, pro la amaso da fendoj, ne povis esti prihakitaj; pro tiu kialo ili estis forigitaj el la konstruo de la turo. 4 Poste li inspektis la rompitaĵojn, kaj multajn el inter ili montriĝis nigraj, kelkaj enhavis grandajn fendojn; kaj ankaŭ tiujn li igis meti ĉe la forĵetitajn. Sed tiujn el ili, kiuj restis, li purigis kaj prihakis kaj igis meti en la konstruon. Kaj la virgulinoj ekportis ilin kaj harmonie metis ilin mezen en la konstruon de la turo; ĉar ili estis iom malfortaj. 5 Tiam li inspektis tiujn, kiuj estis duone blankaj, duone nigraj; kaj multajn el tiuj nun montriĝis nigraj. Ankaŭ tiujn li igis ekpreni kaj meti ĉe la forĵetitajn. Ĉiuj ceteraj estis levitaj de la virgulinoj; ĉar estante blankaj ili estis adaptitaj de la virgulinoj en la konstruon; sed ili estis lokitaj ĉe la ekstero, ĉar sanaj ili montriĝis esti, tiel ke ili povis kunteni tiujn en la mezo; ĉar eĉ neniu el ili estis tro mallonga. 6 Tiam li komencis inspekti tiujn, kiuj estis raspaj kaj krudaj, kaj kelkaj el ili estis forĵetitaj ĉar ne eblis prihaki ilin; ili estis tro duraj. La ceteraj el ili estis prihakitaj kaj forportitaj de la virgulinoj, kaj en la mezon de la konstruo de la turo ili estis harmonie alĝustigitaj. Ĉar ili estis iom malfortaj. 7 Poste li inspektis tiujn, kiuj havis makulojn, kaj ege malmultajn el ili fariĝis nigraj, kaj estis forĵetitaj al la ceteraj. Sed la restantaj montriĝis brilaj kaj sanaj; ankaŭ tiujn la virgulinoj alĝustigis en la konstruon; ĉe la ekstero ili estis metitaj, pro ilia forto.

9 [86]: 1 Tiam li venis inspekti la blankajn kaj la rondajn ŝtonojn, kaj diris al mi:

Kion ni faru pri tiuj ŝtonoj?

Kiel mi sciu, sinjoro – mi diris.

Ĉu vi do neniun ideon havas pri ili?

2 Mi, sinjoro – mi diris –, mi ne havas tiun kapablon. Mi ne estas masonisto nek scias tion. Ĉu vi ne vidas – li diris –, ke ili estas tre rondaj? Kaj se tiujn mi volus fari kvadrataj, necesas ilin treege prihakadi; tamen neeviteble kelkaj devas esti metitaj en la konstruon. 3 Se do – mi diris –, sinjoro, neeviteble estas, kial do ĉagreni vin mem kaj ne elekti por la konstruo, kiujn vi volas, kaj alĝustigi ilin por tio?

Efektive, li elektis elinter ili la plej grandajn kaj brilajn, kaj prihakis ilin; kaj la virgulinoj eklevis kaj harmonie adaptis ilin por la ekstera parto de la konstruo. 4 Sed la ceteraj, kiuj restis, estis prenitaj kaj metitaj flanken en la ebenaĵo, el kie ili alvenis; sed ili ne estis forĵetitaj.

Ĉar – li diris – restas ankoraŭ malmulte por konstrui pri la turo. La mastro de la turo ĉiel deziras, ke tiuj ŝtonoj estu harmonie adaptitaj por la konstruo, ĉar ili estas ege brilaj.

5 Tiam estis alvokitaj dek du virinoj, plej belaj aspekte, vestitaj en nigro, zonitaj kaj kun la ŝultroj nudaj kun haroj neligitaj. Kaj tiuj virinoj, miaopinie, havis sovaĝan rigardon. Ilin ordonis la Paŝtisto ekpreni la ŝtonojn, kiuj estis forĵetitaj el la konstruo, kaj porti tiujn al la montaro, de kie ili estis alportitaj. 6 Kaj ili ĝoje ekprenis ilin, kaj ĉiujn ŝtonojn ili forportis, kaj metis tien, de kie ili estis prenitaj. Kaj post kiam ĉiuj ŝtonoj estis forprenitaj, kaj neniuj ŝtonoj plu kuŝis ĉirkaŭ la turo, la Paŝtisto diris al mi:

Ni ĉirkaŭiru la turon, kaj rigadu, ĉu ankoraŭ estas iu difekto en ĝi.

Kaj mi ĉirkaŭiris kun li. 7 Kaj kiam la Paŝtisto vidis, ke la turo estas bela laŭ konstruo, li estis ege ĝoja; ĉar la turo estis tiel bone konstruita, ke kiam mi vidis ĝin, mi deziris tiun loĝejon; ĉar estis tiel konstruita, kvazaŭ el unu ŝtono, sen iu ajn kunigo. Kaj la ŝtono ŝajnis kvazaŭ elhakita rekte el la roko; aspektis kiel unu monolito.

La turo tute pura; la Paŝtisto foriras

10 [87]: 1 Kaj dum mi promenis kun li, mi estis tre ĝoja ĉe la vido de tiom da bonaĵo. La Paŝtisto diris al mi:

Ek, alportu morteron kaj argilon, por ke mi plenigu la formojn de la ŝtonoj, kiuj estis adaptitaj kaj metitaj en la konstruon. Ĉar la ekstero de la turo devas fariĝi tute glata.

2 Kaj mi faris, kiel li petis, kaj alportis ĝin.

Helpu min – li diris –, kaj la laboro estos baldaŭ preta. Kaj efektive li plenigis la formojn de la ŝtonoj, kiuj eniĝis en la konstruon, kaj ordonis balai ĉion ĉirkaŭ la turo kaj purigi la tuton. 3 La virgulinoj prenis balailojn kaj balais, forigis ĉiun malpuraĵon de ĉe la turo, kaj surverŝis akvon, kaj la tuta loko de la turo fariĝis ĝoja kaj tre belaspekta.

4 Tiam la Paŝtisto diris al mi:

Ĉio – li diris – nun estas belaspekta; se nun la Mastro de la turo venos kontroli la turon, li ne plu havas kion riproĉi al ni.

Dirinte tion ĉi, li volis foriri. 5 Sed mi ekkaptis lian sakon²⁴ kaj komencis priĵuri lin je la Sinjoro, ke li plu klarigu, kion li montris al mi. Li diris al mi:

Mallongan tempon mi estos okupita, kaj poste al vi ĉion mi klarigos; atendu min ĉi tie, ĝis mi venos.

6 Mi diris al li:

Sinjoro, dum tie ĉi mi estos sola, kion mi faru?

Vi ne estos sola – li diris –, ĉar tiuj ĉi virgulinoj estas kun vi.

Do konfidu min al ili – mi diris.

Kaj alvokis ilin al si la Paŝtisto kaj diris al ili:

Mi konfidas al vi tiun ĉi, ĝis mi venos.

Kaj li foriris.

²⁴Vidu 1 [25]:1.

La nokto inter la virgulinoj

7 Mi do estis sola kun la virgulinoj; ili estis plej gajaj, kaj estis tre afablaj al mi; precipe la kvar plej gloraj elinter ili.

11 [88]: 1 La virgulinoj diris al mi:

Hodiaŭ la Paŝtisto tien ĉi do ne venos,

Kion do – mi diris – hodiaŭ mi faru?

Atendu lin – ili diris – ĝis vespere; se li venos, li parolos al vi, sed se li ne venos, ĉi tie atendu kun ni, ĝis li venos.

2 Mi diris al ili:

Mi atentos lin ĝis vespere; kaj se li ne venos, mi foriros hejmen, kaj morgaŭ matene revenos. Sed responde ili diris al mi:

Vi estis konfidita al ni; vi ne povas foriri de ni.

3 Sed – mi diris – kie mi do restu?

Vi pasigos la nokton – ili diris – kun ni kiel frato, ne kiel edzo. Ĉar nia frato vi estas, kaj estonte ni loĝos kune kun vi; ĉar ege ni vin amas.

Mi hontis resti ĉe ili.

4 Kaj tiu, kiu ŝajnis ilia estrino, komencis kisi min; kaj la ceteraj, kiuj vidis ŝin kisi min, ankaŭ komencis kisi min kaj konduki min ĉirkaŭ la turo kaj ludi kun mi. 5 Kaj mi kvazaŭ fariĝis pli juna kaj komencis ankaŭ mem ludi kun ili. Ĉar kelkaj dancis, aliaj faris saltojn, aliaj kantis; sed mi restis silenta, kaj promenis kun ili ĉirkaŭ la turo, kaj estis ĝoja kun ili.

6 Kiam fariĝis vespere, mi volis reiri hejmen; sed ili ne lasis min iri, sed retenis min. Kaj mi restis ĉe ili tiun nokton, kaj mi dormis ĉe la turo.

7 Ĉar la virgulinoj eletendis siajn linajn hitonojn sur la planko, kaj kuŝigis min meze de ili, kaj nenion ili faris krom preĝi; ankaŭ mi senintermite preĝis kun ili, ne malpli ol ili. Kaj la virgulinoj ĝojis, ke tiel

mi preĝadas. Kaj mi restis tie ĝis matene, ĝis la dua horo, kun la virgulinoj.

8 Tiam ĉeestis la Paŝtisto, kaj diris al la virgulinoj:

Vi ja ne faris al li ion malbonan?

Demandu lin – ili diris.

Mi diris al li:

Sinjoro, kun plezuro mi restis kun ili.

Kion – li diris – vi manĝis?

Mi nutris min, sinjoro – mi diris –, per la diroj de la Sinjoro la tutan nokton.

Ĉu – li diris – ili bone traktis vin?

Jes – mi diris –, sinjoro.

9 Nun – li diris –, kion unue vi volas aŭskulti?

Kiel, sinjoro – mi diris –, dekomence vi montris; mi petas vin, sinjoro, ke en la sama sinsekvo, kiel mi petas vin, ke tielsame vi ankaŭ klarigu al mi.

Kiel vi volas – li diris – tiel al vi mi klarigos, kaj absolute nenion mi kaŝos de vi.

Klarigo pri la vizio de la turo

12 [89]: 1 Plej unue, sinjoro – mi diris – klarigu tion al mi: la roko kaj la pordo – kio estas?

Tiu ĉi roko – li diris – kaj la pordo estas la Filo de Dio.

Kiel – mi diris – sinjoro, la roko estas malnova kaj la pordo – nova?

Aŭskultu – li diris – kaj komprenu, stulta homo. 2 La Filo de Dio ja estas antaŭekzista al lia tuta kreo²⁵, ĉar li estis la konsilanto de la Patro ĉe la kreo; tial li estas ankaŭ pli aĝa.

Sed la pordo kial estas nova, sinjoro? – mi diris.

3 Ĉar – li diris – en la lastaj tagoj de la plenumiĝo li fariĝis manifesta, tial nova fariĝis tiu pordo, por ke tiuj, kiuj saviĝos, eniru per ĝi en la regnon de Dio.

4 Ĉu vi ne vidis – li diris – la ŝtonojn, kiuj tra la pordo eniris en la konstruon de la turo, kaj same tiujn, kiuj ne eniris <tra ĝi>, reĵetitaj al sia propra loko?

Mi vidis, sinjoro – mi diris.

Tiel – li diris – do en la regnon de Dio neniu eniros, se li ne akceptas la nomon de lia Filo.

5 Ĉar se iu volas eniri en certan urbon, kaj tiu urbo havas remparojn ĉirkaŭe kaj nur unu pordon, ĉu li povas eniri en tiun urbon, krom tra tiu sola pordo, kiun ĝi havas?

Ho – mi diris –, sinjoro, kiel povas esti aliel?

Se do eniri en tiun urbon vi ne povas, krom tra tiu pordo, tielsame – li diris – ankaŭ en la regnon de Dio ne alimaniere eniri povas la homo, krom per la nomo de lia plej amata Filo.

6 Vi ja vidis – li diris – la amason, kiu konstruadis la turon?

Mi vidis, sinjoro – li diris.

Tiuj – li diris – estas ĉiuj gloraj anĝeloj. Per ili la Sinjoro estis ĉirkaŭita. Sed la pordo estas la Filo de Dio. Tio estas la aliro al la Sinjoro. Ĉar alie neniu povas eniri al Li, krom per Lia Filo.

²⁵ Vidu ekzemple en Johano 1:1-2, kaj en *Leteroj de Paŭlo kaj lia Skolo*, p. 65: noto pri 2:6 ktp.

7 Ĉu vi vidis – li diris – la ses virojn kaj meze de ili la gloran kaj grandan viron, kiu promenis ĉirkaŭ la turo kaj malakceptis tiujn ŝtonojn de la konstruo?

Mi vidis, sinjoro – mi diris.

8 Tiu glora viro – li diris –, estas la Filo de Dio kaj tiuj ses estas la gloraj anĝeloj, kiuj gardas lin dekstre kaj maldekstre. El tiuj gloraj anĝeloj – li diris – neniu povas eniri al Dio, sen li; ĉiu, kiu ne akceptas lian nomon, ne eniras en la regnon de Dio.

13 [90]: 1 Sed la turo – mi diris al li –, kio estas?

Tiu turo – li diris – estas la Eklezio.

La virgulinoj ĉirkaŭ la turo

2 Kaj tiuj virgulinoj – kiuj estas?

Estas sanktaj spiritoj; kaj neniu homo povas troviĝi en la regno de Dio, se ili ne vestis lin per siaj vestaĵoj; ĉar se vi ricevas nur la nomon, sed ne ricevas de ili la vestaĵojn, tio neniom helpas al vi. Ĉar tiuj virgulinoj estas fortoj de la Filo de Dio. Se vi do portas la nomon, sed ne lian forton, lian nomon vi portos vane. 3 Kaj tiuj ŝtonoj – li diris –, kiujn vi vidas esti forĵetitaj, tiuj ja portis lian nomon, sed la vestaĵon de la virgulinoj ili ne portis.

Kia – mi diris – sinjoro, kia estas ilia vestaĵo, sinjoro?

La nomoj mem – li diris – estas ilia vestaĵo. Kiu ajn ja portas la nomon de la Filo de Dio, tiu devas ankaŭ iliajn nomojn porti; ĉar la Filo mem portas la nomojn de tiuj virgulinoj.

4 Ĉiuj ŝtonoj – li diris –, kiujn vi vidis eniĝi en la konstruon, transdonatajn de iliaj manoj, kaj restantajn por tiu konstruo, estas vestitaj per la forto de tiuj virgulinoj. 5 Ĉar tiucele vi vidas la turon monolito farita kune kun la roko. Tiel same ankaŭ tiuj, kiuj fidis je Dio per Lia Filo, vestitaj en tiuj spiritoj, fariĝos unu spirito, unu korpo, kaj unu

koloro en iliaj vestaĵoj. De tiaj personoj, kiuj portas la nomojn de la virgulinoj, la loĝejo estas en la turo.

6 Sed, sinjoro – mi diris –, la ŝtonoj, kiuj estis forigitaj, kial ili estis flanken metitaj? Ĉar ili ja eniris tra la pordo, kaj per la manoj de la virgulinoj ili estis lokitaj en la konstruon de la turo.

Ĉar ĉio ĉi interesas vin – li diris –, kaj vi diligente demandas, aŭskultu do pri la ŝtonoj flanken metitaj. 7 Ili ĉiuj – li diris – ricevis la nomon de la Filo de Dio, sed ankaŭ ricevis la forton de tiuj ĉi virgulinoj. Kiam do per tiuj spiritoj ili fortiĝis, ili ankaŭ estis kun la sklavo de Dio, kaj ili ĉiuj havis unu spiriton kaj unu korpon kaj unu vestaĵon; ĉar ili pensis la samon, kaj faris justecon. 8 Post certa tempo ili estis persvuditaj de la virinoj, kiujn vi vidis kun la nigraj vestaĵoj, kaj kun la ŝultroj liberaj kaj la haroj neligitaj, tiuj belaspektaj. Kiam ili vidis tiujn, ili ekdeziris ilin, kaj ili sin vestis per ilia povo, sed forigis de si la vestaĵojn de la virgulinoj. 9 Tiam ili do estis forigitaj el la domo de Dio, kaj estis transdonitaj al tiuj <virinoj>. Sed tiuj, kiuj ne estis trompita de la beleco de tiuj virinoj, restis en la domo de Dio.

Jen do – li diris – la klarigon pri la forĵetitaj.

La pentofaro

14 [91]: 1 Kio do, sinjoro – mi diris –, se tiuj homoj, estante tiaj, ekpentos kaj forĵetos la deziron je tiuj virinoj, kaj reiros al la virgulinoj, kaj promenos en ilia povo kaj en iliaj agoj, ĉu tiam ili ne eniros la domon de Dio?

2 Ili eniros – li diris –, se ili forĵetos la agojn de tiuj virinoj, reprenos la forton de la virgulinoj, kaj promenos en iliaj agoj. Tiukiale estis interrompita la konstruado, por ke se tiuj pentas, ili povu eniĝi en la konstruon de la turo. Sed se ili ne pentos, tiam aliaj eniros, kaj tiuj fine estos forĵetitaj.

3 Pri ĉio ĉi mi dankodiris al la Sinjoro, ĉar li kompatis pri ĉiuj, kiuj alvokis lian nomon, kaj <ke li> sendis la anĝelon de la pento al ni, kiuj

pekis kontraŭ li, kaj ke li novigis nian spiriton kaj novigis al ni la vivon, kvankam ni estis perditaj kaj sen espero pri vivo.

La turo sur la roko. Nomoj de la virgulinaj kaj de la virinaj

4 Nun, sinjoro – mi diris –, klarigu al mi, kial la turo ne estis konstruita sur la grundo, sed sur la roko kaj super la pordo.

Ĉu – li diris – vi ankoraŭ estas senscia kaj ne komprenas?

Mi havas grandan devon – mi diris –, sinjoro, por ĉion ĉi demandi je vi, ĉar mi absolute ne povas kompreni; ĉar ĉio ĉi estas granda kaj glora kaj ne komprenebla por la homoj.

5 Aŭskultu – li diris –: la nomo de la Filo de Dio estas granda kaj nekomprenebla, kaj portas la tutan mondon. Se do la tuta kreo estas portata de la Filo de Dio, kion vi do opinias pri tiuj, kiuj estas vokitaj de li, kaj portas la nomon de la Filo de Dio, kaj promenos en liaj ordonoj?

6 Ĉu vi do vidas, kiajn li portas? Tiujn, kiuj tutkore portas lian nomon. Li mem fariĝis por ili fundamento, kaj plezure li ilin portas, ĉar ili ne hontas porti lian nomon.

15 [92]: 1 Klarigu al mi – mi diris –, sinjoro, de la virgulinaj la nomojn kaj de la virinaj, kiuj havas nigrajn vestaĵojn.

Aŭskultu – li diris – de la virgulinaj la²⁶ nomojn, unue de la pli fortaj, kiuj staras ĉe la anguloj. 2 La unua nomiĝas Fido; la dua – Sinregado, la tria – Forteco, la kvara – Pacienco. Sed la ceteraj, kiuj havas lokon inter ili, havas tiujn ĉi nomojn: Simpleco, Senmalico, Pureco, Ĝojo, Vereco, Kompreno, Konkordo, Amo. Kiu tiujn ĉi nomojn portas kaj la nomon de la Filo de Dio, tiu povos eniri en la regnon de Dio.

3 Aŭskultu – li diris – ankaŭ la nomojn de la virinaj kun la nigraj vestaĵoj. Ankaŭ el tiuj, kvar estas pli potencaj ol la ceteraj; la unua estas Senfido, la dua – Senbrideco, la tria – Malobeo, la kvara – Trompo; kaj iliaj sekvantoj nomiĝas Tristo, Malboneco, Diboĉo, Kolero, Mensogo,

²⁶ La teksto tie ĉe ŝajne estas iom senzorge transdonita.

Sensenco, Kalumnio kaj Malamo. La sklavo de Dio, kiu portas iliajn nomojn, ja vidos la Regnon de Dio, sed ne eniros en ĝin.

Kion simbolas la ŝtonoj

4 Sed – mi diris –, la ŝtonoj, kiuj el la profundo estis adaptitaj al la konstruo, kiuj estas?

La unuaj – li diris –, tiuj dek metitaj kiel fundamento, estis la unua generacio; la dudek kvin – la dua generacio de justaj viroj; la tridek kvin – profetoj de Dio kaj Liaj servantoj; la kvardek – apostoloj kaj instruistoj de la predikinstruo pri la Filo de Dio.

5 Sed – mi diris –, kial do, sinjoro, la virgulinoj prezentis ankaŭ tiujn ŝtonojn al la konstruo de la turo, por porti ilin tra la pordo?

6 Ĉar tiuj unuaj – li diris – portis tiujn spiritojn, kaj neniam ili distanciĝis unuj de la aliaj, nek la spiritoj disde la homoj, nek la homoj disde la spiritoj, sed la spiritoj daŭre restis kun ili, ĝis ili endormiĝis²⁷. Kaj se tiujn spiritojn ili ne tenus kun si, ili ne estus utilaj por la konstruo de ĉi tiu turo.

16 [93]: 1 Sinjoro – mi diris –, klarigu al mi ankoraŭ ion.

Kion – li diris – krome vi ankoraŭ deziras?

Kial, sinjoro – mi diris –, supreniĝis tiuj ŝtonoj el la profundo kaj eniĝis en la konstruon de la turo, kvankam antaŭe ili portis tiujn spiritojn?

2 Por ili estis necese – li diris –, supreniĝi tra akvo, por fariĝi vivaj; ne alimaniere ili povis eniri en la region de Dio, krom se la mortecon ili demetu de sia [antaŭa] vivo. 3 Ankaŭ do tiuj, kiuj endormiĝis, ricevis la sigelon de la Filo de Dio kaj eniris en la region de Dio; ĉar – li diris – antaŭ ol la homo ekportas la nomon de la Filo de Dio, li estas morta. Sed kiam li ricevas la sigelon, la mortecon li demetas kaj ekhavas la vivon. 4 Nu, la sigelo estas la akvo; do mortaj eniras la akvon, kaj supreniĝas

²⁷ Eŭfemismo por morti.

vivaj. Al ili do estis predikata tiu sigelo kaj ili uzis ĝin, por ke ili eniru la Regnon de Dio.

5 Sinjoro – mi diris –, kial la kvardek ŝtonoj do kun ili supreniĝis el la profundo, kvankam la sigelon ili jam ricevis?

Ĉar – li diris – tiuj, la apostoloj kaj la instruistoj, kiuj predikis la nomon de la Filo de Dio, post kiam ili endormiĝis en la povo kaj la fido je la Filo de Dio, predikis ankaŭ al la antaŭe endormiĝintoj kaj mem donis al ili la sigelon de la predikinstruo. 6 Tial do ili subeniris kun ili en la akvon, kaj ree supreniĝis. Sed tiuj vivaj subeniris, kaj ree supreniĝis vivaj; dum la aliaj antaŭe endormiĝintaj mortaj subeniris, sed vivaj supreniĝis. 7 Tial tiumaniere ili estis vivigitaj kaj plene ekkonis la nomon de la Filo de Dio. Same do tial ili ankaŭ supreniĝis kun ili kaj kune estis alĝustigitaj en la konstruon de la turo, kaj ne prihakitaj estis kune enkonstruitaj. Ĉar ili endormiĝis en justeco kaj en granda sankteco. Sed ili nur ne havis tiun sigelon; jen vi do havas ankaŭ tiun klarigon.

Jes, sinjoro – mi diris.

Kion simbolas la montoj

17 [94]: 1 Nun do, sinjoro – mi diris – klarigu al mi pri la montoj; ĉar ili estas tre diversaj, laŭ aspektoj, kaj buntaj.

Aŭskultu – li diris: tiuj dek du montoj estas la dek du triboj, kiuj loĝas en la tuta mondo. Al ili estis predikata la Filo de Dio fare de la apostoloj.

2 Sed klarigu al mi, sinjoro, kial ili estas tiel buntaj, ĉiuj tiuj montoj kun aliaj aspektoj.

Aŭskultu – li diris. La dek du triboj, kiuj loĝas en la tuta mondo, estas dek du nacioj. Buntaj ili estas en kompreno kaj en menso; same buntaj kiel vi vidis tiujn montojn, tiel same buntaj estas de tiuj nacioj la menso kaj la kompreno. Kaj nun mi montros al vi kiel agas ĉiu unuope.

3 Sed unue, sinjoro – mi diris – tion vi klarigu, se tiel buntaj estas tiuj montoj, kiel, se iliaj ŝtonoj estas metitaj en la konstruon, tamen

unukolore ili fariĝas brilaj, same kiel la ŝtonoj, kiuj supreniĝis el la profundo.

4 Tio estas – li diris –, ĉar ĉiuj nacioj, kiuj loĝas sub la ĉielo, kiam ili aŭskultis kaj fidis je la sola nomo, estis vokataj de la Filo de Dio. Se ili do ricevis la sigelon, unu komprenon kaj unu menson ili ekhavis, kaj unu fariĝis ilia fido kaj unu amo, kaj ili portis la spiritojn de la virgulinoj kune kun tiu nomo; tial la konstruo de la turo fariĝis unukolora, same brila kiel la suno. 5 Sed post kiam ili eniĝis kaj fariĝis unu korpo, kelkaj el ili malpurigis sin mem kaj estis elpelitaj el la socio de la justuloj, kaj ree fariĝis kiel antaŭe ili estis, eĉ pli: pli malbonaj.

18 [95]: 1 Kiel, sinjoro – mi diris –, ili povis fariĝi pli malbonaj, se antaŭe ili plene ekkonis Dion?

Kiu antaŭe ne konis Dion – li diris al mi – kaj malbone agas, tiu meritas punon pro sia malbono, sed kiu Dion konas, ne plu devas malbonfari, sed bonfari. 2 Sed kiam do, kiu devas bonfari, malbonfaras, ĉu li do ne ŝajnas fari pli da malbono, ol tiu, kiu Dion ne konas? Tial tiuj, kiuj ne konis Dion sed ja malbonfaras, estas kondamnitaj al la morto, sed kiuj Dion ja konis kaj vidis Liajn grandaĵojn, sed ja malbonfaris, duoble estos punitaj kaj mortos poreterne. En tiu senco la Eklezio de Dio estos purigita. 3 Sed kiel vi vidis, ke tiuj ŝtonoj estis forprenitaj el la turo kaj transdonitaj al malbonaj spiritoj kaj el tie elĵetitaj (kaj estos unu korpo de la purigitoj, samkiel, post kiam ĝi puriĝis, ankaŭ fariĝis la turo kvazaŭ formita el unu ŝtono), tiel same estos ankaŭ la Eklezio de Dio, post kiam purigita ĝi estos kaj forigitaj la malbonuloj kaj la hipokrituloj kaj la blasfemuloj kaj la dubmensuloj kaj la plenumantoj de buntaj malbonaĵoj. 4 Kiam tiuj estos elĵetitaj, la Eklezio de Dio estos unu korpo, unu kompreno, unu menso, unu fido, unu amo. Kaj tiam la Filo de Dio ĝojos kaj estos gaja pro ili, ĉar sian popolon li estos rericivinta pura.

Grandioza, sinjoro – mi diris – kaj mirinda ĉio ĉi estas. 5 Krome, sinjoro – mi diris –, montru al mi la forton kaj la farojn de ĉiu unuopa monto, por ke ĉiu animo fidu je la Sinjoro kaj, kiam ĝi tion ĉi aŭdas, gloru lian grandan kaj mirindan kaj gloran nomon.

Aŭskultu – li diris – pri la bunteco de la montoj kaj de la dek du nacioj.

19 [96]: 1 El la unua monto, kiu estis nigra, la fiduloj estas tiaj: ribelantoj kaj blasfemuloj kontraŭ la Sinjoro, kaj perfidantoj de la sklavoj de Dio. Por ili ne estas pentado, sed ja estas morto, kaj tial ili estas nigraj; ilia gento ja estas senleĝa. 2 Kaj el la dua monto, la nuda, la fiduloj estas tiaj: hipokrituloj kaj instruistoj de malbono. Ankaŭ tiuj do estas similaj je la antaŭaj, sen frukto de justeco; ĉar same kiel ilia monto estas senfrukta, tiel same ankaŭ tiuj homoj ja havas la nomon, sed estas malplenaj je la fido, kaj ne estas frukto de justeco en ili. Por tiuj do pretas <ebleco je> pento, se baldaŭ ili pentos; sed se ili prokrastas, ilia morto estos kun la antaŭaj.

3 Kial, sinjoro – mi diris – por ili estas <ebleco je> pento, sed ne por la antaŭaj? Ĉar iliaj faroj estas ja preskaŭ identaj.

Tial – li diris – por ili eblis pento, ĉar ili ne blasfemis sian Sinjoron, nek fariĝis perfidantoj de la sklavoj de Dio, sed pro espero je gajno ili fariĝis hipokrituloj kaj instruis laŭ la deziroj de pekplenaj homoj. Sed ili estos punitaj; tamen restas por ili <ebleco je> pento, ĉar ili ne estas blasfemuloj nek perfidintoj.

20 [97]: 1 El la tria monto, tiu kun dornoj kaj kardoj, la fiduloj estas tiaj: kelkaj el ili estas riĉaj kaj aliaj enplektitaj en multaj negocaj aferoj. La kardoj estas la riĉaj, kaj la dornoj – tiuj enplektitaj en negocaj aferoj. 2 Tiuj do, tiuj enplektitaj en multaj negocaj aferoj, ne gluiĝas al la sklavoj de Dio, sed forvagas, sufokitaj de siaj aferoj; sed la riĉuloj malfacile gluiĝas al la sklavoj de Dio, timante, ke ili petos ion de ili. Tiaj do malfacile eniros en la regnon de Dio. 3 Ĉar same kiel estas malfacile marŝi nudpiede sur kardoj, tiel same por ili estas malfacile eniri en la regnon de Dio. 4 Sed por ili ĉiuj restas <ebleco je> pento, sed ja rapide, por ke kion en la antaŭaj tempoj ili ne faris, tion nun ili rekaptu en kelkaj tagoj kaj faru ion bonan. Se ili do pentas kaj faras ion bonan, ili vivos antaŭ Dio; sed se ili restas ĉe siaj agoj, ili estos transdonataj al tiuj virinoj, kiuj faros ilin mortaj.

21 [98]: 1 El la kvara monto, kiu havas multan vegetaĵaron, kun parto de la herbo verda, parte seka ĉe la radikoj, parte elsekigita de la suno, la fiduloj estas tiaj: la dubmensaj, kiuj havas la Sinjoron je la lipoj, sed kiuj ne havas Lin en la koro. 2 Tial ilia fundamento estas seka kaj ne havas

forton, kaj nur iliaj paroloj vivas, sed la agoj estas mortaj. Tiaj homoj nek vivas nek estas mortaj. Ili do similas la dubmensulojn; ĉar la dubmensuloj estas nek verdaj nek sekaj; ili ja ne vivas, nek estas mortintaj. 3 ĉar kiel ilia herbo estis sekiĝinta, ĉar ĝi vidis la sunon, tiel same la dubmensaj, kiam elproviĝon ili aŭdas, pro sia malkuraĝo ili adoras idolojn, kaj hontas pro la nomo de sia Sinjoro. 4 Tiaj do nek vivas nek estas mortintaj. Sed ankaŭ tiuj, se rapide ili pentas, povas vivi; sed se ili ne pentas, ili jam estas transdonitaj al la virinoj, kiuj forprenas ilian vivon.

22 [99]: 1 Kaj el la kvina monto, kiu havas verdan herbon kaj estas kruda, la fiduloj estas jenaj: fidelaj, sed malrapide ĉe la lernado, obstinaj kaj sinlaŭdaj, dezirante scii ĉion, kaj absolute nenion ili komprenas. 2 Pro tiu ilia obstino, la kompreno estis malproksima de ili, kaj stulta sensaĝo eniris en ili. Ili laŭdas sin mem kiel homojn kun multa kompreno, kaj deziras esti mem-instalitaj instruistoj, kvankam stultaj ili estas. 3 Dank' al tiu kora fiero multaj fariĝis malplenaj, dum ili sinlaŭdis tro; ĉar granda demono estas la sinplaĉo kaj la vana sinkonfido; el tiuj do multaj estis malakceptitaj. Sed kelkaj pentis, kaj fariĝis fiduloj kaj submetis sin al tiuj, kiuj havis komprenon, ĉar ili rekonis sian sensencon. 4 Ankaŭ al la ceteraj ĉi-specaj restas <eblo je> pento. Ĉar ili ne estas malbonaj, sed plie stultaj kaj senkomprenaj. Tiuj do, se ili pentos, vivos antaŭ Dio. Sed se ili ne pentos, ili loĝos kun la virinoj, kiuj malbonagas kontraŭ ili.

23 [100]: 1 Sed el la sesa monto, kiu havis grandajn kaj malgrandajn fendojn, kaj en la fendoj vegetaĵaron forvelkantan, la fiduloj estas jenaj: 2 tiuj kun la etaj fendoj – tiuj estas, kiuj havas etajn kvereletojn inter si, kaj pro sia kalumniado ili estas sekiĝintaj pri la fido; sed multaj el ili pentis. Kaj la ceteraj pentos, kiam ili aŭdas miajn ordonojn; ĉar nur eta estas ilia kalumniado, kaj baldaŭ ili pentos. 3 Sed tiuj kun la grandaj fendoj – tiuj persistas en sia kalumniado kaj fariĝas venĝemaj, en rankoro reciproka. Tiuj do estis forĵetitaj el la turo kaj malakceptitaj ĉe ĝia konstruo. Tiaj do malfacile povos vivi. 4 Se Dio kaj nia Sinjoro, kiu regas ĉion kaj havas potencon super Sia tuta kreo, ne rankoras kontraŭ tiuj, kiuj konfesas siajn pekojn, sed montriĝas pardonema, ĉu do la homo – mortema kaj plena je pekoj – estu venĝema kontraŭ alia homo, kvazaŭ li povus pereigi aŭ savi lin? 5 Mi diros al vi – mi, anĝelo de pento – : ĉiuj

kiuj tenas tiun ĉi herezon, formetu ĝin de vi kaj pentu, kaj la Sinjoro sanigos viajn antaŭajn pekojn, se vi purigos vin de tiu demono; sed se ne, vi transdoniĝos al la morto.

24 [101]: 1 Kaj el la sepa monto, sur kiu estis verdaj kaj gajaj vegetaĵoj, kaj la tuta monto bonfartis, kaj ĉiu speco de brutoj kaj la birdoj de la ĉielo paŝtiĝis tie en la herboj de tiu monto, kaj la herboj, sur kiuj ili paŝtiĝis, ekburĝonis – la fiduloj estas tiaj: 2 ili ĉiel estis simplaj kaj senmalicaj kaj feliĉaj, sen reciprokaj kvereletoj, sed ĉiel ili ĝojis pri la sklavoj de Dio kaj estis vestitaj en la Sankta Spirito de tiuj virgulinoj kaj ĉiel havis kompaton pri ĉiu homo, kaj al ĉiu homo ili regalis senriproĉe kaj senhezite el siaj penadoj. 3 Ĉar la Sinjoro vidis ilian simplecon kaj ilian senkulpecon, Li faris ilin riĉaj en la penado de iliaj manoj kaj favoris ilin en ĉiuj iliaj agoj. 4 Sed al vi, kiuj estas tiaj, mi, la anĝelo de la pento, diras: restu ĝisfine tiaj kiel nun vi estas, kaj via semo neniam estos forstrekita. Ĉar la Sinjoro elprovis vin kaj notis vin en la nombron de la Siaj, kaj tuta via semaĵo loĝos kun la Filo de Dio; ĉar de Lia Spirito vi ricevis.

25 [102]: 1 Kaj el la oka monto, kie estis la multaj fontoj kaj la tuta kreo de la Sinjoro trinkis el la fontoj – la fiduloj estis jenaj: 2 apostoloj kaj instruistoj, kiuj predikadis en la tuta mondo, kaj kiuj instruis sobre kaj pure la parolon de la Sinjoro, kaj absolute nenion retenis por si mem pro malbona deziro, sed ĉiam promenis en justeco kaj vero, kiel ankaŭ ordonis la Sankta Spirito. Tiaj eniras kune kun la anĝeloj.

26 [103]: 1 Kaj el la naŭa monto, kiu estis dezerta, kaj kiu havis reptiliojn kaj sovaĝajn bestojn sur si, kiuj pereigas la homojn – la fiduloj estis jenaj: 2 tiuj, kiuj havas makulojn, estas diakonoj, kiuj malbone diakonas kaj prirabas la porvivon de vidvinoj kaj orfoj, riĉigante sin en la diakona laboro, kiun ili ricevis por plenumi; se ili restas ĉe sia deziro, ili estas mortintaj, kaj restas neniu espero je vivo; sed se ili konvertiĝas kaj pure plenumas sian diakonecon, ili povos vivi. 3 Sed la skabiaj estas tiuj, kiuj malkonfesis kaj ne revenis al sia Sinjoro, sed fariĝis sekaj kaj dezertaj, ne gluiĝante al la sklavoj de Dio, sed restante solaj pereigas siajn proprajn animojn. 4 Ĉar same kiel vito, postlasita en ĉirkaŭbaraĵo kaj neglektita, pereas kaj estas superkreskata de la herboj, kaj finfine fariĝas sovaĝa kaj ne plu utilas por la posedanto, tiel same ankaŭ tiaj homoj malesperas pri

si mem kaj fariĝas senutilaj por sia Sinjoro, sovaĝiĝante. 5 Al ili tiam venas pento, krom se ili montriĝas ĝis funde en la koro malkonfesintaj; ĉar se iu homo montriĝas malkonfesi ĝis funde en la koro, mi ne scias, ĉu por li estos ankoraŭ eble vivi. 6 Kaj tion mi ne diras pri la nunaj tagoj, ke iu, kiu malkonfesis, ekpentu; ĉar ne estas eble por li saviĝi, se li malkonfesos sian Sinjoron nun; sed por tiuj, kiuj malkonfesis Lin antaŭ longe, ŝajne ekzistas eblo je pento. Tial, se iu do pentos, tio okazu baldaŭ, antaŭ ol pretos la turo; ĉar se ne, de la virinoj li estos pereigita ĝismorte. 7 Kaj la stumpigitaj – tio estas la perfiduloj, la kalumniantoj; kaj la sovaĝaj bestoj, kiujn vi vidis sur la monto, estas tiuj. Ĉar same kiel sovaĝa besto per sia veneno mortigas kaj neniigas la homon, tiel same la vortoj de tiaj homoj pereigas kaj neniigas la homon. 8 Tiuj do estas stumpigitaj je sia fido, ĉar ili havas tian agon en si mem; sed kelkaj el ili pentis kaj saviĝis. Kaj ankaŭ la ceteraj de tiu speco povas saviĝi, se ili pentas; sed se ili ne pentas, ili mortos per tiuj virinoj, kies forton ili havas.

27 [104]: 1 El la deka monto, kie estis arboj, kiuj ombroze ŝirmis certajn ŝafojn, la fiduloj estis jenaj: 2 episkopoj kaj gastemuloj, kiuj volonte en siaj domoj bonvenigis ĉiam la sklavojn de Dio sen hipokriteco; tiuj episkopoj ĉiam senĉese ŝirmadis per sia diakoneco la bezonulojn kaj la vidvinojn kaj kondutis ĉiam en pureco. 3 Tiuj do ĉiuj estos sub la ŝirmado de la Sinjoro por ĉiam. Kiuj faris tion, tiuj do estas gloraj antaŭ Dio, kaj ilia loko estas jam nun ĉe la anĝeloj, se ili daŭre ĝisfine restos en la servado de la Sinjoro.

28 [105]: 1 Kaj el la dekunua monto, kie estis arboj fruktoplenaj, ornamitaj per diversaj fruktoj, la fiduloj estis jenaj: 2 tiuj, kiuj suferis pro la nomo de la Filo de Dio, kiuj volonte suferis el la tuta koro kaj foroferis siajn animojn.

3 Sed kial, sinjoro – mi diris –, ĉiuj ĉi arboj havas fruktojn, sed kelkaj fruktoj estas pli belaj ol la aliaj?

Aŭskultu – li diris –: ĉiuj, kiuj suferis pro la nomo, estas gloraj antaŭ Dio, kaj de ĉiuj ĉi la pekoj estas pardonitaj, ĉar ili suferis pro la nomo de la

Filo de Dio. Aŭdu nun, kial iliaj fruktoj estas tiel buntaj, kelkaj pli ol la aliaj. 4 Ĉiuj – li diris –, kiuj estis kondukitaĵoj antaŭ la potenco²⁸, estis esplordemanditaĵoj kaj ne malkonfesis, sed kiuj volonte suferis – tiuj estas des pli gloraj antaŭ la Sinjoro; ilia frukto estas supera. Sed ĉiuj, kiuj montriĝis malkuraĝaj kaj perdiĝis en dubsenco, kaj en siaj koroj rezonadis, ĉu malkonfesi aŭ konfesi, kaj tamen suferis – ties fruktoj estas malpli grandaj, ĉar tiu intenco eniris en ilian koron; ĉar tiu intenco estas malbona, ke sklavo malkonfesu sian sinjoron. 5 Atentu do, vi kiuj flegas tiun ideon, ke tiu intenco ne restu en viaj koroj kaj vi mortu por Dio. Sed vi, kiuj suferas pro la nomo, vi devas glori Dion, ĉar Dio vin opiniis indaj, ke tiun nomon vi portu, kaj ĉiuj viaj pekoj estu sanigitaj. 6 Konsideru vin do feliĉaj; ja kreu, ke grandan faron vi faris, se iu el vi suferas pro Dio. Ĉar vivon la Sinjoro donas al vi, kaj vi ne konscias tion; ĉar viaj pekoj pezpremis vin, kaj se vi ne suferis pro la nomo de la Sinjoro, per viaj pekoj vi mortus por Dio. 7 Tion mi diras al vi, kiuj hezitas inter konfesi kaj malkonfesi. Konfesu, ke la Sinjoron vi havas, por ke, malkonfesante, vi ne estu transdonitaĵoj al la malliberejo. 8 Se la paganoj siajn sklavojn punas, se sian sinjoron iu malkonfesas, kion vi kredas, ke faros via Sinjoro, kiu havas la potencon pri ĉio? Forigu do tiujn konsiderojn el viaj koroj, por ke por ĉiam vi vivu por Dio.

29 [106]: 1 Kaj el la dekdua monto, tiu blanka, la fiduloj estis jenaj: ili estis kvazaŭ senkulpaĵoj infanoj, al kiuj neniu malbono supreniĝas en la koron, kiuj konas neniun fiecon, sed ĉiam en senkulpeco ili restas. 2 Tiaj sendube loĝas en la regno de Dio, ĉar en nenio ili makulis la Ordonojn de Dio, sed kun senkulpeco ili restis ĉiujn tagojn de sia vivo en la sama sinteno. 3 Ĉiuj el vi – li diris – kiuj restos kvazaŭ infanoj, sen ia malbono, tiuj estos la plej gloraj el ĉiuj, kiujn mi menciis ĝis nun; ĉar ĉiuj infanoj estas gloraj antaŭ Dio, kaj estas la unuaj antaŭ Li. Feliĉaj do vi ĉiuj, kiuj forigis de vi la malbonon, kaj vestas vin per senfiecigo: vi vivos kiel unuaj por Dio.

²⁸ Konsulo, prokonsulo k. s.

Kion simbolas la ŝtonoj

4 Post kiam la parabolojn de la montoj li finis, mi diris al li:

Sinjoro, klarigu al mi nun pri la ŝtonoj, kiuj estis prenitaj el la ebenaĵo kaj metitaj en la konstruon anstataŭ la ŝtonoj forigitaj el la turo, kaj pri la rondaj, kiuj estis metitaj en la konstruon, kaj tiuj, kiuj restis rondaj.

30 [107]: 1 Aŭskultu – li diris – ankaŭ pri ĉio tio. La ŝtonoj prenitaj el la ebenaĵo kaj metitaj en la konstruon de la turo anstataŭ la forĵetitaj estas la radikoj de tiu ĉi blanka monto. 2 Ĉar do ĉiuj fiduloj el tiu ĉi blanka monto montriĝis senfiecaj, la sinjoro de la turo ordonis meti ilin en la konstruon de la turo; li ja sciis, ke se tiuj ŝtonoj eniros en la konstruon, ili restos brilaj, kaj neniu el ili fariĝos nigra.

*<La sekva kursiva teksto
ne restis al ni en la origina Greka lingvo, sed en Latina traduko.>*

3 Sed se el la ceteraj montoj <ŝtonojn> li aldonus, estus nepre necese unue kontroli tiun turon kaj purigi. Sed ili ĉiuj montriĝis blankaj, kaj kiuj estis fiduloj kaj kiuj estos fiduloj; ĉar ili estas de la sama speco. Feliĉa tiu speco, ĉar senfieca ĝi estas. 4 Aŭskultu do same pri la rondaj kaj brilaj ŝtonoj. Ankaŭ ĉiuj tiuj estas el la blanka monto. Sed aŭdu, kial ili montriĝis rondaj. Ilia riĉeco mallonge obskurigis kaj malheligis ilin disde la vero, sed de Dio neniam ili foriris, kaj neniu malbona vorto eskapis el ilia buŝo, sed nur justeco kaj vero. 5 Kiam la Sinjoro do vidis ilian menson, ke ili povas favori la veron, kaj samtempe resti bonaj, Li ordonis forteni iliajn posedaĵojn de ili, sed ne komplete forigi, tiel ke ili povas <ankoraŭ> fari iom da bono el tio, kio restas al ili, kaj ili vivu por Dio, ĉar ili estas el la bona speco. Tial do ili estis iom prihakitaj kaj metitaj en la konstruon de tiu ĉi turo.

31 [108]: 1 Sed la ceteraj <ŝtonoj>, kiuj restis rondaj kaj ne estis adaptitaj al tiu konstruo, ĉar ili ankoraŭ ne ricevis la sigelon, estis remetitaj en sia loko; ili ja montriĝis tre rondaj. 2 Ĉar ĉi tiu mondo kaj la vantaĵoj de ĝiaj riĉoj devas esti prihakitaj for de ili, kaj tiam ili konvenas en la regno de Dio. Ĉar estas necese, ke ili eniru en la Regnon de Dio; ĉar Dio benis tiun senkulpan specon. El tiu speco neniu pereas. Eĉ se unu el ili estas forlogata de la plej fia diablo, kaj pekas,

baldaŭ li reiros al sia Sinjoro. 3 Feliĉaj vin ĉiujn mi juĝas, mi anĝelo de la penton, vin ĉiujn, kiuj estas senkulpaj kiel infanoj, ĉar via parto estas bona kaj honora antaŭ Dio.

Fina admono

4 Al vi ĉiuj mi diras, al vi kiuj ricevis tiun ĉi sigelon, ke la simplecon vi retenu kaj ne estu venĝema pro ofendoj, nek restu en via malico aŭ en memoro pri amaraj ofendoj, sed fariĝu unu-spirita kaj tiujn ĉi malbonajn fendojn kuracu kaj forigu de vi, por ke la Sinjoro de la grego ĝoju pri tio. 5 Ja Li ĝojos, se ĉion Li trovos sana. Sed se parton de la grego Li trovos dispelita, ve al la paŝtistoj! 6 Ĉar se la paŝtistoj mem montriĝas dispelitaj, kion ili do diru pri tiuj ĉi ŝafoj? Ĉu ili diru, ke la grego maltraktis ilin? Al ili neniu kredos. Estas ja nekredebla afero, ke Paŝtisto povas suferi de la ŝafaro; kaj li des pli estos punata pro tiu mensogo. Ankaŭ mi estas Paŝtisto, kaj plej rigore mi devas respondi pri vi.

32 [109]: *1 Do sanigu vin mem, dum la turo ankoraŭ estas en konstruo. 2 La Sinjoro loĝas ĉe homoj, kiuj amas la pacon; ĉar la paco estas kara al Li; sed de kverelemuloj kaj perditoj en malico Li restas longe for. Redonu do al Li spiriton nelezitan, kiel vi ricevis ĝin. 3 Ĉar supozu, ke al fulisto vi konfidis novan senmankan vestaĵon, kaj tiun denove senmanka vi volas rericivi, sed la fulisto redonas ĝin ŝirita – ĉu tion vi akceptas? Ĉu vi ne tuj ekfuriozas kaj atakas lin per riproĉoj, dirante: Novan vestaĵon senmankan mi donis al vi; kial vi ŝiris ĝin kaj faris ĝin neuzebla? Pro la ŝiro, kiun en ĝi vi faris, ĝi ne plu estas uzebla. Ĉu ne ĉiujn tiujn vortojn vi diros al la fulisto pro la ŝiro, kiun li faris en via vestaĵo? 4 Se do vi ĉagreniĝas pro via vestaĵo kaj plendas, ke ĝin vi ne rricevas senmanka, kion vi kredas, ke la Sinjoro faros kun vi, al kiu senmankan spiriton Li donis, kaj vi redonis ĝin neuzebla, tiel ke al sia Sinjoro neniel ĝi plu povas utili? Ĉar ne plu taŭga fariĝis ĝia uzado, de post kiam ĝi estis koruptita de vi. Ĉu la Sinjoro de tiu spirito ne punos vin pro tio per la morto?*

5 Klare – mi diris –, ĉiujn, kiujn Li trovas en venĝema malico, Li punos.

Lian pardonemon – li diris – vi ne distretu, sed prefere gloru Lin, ĉar Li estas tiel pardonema pri viaj krimoj, kaj Li ne estas tia kiel vi. Do faru penton, kiu utilas al vi.

33 [110]: 1 Ĉion, kio supre estas skribita, mi, la Paŝtisto, la anĝelo de la pento, montris kaj diris al la sklavoj de Dio. Se vi do estos fiduloj kaj aŭskultos miajn dirojn kaj promenos en tio kaj ĝustigos viajn padojn, vi povos vivi. Sed se vi restos en la malbono kaj daŭre memoros ofendojn, neniu de tiu speco vivos antaŭ Dio. Ĉio, kion mi devis diri, nun estas dirita.

2 La Paŝtisto mem diris al mi:

Ĉu vi starigis al mi ĉiujn viajn demandojn?

Kaj mi diris:

Jes, sinjoro.

Kial vi ne demandis min pri la formo de la ŝtonoj, kiuj kuŝas en la konstruo, ke ties formojn ni plenigis?

Kaj mi diris:

Mi forgesis, sinjoro.

3 Aŭskultu do – li diris – pri ili. Estas tiuj, kiuj nun aŭskultis miajn Ordonojn, kaj pentofaris el tuta koro. Kiam la Sinjoro vidis, ke bona estas ilia pento kaj ke ili povos resti ĉe tio, Li ordonis neniigi iliajn antaŭajn pekojn. Tiuj formoj estis ja iliaj pekoj, kaj ili estis glatigitaj, tiel ke ili ne plu aperu.

Deka Parabolo

Retrorigardante

1 [111]: 1 Post kiam tiun ĉi libron mi elskribis, venis tiu anĝelo, kiu transdonis min al la Paŝtisto en la domo, kie mi estis, kaj eksidis sur lito, kaj dekstre de li stariĝis la Paŝtisto. Tiam li vokis min kaj diris al mi:

2 Mi konfidis – li diris – vin kaj vian domon al tiu ĉi Paŝtisto, por ke vi estu protektata de li.

Jes, sinjoro – mi diris.

Se vi do – li diris – deziras plu esti protektata kontraŭ ĉiu mizero kaj kruelo, havi sukceson en ĉiu bona ago kaj diro, kaj <havi> ĉiun forton de justeco, promenu do tiam laŭ liaj Ordonoj, kiujn mi donis al vi, kaj vi povos venki super ĉiu malbono. 3 Ĉar se liajn Ordonojn vi gardas, venkitaj estos ĉiu <malbona> deziro kaj la logaĵoj de ĉi tiu mondo, kaj sekvos vin sukceso en ĉiu bona laboro. Lian sanktecon kaj modeston vi transprenu, kaj diru al ĉiuj, ke granda li estas en honoro kaj indeco antaŭ la Sinjoro, kaj ke li estas reganto de granda potenco, multpova en sia agado. Al li sola en la tuta mondo estas konfidata la potenco pri pentado. Ĉu li aspektas al vi potencia? Tamen lian sanktecon kaj modeston, kiujn li montris al vi, vi malŝatas.

2 [112]: 1 Mi do diris al li:

Demandu lin mem, sinjoro, depost kiam li estas en mia domo, ĉu mi ofendis lin per io?

2 Ankaŭ mi scias – li diris –, ke nenion ne bonan vi faris, nek faros. Kaj tial mi tion diras al vi, por ke vi daŭrigu. Tiu ĉi donis pri vi bonan raportaĵon. Al la ceteraj tamen tiujn ĉi vortojn vi diru, por ke ankaŭ tiuj, kiuj pentofaris aŭ - faros, konsentu kun vi, kaj tiu ĉi apud mi bone raportu pri tio al mi, kaj mi al la Sinjoro.

3 Ankaŭ mi, sinjoro – mi diris, – al ĉiu homo montros la grandajn farojn de la Sinjoro; ĉar mi esperas, ke ĉiuj, kiuj antaŭe pekis, se ĉi tion ili aŭdas, libervole pentofaros por rricevi la vivon.

4 Daŭrigu do – li diris – ĉe tiu servado via kaj elfinu ĝin. Ĉar ĉiuj, kiuj plenumas liajn Ordonojn, havos la vivon, kaj tia homo mem <havos> grandan honoron ĉe la Sinjoro. Sed ĉiuj, kiuj ne gardas liajn Ordonojn, forfuĝas de sia vivo kaj kontraŭ ĝi, kaj ili ne sekvos liajn Ordonojn, sed transdonas sin al la morto, kaj ĉiu unuopulo fariĝas kulpa pri sia propra sango. Sed al vi mi diras, ke ĉi Ordonojn vi gardu, kaj vi havos rimedon kontraŭ la pekoj.

La virgulinoj kiel helpantoj

3 [113]: 1 Mi sendis al vi tiujn virgulinojn, por ke ili loĝu kun vi; ĉar mi vidis, ke ili estas afablaj al vi. Tiujn vi do havas kiel helpantojn, por ke des pli vi povu gardi liajn Ordonojn; ĉar estas neeble, ke sen tiuj virgulinoj estu gardataj la

Ordonoj. Mi vidas, ke ili volonte estas kun vi. Sed mi ordonos al ili, ke ili absolute ne foriru de via domo. 2 Sed vi purigu ja vian domon; ĉar ili volonte loĝas en pura domo. Puraj ili ja estas kaj ĉastaj kaj laboremaj, kaj tial ili estas ŝatataj de la Sinjoro. Se vian domon ili do havos pura, ili restos kun vi; sed se aperas la plej eta malpuro, ili tuj foriros de via domo. Ĉar tiuj virgulinoj absolute ne amas ian malpuraĵon.

3 Mi diris al li:

Mi esperas, sinoro, ke mi kontentigos ilin, tiel ke en mia domo ili volonte loĝos por ĉiam, kaj same kiel li, al kiu vi konfidis min, nenion devis plendi pri mi, tiel ankaŭ ili ne plendos.

4 Li diris al tiu Paŝtisto:

Mi vidas – li diris – ke li deziras vivi kiel sklavo de Dio, kaj ke tiujn Ordonojn li gardos, kaj tiujn virgulinojn li igos loĝi en pura leĝejo.

5 Kiam tion ĉi li diris, denove li transdonis min al tiu Paŝtisto, kaj alvokis tiujn virgulinojn, kaj diris al ili:

Kiom mi vidas, volonte vi loĝas en lia domo, kaj tial rekomendas al vi lin kaj lian domon, por ke de lia domo neniel vi foriru.

Ili aŭdis tiujn vortojn kun plezuro.

4 [114]: 1 Poste li diris al mi:

Plenumu vian oficon kiel viro, montru al ĉiu homo la grandajn farojn de la Sinjoro, kaj vi estis ŝatata en tiu ĉi servo. Ĉiuj, kiuj promenos do laŭ liaj Ordonoj, vivos, kaj estos feliĉaj en sia vivo; sed kiu neglektos ilin, ne vivos, kaj estos malfeliĉa en sia vivo.

Lasta rekomendo: la bonfaro

2 Ordonu al ĉiuj, kiuj kapablas bonfari, ke ili ne ĉesu; bonfari estas utile por ili. Krome mi diras, ke ĉiu homo devas esti savita el la mizero. Ĉar kiu havas malriĉon kaj en la ĉiutaga vivo suferas mizeron, tiu estas en granda turmento kaj manko. 3 Do ĉiu, kiu savas iun animon el tiaspeca mizero, meritas por si grandan ĝojon. Ĉar kiu estas turmentata de tia katastrofo, turmentiĝas aŭ

suferas de simila torturo kiel iu, kiu estas en katenoj. Ĉar pro tiaj katastrofoj, kiam ili ne plu eltenas tion, multaj sinmortigas. Kiu do scias pri katastrofo de tia homo, kaj lin ne elsavas el ĝi, faras grandan pekon kaj fariĝas kulpa pri lia sango. 4 Faru do bonon, vi ĉiuj, kiuj <ĉion> ricevis de la Sinjoro, por ke la konstruo de la turo ne fariĝu preta, dum vi ankoraŭ hezitas. Estas ja pro vi, ke la konstruo de la turo estis interrompita. Se vi ne haste ekfaros bonon, pretiĝos la turo, kaj vi estos elbaritaj.

5 Kiam li finis paroli kun mi, li leviĝis de la lito, kunprenis ĉe-mane la Paŝtiston kaj la virgulinojn, sed diris al mi, ke li resendos la Paŝtiston kaj la virgulinojn al mia domo, kaj foriris.

Aliaj tradukoj de la sama tradukinto:

Nova traduko el la Malnova Testamento:

Nombroj, trad. el la Hebrea, FONTO, Chapecó, 1999

Nova traduko de la Nova Testamento:

Leteroj de Paŭlo kaj lia skolo (NT Vol. 1), FONTO, Chapecó, 2004

La Bona Mesaĝo de Jesuo (NT Vol. 2), FONTO, Chapecó, 2012

Flanke je Jesuo (NT Vol. 3), VoKo, Zwolle, 2010

La Duakanonaj Libroj 3-volume:

La Duakanonaj Libroj, Vol. 1: la historiaj libroj, FONTO, Chapecó 2001

La Duakanonaj Libroj, Vol. 2: la poeziaj kaj profetaj libroj, FONTO, Chapecó 2001

La Duakanonaj Libroj, Vol. 3: la libroj de la Ortodoksiaj Eklezioj, VoKo, Zwolle, 2008

La Duakanonaj Libroj en la Esperantaj Biblioj ekde 2000:

LA SANKTA BIBLIO, ed. British and Foreign Bible Society, sen sidej-indiko, presita en Hong Kong, sen jar-indiko (2000)

BIBLIO, edit. IKUE kaj KELI, KAVA-PECH, Dobřichovice, 2006

Aliaj kristanaj tekstoj:

Benedikto – *La Regulo*, aperis 2014 rete en KRISTANAJ FONTOJ, VoKo, Rijswijk, 2015

Cipriano – *La Unueco de la Katolika Eklezio*, VoKo, Zwolle, 2006

Didakáo, IABO, Ravenna, 1979, aperos rete en KRISTANAJ FONTOJ

Erasmus de Roterdamo – *Antaŭparoloj al la Nova Testamento*, VoKo, Zwolle, 2001 / Rijswijk, 2014

Erasmus de Roterdamo – *Laŭdo de l' Stulteco*, UEA, Rotterdam 1988

Jan Hus – *Pri la Eklezio*, elektitaj ĉapitroj, KAVA-PECH, Dobřichovice, 2018

Pico della Mirandola – *Parolado pri la Homa Digno*, FONTO, Chapecó, 2010

Tertuliano – *Apologio*, VoKo, Vlaardingen, 1982

Tomaso – *La Evangelio kopta laŭ Tomaso*, dua korektita eldono, VoKo, Breda, 1994

Propraj verkoj:

Gerrit Berveling – *Dio, Kristanismo, Aliaj Religioj*, VoKo, Vlaardingen, 1985 / Rijswijk, 2017

Gerrit Berveling – *Mia Pado*, tekstoj el 25 jaroj, FONTO, Chapecó, 1997

Gerrit Berveling – *Fadenoj de l' amo* (Vojaĝaj peripetoj de gea triopo), Romaneto originale verkita en Esperanto, FONTO, Chapecó, 1998

Gerrit Berveling – *Ajnasemajne* (Skizoj el la vivo de Remonstranta pastoro), FONTO, Chapecó, 2006

Gerrit Berveling – *Konciza historio de Kristanismo*, KAVA-PECH, Dobřichovice, 2014